

Esperanto



OFICIALA
JARLIBRO

DE LA
ESPERANTO-MOVADO

1925

13^a JARO

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
12 BOULEVARD DU THÉÂTRE, GENÈVE

LEONARDO BOBMCZEWSKI

Energio

valoras pli ol kapitalo. Ĉu vi tiom zorgas pri la konservado de via energio kiom por via mono? Por konservi la nervojn sanaj, la laborpovon senlima, la ordinara nutraĵo ofte ne sufiĉas ĉe energiaj personoj. Krom ĝi estas bezonata unu taso da

OVOMALTINE

POR LA MATENMANĜO.



En skatoloj de Fr. 2.75 kaj 5.— Ĉie ricevebla.

Dr. A. WANDER A.-G.
BERN.

OFICIALA JARLIBRO

DE LA
ESPERANTO-MOVADO

1925

13^a JARO

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
12 BOULEVARD DU THÉÂTRE, GENÈVE

LEONARDO HORMCZEWski

Ĉiuj rajtoj rezervitaj



V-18679

La enhavo de tiu Jarlibro ne povas esti represata,
ĉu tute, ĉu parte, sen la permeso de UEA.

ENHAVO.

Antaŭparolo	9
Kalendaro	14

Unua parto: Enciklopedio.

Afranko, Tabelo	106
Civilizo, Kelkaj progresoj de la	36
Eklipsoj 1925	27
Ekspansio de kelkaj korpoj	27
Elementoj kemiaj	32
Fandiga punkto	26
Fervojararo, Monda	98
Fervojararo, Monta	96
Festoj nefiksaj	22
Geologia Skemo	30
Himnaro, Nacia	72
Kalendaro Roma	19
Kalendaro de l'franca Respubliko	19
Komputo, eklezia	21
Kronologio	18
Labora Oficejo: Internacia	78
Ligo de Nacioj	77
Lingvo Internacia, La	55
Lingvo Internacia: Sistemoj	57
Lingvoj, La . . . en la mondo	51
Luno	22
Mejlo: Kio estas	24
Mezuroj kaj pezoj	23
Mono, La, kaj ĝia divido	102
Muziknotado, La	63
Muzikverkistoj, Famaj	67
Nobelpremio	84
Nomoj neromaj de monatoj	20
Organizaĵoj Internaciaj	77

Pezo de 1 km. de substancoj	24
Poŝta servo, Afranko	106
Poŝtmarkoj 1925	110
Rapideco de diversaj objektoj	25
Sezonoj	21
Stenografio, Pri	60
Ŝiparo, Mara	96
Ŝipkanaloj plej grandaj	97
Ŝipoj, plej grandaj komercaj	97
Statistikaj informoj pri ĉefaj landoj	92
Temperaturo	28
Temperaturo Homa	26
Termometro	27
Tero, Dispartigo de la	29
Tero, Div. longoj kaj mezuroj	29
Unuoj, diversaj	25
Vaporiga punkto de kelkaj likvaĵoj	26
Anoncoj	I—XVI

Dua parto: Esperantismo.

Adresoj de lingva-Komitatanoj	118
Blinduloj: internacia asocio	124
ĉeĥoslovaka societo	140
hungara societo	150
Datoj el historio de Esperanto	115
Gazetoj internaciaj	128
Dia Regno	130
Eklezia Revuo	130
Esperanta Ligilo (blindula)	129
Esperanto	128
Esperanto Triumfonta (estinta)	129
Espero Katolika	130
Espero Teozofia	130
Fervoĵisto	130
Heroldo de Esperanto	129
Interligilo de P. T. T.	129
Internacia Medicina Revuo	129
Katolika Mondo	130
Literatura Mondo	129
Literaturo	135
Novaj Tempoĵoj	130

Policisto	129
Sennacieca Revuo	129
Sennaciulo	129
Unuigita Tuthomara	130
Vegetarano	129
Gazetoj naciaj:	
Amerika Esperantisto	162
Arbeider-Esperantister	156
Arbeites Esperantist	146
Arguso (meksika)	154
Aŭroro (ĉeĥa blindula)	139
Aŭstria Esperantisto	132
Belga Esperantisto	133
Brazila Esperantisto	134
British Esperantist	135
Bulgara Esperantisto	137
Corriero Balcanico	151
Esperanta Studento	140
Esperantský Zpravodaj	138
Germana Esperantisto	146
Holanda Esperantisto	154
Hungara Esperantisto	149
Informoj de Estona Asocio	142
Intermembra Informilo	155
International Language	135
Itala Esperanta Revuo	151
Kataluna Esperantisto	148
Konkordo	161
Litova Stelo	153
Marto	138
Monde Esperantiste	143
Movado	143
Norvega Esperantisto	156
Pola Esperantisto	157
Progreso	138
Revuo Orienta	150
Semisto	148
Suda Kruco	132
Suno Hispana	148
Svenska Arbetar	160
Svenska Tidningen	159
Ukraina Stelo	157
Verda Lumo	140

Verda Ombro	150
Verda Utopio	150
Wereldtaal	155
Institutoj: internacia:	
ĉeĥoslovaka	138
finlanda	142
germana	145
hungara	149
itala katedro	151
japana	150
Katolikoj:	
unuiĝo internacia	123
aŭstria ligo	133
ĉeĥoslovaka ligo	140
franca ligo	145
germana ligo	147
itala unuiĝo	152
nederlanda ligo	155
Laboristoj:	
aŭstria ligo	133
germana asocio	145
hungara societo	149
nederlanda federacio	155
nederlanda servo	155
Organizo internacia:	
Akademio	117
Blindula Asocio	124
Centra Komitato	117
Eklezia ligo	136
Fervojista Asocio (IAEF.)	121
Fervojista Ligo (TELF.)	122
Junula Asocio	127
Konkordo (societo)	128
Konstanta Reprezentantaro	117
Kristana Ligo	123
Kuracista Asocio	121
Kvekeria Societo	136
Liberpensula Ligo	125
Lingva Komitato	117
Literatura Asocio	126
Muziknotada Asocio	122
Poŝtoficista Ligo	122
Polica Ligo	126

Radio Asocio	126
Scienca Asocio	121
Sennacieca Asocio	123
Skolta Ligo	136
Sporta Ligo	128
Stenografia Asocio	123
Teozofia Ligo	124
Vegetara Ligo	125
Organizo nacia:	
Argentina Asocio	131
Aŭstralazia Asocio	131
Aŭstria Delegitaro	132
Belga Ligo	133
Brazila Ligo	134
Brita Asocio	135
Bulgara Societo	137
Ĉeĥoslovaka Asocio	137
Dana Ligo	140
Danziga Asocio	141
Estona Asocio	141
Finnlanda Asocio	142
Franca Societo	143
Germana Asocio	145
Germana Ligo en Ĉeĥoslavio	138
Hungara Societo	149
Itala Federacio	151
Kataluna Federacio	148
Kuba Societo	152
Litova Asocio	153
Nederlanda Societo	154
Nord-Amerika Asocio	161
Norvega Ligo	156
Pola Asocio	157
Riga Societo	153
Rumana Societo	158
Saarteritoria Ligo	159
Samosa Societo	147
Sveda Federacio	159
Svisa Societo	160
Sovetlanda Unuiĝo	158
Sudslava Ligo	161
Zamenhofa Federacio	148
Anoncoj	XVII—LXIV

Tria parto: **Universala Esperanto-Asocio.**

Adresaro	183
Centra Oficejo	178
Garantiantoj	179
Komisiono	177
Komitato	177
Laŭlanda listo de lokoj kie UEA estas reprezentata, vidu laŭlandan parton en 2 ^a parto "Esperantismo"	181
Membroj Dumvivaj	179
Membroj Honoraj	178
Teritoria Organizo	181
Anoncoj	LXV—CXVI

ANTAŬPAROLO.

La movado esperantista komencas stabiligi; kun la internaciaj sukcesoj moralaj de nia lingvo iras paralele la tiom serĉita koncentriĝo de la fortoj kaj rimedoj, la simpligo de la organizo kaj la racia eluzo de ekzistantaj rimedoj. Tion ni konstatas el la kreskanta anaro de la Universala Asocio kaj en la kreskanta amplekso de la "Oficiala Jarlibro de la Esperanto-Movado".

Dank' al ŝanĝo de redakta metodo ni povas ĝin aperigi dum Majo. Dezirinde ja estas, ke ĝi aperu dum Februaro aŭ Marto. Sed tio ŝajnas neebla. Prilaborante tiun libron ni nete konstatis, ke la ŝanĝoj en la oficoj kaj adresoj de la Esperantistaj societoj kaj aktivuloj arigiĝas en la vintraj monatoj. Dum marto kiam ni intencis presigi, alvenis tiom da korektoj kaj ŝanĝoj, ke ne estis eble efektiviĝi tiun intencon. Malgraŭ tiu evidenta malhelpo, rezultanta el malfrua kaj ofte prokrastita informado, ni sukcesis ĉion fini decatempе kaj prezenti al vi, kara leganto, la novan Jarlibron kiu espereble trovos vian aprobon kaj konsenton.

Permesu kelkajn vortojn pri ĝi. Antaŭ ĉio estas konstatebla la kresko ce ĉiuj partoj, ŝuldata al pli intensa laboro nacia kaj internacia. Kreskis la parto "Enciklopedio", kiu efektive ja estas ankoraŭ enciklopedieta, sed kiun ni ŝatus foje prezenti kiel veran Esperanto-Enciklopedion, informantan pri ĉio sciinda. Nia lingvo kaj nia organizo mirinde taŭgas por internacia Vademecum. Fidele al nia principo de iom-post-ioma evoluado ni limigis ankoraŭ tiun parton, atendante la evoluon de la disponeblaj rimedoj.

Plenan ŝanĝon trovis la parto *ESPERANTISMO*, enhavanta la informojn pri organizaĵoj. De nun la leganto trovas sub ĉiu lando kunigite la detalojn pri la Esperantista movado, laŭ jena sekvo: Nacia Societo, Instituto, Gazeto, UEA, listo de lokoj kun delegitoj, Fakaj societoj. En landoj kie ekzistas Laborista Organizaĵo sendependa, ni citis ĝin sub la "Naciaj Societoj", la senco de vorto "nacia" egalas al Landa.

Apud la nomo de la lando ni indikis maldekstre la nacilingvan nomon geografian kaj dekstre la politikan (Italia. ITALIO. Regno d'Italia).

La tria parto enhavas la adresojn de la Delegitoj de UEA laŭ la konata alfabeto vico. Tiun aranĝon ni konservis, ĉar ĝi permesas pli facilan trovon de adreso. La nombro de lokoj reprezentitaj kreskis konsiderinde. Estas nun 1313 kontraŭ 1187 en la jarlibro 1924. Por eviti prokraston de la presado ni ne plu enmetis centon da novaj delegitoj sin anoncintaj dum monatoj februaro kaj marto. Se permesos la rimedoj, ni publikigos aldonon dum Julio, kiu enhavos la adresojn de novaj kaj la eblajn ŝanĝojn de malnovaj Delegitoj.

Neforgesinda estas la plia kresko de la anoncoj dank' al sistema varbado de kelkaj fervoruloj. Ni spertis, ke la persona vizito de Delegito aŭ varbanto al firmoj havas sukceson pli grandan ol la plej lerte aranĝita varbletero. Tiu pliiĝo de la reklamoj pagataj ja esprimiĝas proporcie en pli riĉa aranĝo de la ceteraj partoj de la libro. Por ke la firmoj anoncintaj vidu utilon de reklamado en esperantistaj eldonaĵoj necesas, ke skribante al anoncinto vi citu la fonton.

La nuna libro estas presita je dekmil ekzempleroj. Malrapide, sed prudente ni iras nian vojon. La tempo de la du aŭ trimil ekzemplera presado estas for, sed ni ne rajtas ekhalti. Nia lingvo nur povas vekti intereson, se

ni povas doni al la neesperantista mondo konkretajn utilojn. El tiu vivsperta konkludo ja naskiĝis Universala Esperanto-Asocio. Ĝi kreiĝis por doni al la Esperantistoj tujan realan uzeblecon.

Tamen ekzistas miloj da personoj efektive ne bezonantaj la servojn de Delegito. Ili trovas kompenson per la gazeto *ESPERANTO* kaj la Jarlibro, donantaj krom la esperantistaj informoj, utilaĵojn ĉiuspecajn.

Evolui ambaŭ eldonaĵojn kaj pliperfektigi ilin ĉiurilate estas nia daŭra zorgo.

Ni ne volas fini, ne dankante tie-ĉi al la bonvolaj samideanoj helpintaj la redaktadon per konsiloj, atentigoj kaj rimarkoj. Tio speciale rilatas al S^{ro} *Hromada* (Praha), S^{ro} *Edv. Wiesenfeld* (Varsovio), S^{ro} *Ravestein* (Hago), S^{ro} *R. Richez* (Genève); la artikolon "La muziknotado" verkis S^{ro} *Léon Cogen* (52 Dreef, Ninove, Belgio) al kiu oni povas sin turni pri tiu temo.

Trovu la jarlibro 1925 favoran akcepton ĉe niaj membroj same kiel indulgon, se enŝoviĝis eraroj neevitablaj en tia presaĵo pro teknikaj kaŭzoj. Ĝi signu novan ŝtupon de progreso; ĝi alkonduku novajn anojn al nia asocio kaj servu por la komuna bono de nia afero.

Genève, Aprilo 1925.

Hans Jakob,
Direktoro de UEA.

LEONARD ROBINOWSKI

LIBRO-PRESADO LAŬ ĈIUJ MANIEROJ
KAJ EN ĈIUJ LINGVOJ

KOLORPRESOJ
ILUSTRITAJ
KATALOGOJ
PROSPEKTOJ

LERNOLIBROJ
OBLIGACIOJ-
FORMULAROJ
AKCIAJ



PRESEJO KAJ ARTOMETIEJO
J·B·HIRSCHFELD

A PRIES
LEIPZIG
BRÜDERSTRASSE 59

STEREOTIPIO · K. GALVANOPLASTIKO · ĈIRK. 50 PRESMAŜINOJ
PROpra KLIŜO-METIEJO · GRANDA DESEGNO-LABOREJO



Mittleuropäisches Reisebüro

G m. b. H.

(Mezeŭropa Trafikentrepreno)

Berlin W 9 (Potsdamer Bahnhof)

Telegramadreso:



Reiseamt Berlin

Fervojbiletoj, litkartoj kaj lokokartoj je oficiala tarifo sen alpago.

Kombinitaj MER vojaĝbiletaro por la tuta internacia trafiko ligitaj kun Transmar- Aer- kaj Aŭtovojaĝoj.

Aranĝo de societvojaĝoj kaj unuopaj vojaĝoj inkluzive vojaĝ- kaj litkartoj por en- kaj eksterlando.

Hotelrestado, manĝado, vizitoj al vidindaĵoj, veturado, Ekskursoj kun spertaj gvidistoj.

Prizorgo de vizoj kaj ellivero de vojaĝpakaĵoj.

Asekuro de vojaĝpakaĵoj kaj akcidentoj.

Monŝanĝo, Vojaĝĉekoj, Vojaĝkreditleteroj. Fervoja horar- kaj gvidlibroj.

Preparo de vojaĝplanoj laŭ ĉiu ajn kombino.

★

Entrepreno de UEA. Esperanto korespondata.

GRAVA!

Estimata Samideano.

I. — Dankante vin pro via kotizo, ni havas la honoron sendi al vi la jarlibron por 1925.

II. — KOTIZO POR 1926. — Por ke ne okazu interrompo en viaj membrorajtoj kaj por ebligi regulan financon administradon de nia Asocio, vi bonvolu afable repagi vian kotizon por 1926 ĝis la fino de marto 1926. La tiamaj prezoj por la diversaj landoj estas konigataj, en “Esperanto” dum vintro.

III. — VARBADO. — Por ke nia Asocio fariĝu pli kaj pli grava kaj potenca, estas necese, ke konstante pligrandiĝu la nombro de ĝiaj membroj. Nia nuna celo estas 10000 membroj, eviti la deficiton. Ni do insiste petas, ke vi konsideru kiel devon, varbi dum la nuna jaro almenaŭ unu membron, inter la personoj kiuj iel ajn bezonas la servojn de UEA aŭ sin interesas pri Esperantismo. Uzu por tio la aldonitajn varbilojn ĉe la fino de la jarlibro.

IV. — BONVOLA KUNLABORADO. — Se vi rimarkis eraron en la jarlibro; se vi konas samideanon kiu povus fariĝi Delegito en loko kie ne estas; se vi konas firmon, asocion, k. t. p., povanta nin helpi; se vi deziras fari al ni proponon, sendu la aldonitan respondilon.

Kun samideana saluto kaj antaŭa danko

**Universala Esperanto-Asocio
Centra Oficejo.**

LEBIBUO BOKMOZEWASB

KALENDARO POR LA JARO 1925

Monatoj	Dimanĉo	Lundo	Mardo	Merkredo	Ĵaŭdo	Vendredo	Sabato	Monatoj	Dimanĉo	Lundo	Mardo	Merkredo	Ĵaŭdo	Vendredo	Sabato	
Januaro	—	—	—	—	1	2	3	Julio	—	—	—	—	1	2	3	4
	4	5	6	7	8	9	10		5	6	7	8	9	10	11	
	11	12	13	14	15	16	17		12	13	14	15	16	17	18	
	18	19	20	21	22	23	24		19	20	21	22	23	24	25	
	25	26	27	28	29	30	31		26	27	28	29	30	31	—	
Februaro	1	2	3	4	5	6	7	Aŭgusto	—	—	—	—	—	—	—	1
	8	9	10	11	12	13	14		2	3	4	5	6	7	8	
	15	16	17	18	19	20	21		9	10	11	12	13	14	15	
	22	23	24	25	26	27	28		16	17	18	19	20	21	22	
									23	24	25	26	27	28	29	
									30	31	—	—	—	—	—	
Marto	1	2	3	4	5	6	7	Septembro	—	—	1	2	3	4	5	
	8	9	10	11	12	13	14		6	7	8	9	10	11	12	
	15	16	17	18	19	20	21		13	14	15	16	17	18	19	
	22	23	24	25	26	27	28		20	21	22	23	24	25	26	
	29	30	31	—	—	—	—		27	28	29	30	—	—	—	
Aprilo	—	—	—	1	2	3	4	Oktobro	—	—	—	—	—	1	2	3
Pasko: 12	5	6	7	8	9	10	11		4	5	6	7	8	9	10	
	12	13	14	15	16	17	18		11	12	13	14	15	16	17	
	19	20	21	22	23	24	25		18	19	20	21	22	23	24	
	26	27	28	29	30	—	—		25	26	27	28	29	30	31	
Majo	—	—	—	—	—	1	2	Novembro	1	2	3	4	5	6	7	
Ĉiela	3	4	5	6	7	8	9		8	9	10	11	12	13	14	
ascendo: 21	10	11	12	13	14	15	16		15	16	17	18	19	20	21	
Pente-	17	18	19	20	21	22	23		22	23	24	25	26	27	28	
kosto: 31	24	25	26	27	28	29	30		29	30	—	—	—	—	—	
	31	—	—	—	—	—	—									
Junio	—	1	2	3	4	5	6	Decembro	—	—	1	2	3	4	5	
	7	8	9	10	11	12	13		6	7	8	9	10	11	12	
	14	15	16	17	18	19	20		13	14	15	16	17	18	19	
	21	22	23	24	25	26	27		20	21	22	23	24	25	26	
	28	29	30	—	—	—	—		27	28	29	30	31	—	—	

KALENDARO POR LA JARO 1926

Monatoj	Lundo	Mardo	Merkredo	Ĵaŭdo	Vendredo	Sabato	Dimanĉo	Monatoj	Lundo	Mardo	Merkredo	Ĵaŭdo	Vendredo	Sabato	Dimanĉo			
Januaro	—	—	—	—	—	1	2	3	Julio	—	—	—	—	—	1	2	3	4
	4	5	6	7	8	9	10		5	6	7	8	9	10	11			
	11	12	13	14	15	16	17		12	13	14	15	16	17	18			
	18	19	20	21	22	23	24		19	20	21	22	23	24	25			
	25	26	27	28	29	30	31		26	27	28	29	30	31	—			
Februaro	1	2	3	4	5	6	7	Aŭgusto	—	—	—	—	—	—	—	—	1	
	8	9	10	11	12	13	14		2	3	4	5	6	7	8			
	15	16	17	18	19	20	21		9	10	11	12	13	14	15			
	22	23	24	25	26	27	28		16	17	18	19	20	21	22			
									23	24	25	26	27	28	29			
									30	31	—	—	—	—	—			
Marto	1	2	3	4	5	6	7	Septembro	—	—	1	2	3	4	5			
	8	9	10	11	12	13	14		6	7	8	9	10	11	12			
	15	16	17	18	19	20	21		13	14	15	16	17	18	19			
	22	23	24	25	26	27	28		20	21	22	23	24	25	26			
	29	30	31	—	—	—	—		27	28	29	30	—	—	—			
Aprilo	—	—	—	1	2	3	4	Oktobro	—	—	—	—	—	—	1	2	3	
Pasko: 4	5	6	7	8	9	10	11		4	5	6	7	8	9	10			
	12	13	14	15	16	17	18		11	12	13	14	15	16	17			
	19	20	21	22	23	24	25		18	19	20	21	22	23	24			
	26	27	28	29	30	—	—		25	26	27	28	29	30	31			
Majo	—	—	—	—	—	—	1	2	Novembro	1	2	3	4	5	6	7		
Ĉiela	3	4	5	6	7	8	9		8	9	10	11	12	13	14			
ascendo: 13	10	11	12	13	14	15	16		15	16	17	18	19	20	21			
Pente-	17	18	19	20	21	22	23		22	23	24	25	26	27	28			
kosto: 23	24	25	26	27	28	29	30		29	30	—	—	—	—	—			
	31	—	—	—	—	—	—											
Junio	—	1	2	3	4	5	6	Decembro	—	—	1	2	3	4	5			
	7	8	9	10	11	12	13		6	7	8	9	10	11	12			
	14	15	16	17	18	19	20		13	14	15	16	17	18	19			
	21	22	23	24	25	26	27		20	21	22	23	24	25	26			
	28	29	30	—	—	—	—		27	28	29	30	31	—	—			

ISLAMA KALENDARO

Monatoj

1. Moharram . . . 30 tagoj	5. Ĝumada I . . . 30 tagoj	9. Ramadan . . . 30 tagoj
2. Safar 29 „	6. Ĝumada II . . . 29 „	10. Ŝaŭŭal 29 „
3. Rabi' I 30 „	7. Raĝab 30 „	11. Du-l-Ka'da . . . 30 „
4. Rabi' II 29 „	8. Ŝa'ban 29 „	12. Du-l-hiĝa . . . 29 (aŭ 30)

Islama Kalendaro 1343—1344

1 ^a Moharram 1343	2 Aŭgusto 1924	1 ^a Moharram 1344	22 Julio 1925
1 ^a Safar 1343	1 Septembro 1924	1 ^a Safar 1344	21 Aŭgusto 1925
1 ^a Rabi' I 1343	30 Septembro 1924	1 ^a Rabi' I 1344	19 Septembro 1925
1 ^a Rabi' II 1343	30 Oktobro 1924	1 ^a Rabi' II 1344	19 Oktobro 1925
1 ^a Ĝumada I 1343	28 Novembro 1924	1 ^a Ĝumada I 1344	17 Novembro 1925
1 ^a Ĝumada II 1343	28 Decembro 1924	1 ^a Ĝumada II 1344	17 Decembro 1925
1 ^a Raĝab 1343	26 Januaro 1925	1 ^a Raĝab 1344	15 Januaro 1926
1 ^a Ŝa'ban 1343	25 Februaro 1925	1 ^a Ŝa'ban 1344	14 Februaro 1926
1 ^a Ramadan 1343	26 Marto 1925	1 ^a Ramadan 1344	15 Marto 1926
1 ^a Ŝaŭŭal 1343	25 Aprilo 1925	1 ^a Ŝaŭŭal 1344	14 Aprilo 1926
1 ^a Du-l-Ka'da 1343	24 Majo 1925	1 ^a Du-l-Ka'da 1344	13 Majo 1926
1 ^a Du-l-hiĝa 1343	23 Junio 1925	1 ^a Du-l-hiĝa* 1344	12 Junio 1926

* En tiu-ĉi jaro oni aldonas unu supertagon al tiu-ĉi monato.
1^a Januaro 1925 = 5^a Ĝumada II 1343.

Komenco de la Islamaj jaroj kaj Korespondaj datoj je la Gregoria Kalendaro

1 ^a Moharram 1341*	24 Aŭgusto 1922	1 ^a Moharram 1346*	1 Julio 1927
1 ^a Moharram 1342	14 Aŭgusto 1923	1 ^a Moharram 1347	20 Junio 1928
1 ^a Moharram 1343	2 Aŭgusto 1924	1 ^a Moharram 1348	9 Junio 1929
1 ^a Moharram 1344*	22 Julio 1925	1 ^a Moharram 1349*	29 Majo 1930
1 ^a Moharram 1345	12 Julio 1926	1 ^a Moharram 1350	19 Majo 1931

* En la islamaj jaroj kun steleto oni devas aldoni unu supertagon al la lasta monato (Du-l-hiĝa).
Kun la islama jaro 1350 finiĝos periodo de 30 jaroj.

HEBREA KALENDARO

Jaro 5684: 11. IX. 1923—28. IX. 1924.—Jaro 5685: 29. IX. 1924—28. IX. 1925

La monatoj:

Komencdatoj	{ 1923/24: Tiŝri { 11. IX. Marĥeŝvan { 11. X. 1924/25: Tiŝri { 29. IX. Marĥeŝvan { 29. X.
Kislav { 9. XI. Teves { 9. XII. Ŝevat { 7. I. Adar { riŝon 6. II. 28. XI. 28. XII. 26. I. — 25 II.	
Adar { ŝeni 7. III. Nisan { 5. IV. Ijar { 5. V. Sivan { 3. VI. — — 26. III. 25. IV. 24. V.	
Tamus { 3. VII. Av { 1. VIII. Elul { 31. VIII. 23. VI. 22. VII. 21. VIII.	

La festoj:

Nomoj hebreaj kun traduko	Datoj	
	hebreaj (5684 kaj 5685)	ĝeneralaj 1923—1924 1924—1925
Roŝ ha-ŝana Komenco de la jaro	1.—2. Tiŝri	11.—12. IX. 29.—30. IX.
○ Com Gedalja Fasto pro Gedalja	3. Tiŝri	13. IX. 1. X.
○ Jom Kipur Tago de pentfaro	10. Tiŝri	20. IX. 8. X.
Ĥag ha-Sukos Festo de la kabanjoj	15.—21. Tiŝri	25. IX.—1. X. 13.—19. X.
Ŝemini aceres Oka festkunveno	22. Tiŝri	2. X. 20. X.
Simhas tora Gojo pri la leĝo	23. Tiŝri	3. X. 21. X.
Ĥanuka (Inaŭguro)	25. Kislav—3. Teves	3.—10. XII. 22.—29. XII.
○ Asara be-teves 10 a de Teves	10. Teves	18. XII. 6. I.
○ Taanis Ester Fasto de Ester	13. } Adar ŝeni (5684)	19. III. 9. III.
Purim (Festo de la) lotoj	14. } Adar (5685)	20. III. 10. III.
Ĥag ha-Pesah Festo de la Preteriro	15.—22. Nisan	19.—26. IV. 9.—16. IV.
Ĥag ha-Ŝavuos Festo de la semajnoj	6.—7. Sivan	8.—9. VI. 29.—30. V.
○ Ŝiv'a asar be-tamus 17 a de Tamus	17. Tamus	19. VII. 9. VII.
○ Tiŝ'a be-av (9 a de Av)	9. Av	9. VIII. 30. VII.

Festoj kun signo ○ estas fastotagoj.

ROMA KALENDARO

UNUA PARTO.

ENCIKLOPEDIO.

Kronologio.

La jaro **1925** de la *Gregoria Kalendaro* starigita en oktobro 1582 per la papo Gregoro XIII, respondas al la jaro:

1925 de la *Julia Kalendaro* (komenco: 14. Januaro 1925).

5685—5686 de la *Hebrĉa Kalendaro* (komenco de la jaro: 29. Septembro 1924).

1343—1344 de la *Mahometana Kalendaro* (komenco de la jaro 1343: 2. Aŭgusto 1924; fino 21. julio 1925).

La *Gregoria Kalendaro* estas la Julia Kalendaro plibonigita per dekreto de Papo Gregorio XIII^a la 15. Oktobro 1582 kaj sinsekve akceptita de la pli multaj civilizitaj ŝtatoj. (De 1918 sovjeta Ruslando ankaŭ uzas la Gregorian Kalendaron.)

La *Julia Kalendaro* estas ankoraŭ uzata de la Ortodoksaj popoloj; ĝi diferencas de la Gregoria per tio, ke ĝi malfruas je 13 tagoj.

La *Hebrea Kalendaro* enhavas 12 aŭ 13 monatojn, la monatoj, fiksitaj laŭ la irado de la luno, 29 aŭ 30 tagojn; la 12-monataj jaroj havas 353, 354 aŭ 355 tagojn, la 13-monataj 383, 384 aŭ 385 tagojn. Tiuj diversaj jaroj sin sekvas tiel, ke je ĉiu 19^a jaro la komenco de la hebrea jaro koincidas kun tiu de la suna jaro.

La *Islama Kalendaro* komenciĝas je la Heĝiro (16. Julio 622 p. Kr.), t. e. la forkuro de Mahometo el Meko al Medino. La monatoj havas 29 aŭ 30 tagojn, laŭ la luno; la jaro havas ĉiam 12 monatojn kun 354 aŭ 355 tagojn.

La *Roma Kalendaro* estas uzata ankoraŭ ĉe la katolika eklezio. La monato disiĝas en tri malegalaj partoj: *Calendoe*, *Idus*, *Nonoe*. La unua tago de l'monato nomiĝas *Calendes* [Mi vokas] ĉar je ĉi-tiu tago oni vokis la popolon al publikaj kunvenoj.

Tagoj	Marto, Majo Julio, Oktobro (31 tagoj)	Januaro, Aŭg. Decembro (31 tagoj)	Aprilo, Junio Sept., Nov. (30 tagoj)	Februaro (28 aŭ 29 tagoj)
1	Calendae	Calendae	Calendae	Calendae
2	VI	IV } Ante	IV } Ante	IV } Ante
3	V } Ante	III } nonas	III } nonas	III } nonas
4	IV } nonas	Pridie nonas	Pridie nonas	Pridie nonas
5	III	Nonae	Nonae	Nonae
6	Pridie nonas	VIII } Ante	VIII } Ante	VIII } Ante
7	Nonae	VII } idus	VII } idus	VII } idus
8	VIII } Ante	VI } Ante	VI } Ante	VI } Ante
9	VII } idus	V } idus	V } idus	V } idus
10	VI } Ante	IV } idus	IV } idus	IV } idus
11	V } idus	III } idus	III } idus	III } idus
12	IV } idus	Pridie idus	Pridie idus	Pridie idus
13	III	Idus	Idus	Idus
14	Pridie idus	XIX } Ante	XVIII } Ante	XVI } Ante
15	Idus	XVIII } Ante	XVII } Ante	XV } Ante
16	XVII } Ante	XVII } Ante	XVI } Ante	XIV } Ante
17	ĝis	XVI } Ante	XV } Ante	XIII } Ante
18	ĝis	XV } Ante	XIV } Ante	XII } Ante
19	ĝis	XIV } Ante	XIII } Ante	XI } Ante
20	VI } Ante	VI } Ante	V } Ante	III } Ante
21	V } Ante	V } Ante	IV } Ante	Pridie idus
22	IV } Ante	IV } Ante	III } Ante	Pridie idus
23	III } Ante	III } Ante	Pridie idus	Pridie idus
24	Pridie idus	Pridie idus	Pridie idus	Pridie idus
25	Pridie idus	Pridie idus	Pridie idus	Pridie idus
26	Pridie idus	Pridie idus	Pridie idus	Pridie idus
27	Pridie idus	Pridie idus	Pridie idus	Pridie idus
28	Pridie idus	Pridie idus	Pridie idus	Pridie idus
29	Pridie idus	Pridie idus	Pridie idus	Pridie idus
30	Pridie idus	Pridie idus	Pridie idus	Pridie idus
31	Pridie idus	Pridie idus	Pridie idus	Pridie idus

La unua *Franca Respublika* starigis kalendaron komencanta la 22. Septembro 1792 ĝis 18. Aŭgusto 1793 kiel jaro unu (I). Ĝi estis en uzado ĝis 1. Januaro 1806 aŭ 11 Nivôse de l'jaro XIV. Ofte oni legas la nomojn de la monatoj en verkoj el tiu-ĉi tempo: ili kaj ilia signifo kun koresponda ordinara tempo estas:

Respublika:	Signifo:	Korespondas kun:
Vendémiaire	Vinrikolto	Septembro
Brumaire	Nebulo	Oktobro
Frimaire	Frosto	Novembro
Nivôse	Neĝo	Decembro
Pluviose	Pluvo	Januaro
Ventôse	Vento	Februaro
Germinal	Ĝermado	Marto



Respublika:	Signifo:	Korespondas kun:
Floréal	Florado	Aprilo
Prairial	Herbokampa	Majo
Messidor	Rikoltodona	Junio
Thermidor	Varmodona	Julio
Fructidor	Fruktodona	Aŭgusto

Ĉiu monato havis 3 dekojn da tagoj (3 Décades) kaj ĉiu tago havis nomon kiu indikis ĝian laŭnumeran vicon: Primidi, duodi, tridi, quatridi, quintidi, sextidi, octidi, nonidi, décadai. La nomoj de la sanktuloj el la gregoriana kalendaro estis anstataŭitaj per nomoj de floroj; fruktoj, legomoj, bestoj, metaloj kaj iloj agrikulturaj.

Diversaj landoj uzas ankoraŭ naciajn nomojn por la monatoj kiel ekzemple Ĉeĥoslovakio, Finnlando, Germanio kaj Litovio. La germanaj estas uzataj nur okaze, en poezio, malnovaj tekstoj kaj malofte en certaj regionoj.

Ĉeĥa:	Finna:	Germana:	Kroata:
Leden	Tammituu	Hartung	Sijeĉanj
Unor	Helmikuu	Hornung	Veljaĉa
Březen	Maaliskuu	Lenzing	Ožujak
Duben	Huhtikuu	Oster	Travanj
Květen	Toukokuu	Mai	Svibanj
Červen	Kesäkuu	Brachet	Lipanj
Červenec	Heinäkuu	Heuert	Srpanj
Srpen	Elokuu	Ernting	Kolovoz
Září	Syyskuu	Scheidung	Rujan
Rijen	Lokaku	Gilbhard	Listopad
Listopad	Marraskuu	Neblung	Studenj
Prosinec	Joulukuu	Jul	Prosinac

Litova:	Rusa:	Slavona:	Respondas al:
Sausis	Studenj	Prosinec	Januaro
Vasaris	Ljuty	Seĉenj	Februaro
Kovo men	Berezol	Suhj	Marto
Balandis	Dubenj	Cvetenj	Aprilo
Gegužės mėn	Travenj	Svibenj	Majo
Birželis	Červenj	Izok	Junio
Liepos mėn	Groznik	Lipec	Julio
Rugpjūtis	Zarnik	Serpenj	Aŭgusto
Rugsėjis	Veresenj	Rujen	Septembro
Spalių mėn	Padernik	Listopad	Oktoebro
Lapkritis	Grudenj	Studenj	Novembro
Gruodis	Prosinec	Grudenj	Decembro

Sezonoj.

Printempo: 21 Marto. *Aŭtuno:* 23 Septembro.
Somero: 22 Junio. *Vintro:* 22 Decembro.
 En la suda duonsfero la sezonoj estas inversaj.

La Eklezia Komputo.

La festoj de la Katolika Roma Eklezio estas ĉu neŝanĝeblaj t. e. ke ili okazas je sama dato, ĉu ŝanĝeblaj t. e. ke ili dependas ĉefe de la paska festo. Pasko estas fiksata de la *eklezia komputo* (lat.: *computare*, kalkuli) t. e. la kalkuloj servantaj reguligi la eklezian kalendaron. Laŭ la 1^a episkopa kunveno en Niceo (j. 325) Pasko devas esti festata la *1^{an} dimanĉon post la Plena Luno* kiu sekvas la printempan ekvinokson (tagnoktegalco) (nokto 20.—21. Marto). Pasko povas do okazi plej frue la 22^{an} de Marto, plej malfrue la 25^{an} de Aprilo. Tiu fiksado estas rezulto de aranĝo starigita ne atentante la astronomiajn fenomenojn.

La elementoj de la eklezia komputo estas notataj en la kalendaroj kaj varias ĉiujare. Por 1925, ekzemple, tiuj elementoj estas:

Ornombro	7
Epakto	5
Suna Ciklo	2
Indikcio	8
Dimanĉa litero	D

La ornombro estas luna ciklo el 19 julianaj jaroj (235 lunoj) post kiuj la samaj datoj de la monato korespondas je la samaj fazoj de la luno. Rigorsence ĝi indikis la daton de la suna monato kiam la luno estis nova. La Ĉinoj — kies historio datumas je 80000 aŭ 100000 jaroj konis tiun periodon. La greka astronomo Meton eltrovis ĝin en okcidento (432 jaroj antaŭ Kristo) kaj lia eltrovo estis skribita orlittere sur ĉiuj temploj. La *suna ciklo* estas periodo de 28 julianaj jaroj por kiu la jaro komencas per la sama semajntago kiel antaŭ 28 jaroj. La *dimanĉa litero* (A-G korespondanta je la datoj 1.—7. Januaro) indikas la daton de la unua januara dimanĉo. Kiam la jaro estas superjara oni donas du literojn. La dua tiam estas uzata nur de la 29 Februaro. En 1925 la dimanĉa litero estas D. La unua dimanĉo estas do la 4 de Januaro. Ĉiujare la dimanĉa litero malantaŭeniras je unu rango (2 rangoj por superjaro). La *roma indikcio* neniel utilas en la kalkulo de la pasko dato; ĝi estas uzata nur por starigi la datojn de la papaj bulloj. La *epakto* estas la nombro de tagoj pasintaj inter la lasta nova luno de la antaŭa jaro kaj la 1^a de Januaro de la priiraktita jaro. (En 1924 lasta nova luno la 26. Decembro.)

Festoj nefiksaj de 1920—1930.

Jaro	Pasko	Ĉiela Ascendo	Pentekosto	Unua Dimanĉo Adventa
1920	4. Aprilo	13. Majo	23. Majo	28. Novembro
1921	27. Marto	5. Majo	15. Majo	27. Novembro
1922	10. Aprilo	25. Majo	4. Junio	3. Decembro
1923	1. Aprilo	10. Majo	20. Majo	2. Decembro
1924	20. Aprilo	29. Majo	8. Junio	30. Novembro
1925	12. Aprilo	21. Majo	31. Majo	29. Novembro
1926	4. Aprilo	13. Majo	23. Majo	28. Novembro
1927	17. Aprilo	26. Majo	5. Junio	27. Novembro
1928	8. Aprilo	17. Majo	27. Majo	2. Decembro
1929	31. Marto	9. Majo	19. Majo	1. Decembro
1930	20. Aprilo	29. Majo	8. Junio	30. Novembro

Luno.

- ☾ NL = Nova luno.
- ☾ UK = Unua kvarono.

- ☽ PL = Plena luno.
- ☽ LK = Lasta kvarono.

Januaro	Februaro	Marto	Aprilo	Majo	Junio	Julio	Augusto	Septembro	Oktobro	Novembro	Decembro
2 UK	8 PL	2 UK	1 UK	1 UK	6 PL	6 PL	4 PL	2 PL	2 PL	8 LK	8 LK
10 PL	16 LK	10 PL	9 PL	8 PL	13 LK	12 LK	11 LK	10 LK	9 LK	16 NL	15 NL
18 LK	23 NL	17 LK	16 LK	15 LK	21 NL	20 NL	19 NL	18 NL	17 NL	23 UK	22 UK
24 NL		24 NL	23 NL	22 NL	29 UK	28 UK	27 UK	25 UK	24 UK	30 PL	30 PL
31 UK				30 UK					31 PL		

Eklipsoj 1925.

Dum 1925 okazas du suneklipsoj kaj du luneklipsoj.

1. 24 Januaro 1925 de l' 1 h 41 m ĝis 6 h 6 m posttagmeze plena suneklipso. Videbla en orienta parto de Norda Ameriko, en Centra Ameriko, en norda parto de Suda Ameriko, norda parto de l'Atlanta Oceano, en nordokcidenta parto de Afriko kiel en Centra kaj Okcidenta Eŭropo.

2. 8 Februaro 1925, de 9 h 9 m ĝis 12 h 15 m, vespere-matene, parta luneklipso, de $\frac{7}{10}$ de l' diametro. Videbla en la okcidenta parto de l' Pacifiko en okcidenta Aŭstralio, Azio, India Oceano, Afriko, Atlanta Oceano, Suda Ameriko kaj en orienta parto de Norda Ameriko.

3. 20—21 Julio 1925, 8 h 3 m vespere de l' 20 Julio ĝis 1 h 33 m matene de l' 21 Julio ringforma suneklipso. Videbla en nordokcidenta parto de Aŭstralio kaj en suda parto de Pacifika Oceano.

4. 4 Aŭgusto 1925, de 11 h 28 m ĝis 2 h 17 m tage, parta uneklipso kiu atingas $\frac{4}{5}$ de l'luna diametro. Videbla en okcidenta parto de Norda kaj Suda Ameriko, Pacifika Oceano, Aŭstralio, Orienta Azio kaj en India Oceano.

Mezuroj kaj Pezoj.

Metra sistemo.

La metra sistemo estas enkondukita en Franclando per leĝo de 7 Aprilo 1795 kaj estas deviga de 1837. Ĝi estas nun akceptita en ĉiuj Eŭropaj ŝtatoj (escepte Britlando, Greklando), en Meksiko, en la ŝtatoj de Centra kaj Suda Ameriko (escepte Bolivio, Paragvajo, Venezuelo). Ĝia uzado estas laŭvola en Bolivio, Britlando kaj kolonioj, Egipto, Greklando, Japanio, Paragvajo, Siamo, Turkio, Usono.

Pezo:

- 1 tuno (t) = 1000 kilogramoj.
- 1 kvintalo (kv) = 100 kilogramoj.
- 1 kilogramo (kg) = 1000 gramoj.
- 1 hektogramo (hg) = 100 gramoj.
- 1 dekagramo (dag) = 10 gramoj.
- 1 gramo (g) = pezo de 1 cm³ de distilata akvo je 4°.
- 1 decigramo (dg) = 0,1 gramo.
- 1 centigramo (cg) = 0,01 gramo.
- 1 miligramo (mg) = 0,001 gramo.

Enhavo:

- 1 kilolitro (kl) = 1000 litroj.
- 1 hektolitro (hl) = 100 litroj.
- 1 dekalitro (dal) = 10 litroj.
- 1 litro (l) = volumeno de 1 kg da akvo = 1 dm³.
- 1 decilitro (dl) = 0,1 litro.
- 1 centilitro (cl) = 0,01 litro.
- 1 mililitro (ml) = 0,001 litro.

Longo:

- 1 Miriametro (Mm) = 10 000 metroj.
- 1 kilometro (km) = 1000 metroj.
- 1 hektometro (hm) = 100 metroj.
- 1 dekametro (dam) = 10 metroj.
- 1 metro (m) = $\frac{1}{40000000}$ de la tergloba meridiano.
- 1 decimetro (dm) = 0,1 metro.
- 1 centimetro (cm) = 0,01 metro.
- 1 milimetro (mm) = 0,001 metro.

Areo:

- 1 hektaro (ha) = 10 000 metroj².
- 1 kvadratkilometro (km²) = 1 000 000 m².
- 1 aro (a) = 100 m².
- 1 centiaro (ca) } 1 m².
- 1 kvadratmetro }

Kio estas mejlo?

1 Angla	mejlo (1760 yards)	=	1609 metroj
1 Aŭstra	"	=	7586 "
1 Dana	"	=	7532 "
1 Finnlanda	" (nova)	=	10000 "
1 Franca	" (lieu)	=	4444 "
1 Geografia	"	=	7420 "
1 Hispana	"	=	7066 "
1 Prusa	"	=	7532 "
1 Mara	"	=	1852 "
1 Nederlanda	" (Kilometro)	=	1000 "
1 Norvega	"	=	11295 "
1 Sveda (Nova)	"	=	10000 "
1 Svisa	"	=	8054 "

Pezo de 1 kcm de diversaj substancoj.

Akvo	1 g.	Ligno: faga	0,7 g.
Alkoholo	0,79 "	" korka ŝelo	0,24 "
Arĝento	10,4 "	" kverka	0,7 "
Diamanto	3,5 "	Oliva oleo	0,92 "
Eburo	1,75 "	Oro	19,3 "
Etero	0,73 "	Petrolo	0,80 "
Fero	7,6 "	Plateno	21,3 "
Glacio	0,92 "	Plumbo	11,4 "
Gluo araba (nesolvita)	1,6 "	Sabloŝtono	2,5 "
Hidrargo	13,6 "	Salacido	1,2 "
Kalko	2,5 "	Salp. acido	1,5 "
Kamforo	0,98 "	Sango	1,055 "
Karbo, ŝtona	1,7 "	Stano	7,2 "
Kupro	8,8 "	Sukceno	2 "
Lakto (15 centigrada)	1,030 "	Sukero	1,606 "
Latuno	8,5 "	Sulfuracido	1,8 "
Ligno: Abia	0,5 "	Terebintoleo	0,87 "
" ebona	1,2 "	Zinko	7,1 "

Rapideco de diversaj objektoj dum unu sekundo.

Viro marŝanta 4 km dum unu horo	1,11 m
Viro marŝanta 5 km dum unu horo	1,39 m
Viro naĝanta	1,1 m
Ĉevalo trotanta	3—4 m
Ĉevalo galopanta	5—8 m
Ŝipo kun 9 nodoj en unu horo	4,63 m
Ŝipo kun 12 nodoj en unu horo	6,17 m
Biciklisto, 15 km en unu horo	4,17 m
Fervojvagonaro, 60 km en unu horo	16,47 m
Rapidvagonaro, 100 km en unu horo	27,78 m
Mara ondego	5—14 m
Modera vento	4—8 m
Aeroplano kun minima rapideco	14 m
Aeroplano kun maksima rapideco	135 m
Ventego	20—30 m
Aglo fluganta	24—30 m
Rapidega flugo de birdo, hirundo	89 m
La tero dum ĝia irado ĉirkaŭ la suno	29 600 m
Turniĝo de la tero ĉe la ekvatoro	465 m
La luno ĉirkaŭ la tero	1000 m
Rapideco de la suno en la universo	57 km
Bruo en la aero ĉe 0 grado	333 m
Lumo kaj elektraj ondoj	300 000 km

Diversaj unuoj.

Maraj: *Mejlo* ($\frac{1}{60}$ de grado) = 1852 m. — *Nodo* ($\frac{1}{120}$ de mejlo) = 15,435 m. — *Klafto* = 1,624 m. (Brita: 1,829 m).

La nombro de la nodoj mezurataj en 30 sekundoj respondas al la pohora rapideco esprimata per mejloj. La esprimo: Ŝipo faras 25 nodojn signifas 25 nodojn en 30 sekundoj = rapideco de 25 mejloj en unu horo (46,3 km).

La interna ŝipvolumeno, utila por transportado de komercaĵoj, estas mezurata per la internacia komerca tuno = 2,830 m³.

Por militŝipoj oni kalkulas la pezon *metraj tunoj* da 1000 kg en Francio aŭ per tunoj da 1016 kg en Brita Imperio kaj aliaj landoj.

Teknikaj: 1 *kalorio* (lat. calor = varmo) estas la varmokvanto necesa por varmigi 1 kg da akvo de 0° ĝis 1° C, granda kalorio; malgranda kalorio = la varmokvanto necesa por varmigi 1 g da akvo je 1° C.

1 *atmosfera premo* estas egala al la premo de hidrarga kolono alta 760 mm (meza barometra stato ĉe la maro) = la premo de 1,033 kg sur 1 cm².

1 *kilogrametro* estas la potenco necesa por levi 1 kg ĝis 1 m.

1 *ĉevalforto* (HP, t. e. *horse power* Angle) estas la potenco necesa por levi 75 kg ĝis 1 m dum 1 sekundo.

1 *ohmo* estas la elektra kondukrezisto, kiun produktas kolono de hidrargo longa 106,3 cm kaj ampleksa 1 mm² je 0° C.

1 *ampero* (unu de l'elektra fluforto) estas signata de la neŝanĝebla elektra fluo, kiu pasante tra akva solvaĵo de arĝentnitrato precipitas en 1 sekundo 0,001118 g da arĝento.

1 *volto* estas la elektromotora forto de fluo, kiu produktas 1 amperon je rezisto de 1 ohmo.

1 *wato* estas la potenco produktata de elektra forto je tensio de 1 volto kaj je fluforto de 1 ampero en sekundo. 1 wato = $\frac{1}{736}$ de ĉevalforto aŭ potenco necesa por levi 102 g ĝis 1 m dum 1 sekundo.

1 kilowato = 1000 watoj = 1,36 ĉevalforto.

Fandiga punkto de kelkaj substancoj.

Ŝtalo 1700—1900°, forĝofero 1300—1500°, griza ferfandaĵo 1200°, kupro 1065°, oro 1064°, blanka ferfandaĵo 1050°, arĝento 955°, zinko 419°, plumbo 322°, stano 241°, blanka vasko 68°, flava vakso 61°, glacio 0°, hidrargo —39°.

Vaporiga punkto de kelkaj likvaĵoj.

Hidrargo 357°, linoleo 315°, fosforo 290°, terebintoleo 157°, marakvo 104°, akvo 100°, salpetracido 86°, benzino 80°, alkoholo 78°, etero 35°.

Homa temperaturo.

La normala homa temperaturo varias inter 36,4° kaj 37,4° C, laŭ la horoj (plej alta punkto inter 6^h kaj 7^h vespere). Febra stato komenciĝas je 37,5° vespere aŭ 37° matene, 42° sekvigas morton.

Ekspansio de kelkaj korpoj.

Unu metra stango de jenaj objektoj, kun 0° ĉe 100° havas ekspansion de:

Arĝento	1,9 mm	Plumbo	2,8 mm
Fandfero	1,1 „	Stano	2,0 „
Kupro	1,7 „	Ŝtalo	1,2 „
Latuno	1,9 „	Vitro	0,8 „
Oro	1,4 „	Zinko	2,9 „
Plateno	0,9 „		

Unu litro da fluidaĵo kun 0° ĉe 100° varmigo havas ekspansion:

Akvo	43 cm	Hidrargo	18 cm
Olivoleo	80 „	Petrolo	100 „

Temperaturo.

Termometro.

La temperaturon oni mezuras per termometro. Tri skaloj estas uzataj.

Centigrado, ankaŭ nomata *Celsius* (C), laŭ la Sveda astronomo, kiu ĝin diskonigis en la plej multaj Eŭropaj landoj. La spaco inter la glaciĝa kaj vaporiga punkto de l'akvo estas dividata je 100 gradoj.

Réaumur (R), laŭ la nomo de la Franca fizikisto ĝin elpensinta. La spaco inter la glaciĝa kaj vaporiga punkto de l'akvo estas dividata je 80 gradoj. Por transformi temperaturon esprimitan per Réaumur-gradoj en centigradojn, oni multiplikas ĝin per 5 kaj dividas la produktan per 4. Uzata en Germanio kaj Ruslando.

Fahrenheit (F), laŭ la nomo de la Germana natursciencisto ĝin elpensinta. La spaco inter la glaciĝa kaj vaporiga punkto de l'akvo estas dividata je 180 gradoj. En tiu skalo, la glaciĝa punkto estas montrata per grado 32^a, la vaporiga punkto per grado 212^a. La skalo Fahrenheit estas uzata en Britaj landoj kaj en Usono. Por transformi temperaturon esprimitan per Fahrenheit-gradoj en centigradojn, oni subtrahas de ĝi 32 kaj multiplikas la restantan nombron per $\frac{5}{9}$.

Komparo de la Centgrada (Celsius), Reaumur'a kaj Fahrenheit'a Termometroj

(de -49° ĝis $+100^{\circ}$ C)

Cent.	Fahr.	Rmr.	Cent.	Fahr.	Rmr.	Cent.	Fahr.	Rmr.	Cent.	Fahr.	Rmr.
100	212	80	62	143,6	49,6	24	75,2	19,2	-13	8,6	-10,4
99	210,2	79,2	61	141,8	48,8	23	73,4	18,4	-14	6,8	-11,2
98	208,4	78,4	60	140	48	22	71,6	17,6	-15	5	-12
97	206,6	77,6	59	138,2	47,2	21	69,8	16,8	-16	3,2	-12,8
96	204,8	76,8	58	136,4	46,4	20	68	16	-17	1,4	-13,6
95	203	76	57	134,6	45,6	19	66,2	15,2	-18	nulo	-14,4
94	201,2	75,2	56	132,8	44,8	18	64,4	14,4	-19	-2,2	-15,2
93	199,4	74,4	55	131	44	17	62,6	13,6	-20	-4	-16
92	197,6	73,6	54	129,2	43,2	16	60,8	12,8	-21	-5,8	-16,8
91	195,8	72,8	53	127,4	42,4	15	59	12	-22	-7,6	-17,6
90	194	72	52	125,6	41,6	14	57,2	11,2	-23	-9,4	-18,4
89	192,2	71,2	51	123,8	40,8	13	55,4	10,4	-24	-11,2	-19,2
88	190,4	70,4	50	122	40	12	53,6	9,6	-25	-13	-20
87	188,6	69,6	49	120,2	39,2	11	51,8	8,8	-26	-14,8	-20,8
86	186,8	68,8	48	118,4	38,4	10	50	8	-27	-16,6	-21,6
85	185	68	47	116,6	37,6	9	48,2	7,2	-28	-18,4	-22,4
84	183,2	67,2	46	114,8	36,8	8	46,4	6,4	-29	-20,2	-23,2
83	181,4	66,4	45	113	36	7	44,6	5,6	-30	-22	-24
82	179,6	65,6	44	111,2	35,2	6	42,8	4,8	-31	-23,8	-24,8
81	177,8	64,8	43	109,4	34,4	5	41	4	-32	-25,6	-25,6
80	176	64	42	107,6	33,6	4	39,2	3,2	-33	-27,4	-26,4
79	174,2	63,2	41	105,8	32,8	3	37,4	2,4	-34	-29,2	-27,2
78	172,4	62,4	40	104	32	2	35,6	1,6	-35	-31	-28
77	170,6	61,6	39	102,2	31,2	1	33,8	0,8	-36	-32,8	-28,8
76	168,8	60,8	38	100,4	30,4	nulo	32	nulo	-37	-34,6	-29,6
75	167	60	37	98,6	29,6	-1	30,2	-0,8	-38	-36,4	-30,4
74	165,2	59,2	36	96,8	28,8	-2	28,4	-1,6	-39	-38,2	-31,2
73	163,4	58,4	35	95	28	-3	26,6	-2,4	-40	-40	-32
72	161,6	57,6	34	93,2	27,2	-4	24,8	-3,2	-41	-41,8	-32,8
71	159,8	56,8	33	91,4	26,4	-5	23	-4	-42	-43,6	-33,6
70	158	56	32	89,6	25,6	-6	21,2	-4,8	-43	-45,4	-34,4
69	156,2	55,2	31	87,8	24,8	-7	19,4	-5,6	-44	-47,2	-35,2
68	154,4	54,4	30	86	24	-8	17,6	-6,4	-45	-49	-36
67	152,6	53,6	29	84,2	23,2	-9	15,8	-7,2	-46	-50,8	-36,8
66	150,8	52,8	28	82,4	22,4	-10	14	-8	-47	-52,6	-37,6
65	149	52	27	80,6	21,6	-11	12,2	-8,8	-48	-54,4	-38,4
64	147,2	51,2	26	78,8	20,8	-12	10,4	-9,6	-49	-56,2	-39,2
63	145,4	50,4	25	77	20	—	—	—	—	—	—

Dispartigo de tero kaj akvo.

La surfaco de la tero estas 509 950 943 km²; de tiu sumo 151 482 943 km² estas firma tero, kaj 358 468 000 km² akvo.

Divido: Tero:

Eŭropo	10 364 047 km ²
Azio	43 802 806 "
Afriko	30 773 985 "
Ameriko	38 655 323 "
Aŭstralio	8 951 782 "
Polusoj	18 935 000 "
Sumo: 151 482 943 km ²	

Akvo:

Granda (Pacifika) Oceano	174 450 000 km ²
Atlantika Oceano	89 580 000 "
Hinda Oceano	74 646 000 "
Norda Glacia Maro	12 722 000 "
Suda Glacia Maro	7 070 000 "
Sumo: 358 468 000 km ²	

Diversaj longoj kaj mezuroj de la tero.

Amplekso de la tera ekvatoro	40 070 km
Diametro de l'ekvatoro	12 754 km
Rotacia Akso de la tero	12 712 km
$\frac{1}{15}$ de unu ekvatora grado = 1 geografia mejlo =	7 420,4 m
$\frac{1}{60}$ de unu ekvatora grado = 1 mara mejlo =	1 855,1 m
Longo de paralela grado ĉe l'ekvatoro	111,3 m
Surfaco de la tero	509 950 943 km ²

Geologia Skemo.

Epoko	Formacioj	Etaĝo	KARAKTERIZO		
			Sedimento, ŝtonoj	Bestaro	Floraro
Kvaternara = la kvara epoko.	Pleistoceno.	Aluvo. Diluvo.	Nuntempa. Leŭso, ŝlimoj, torfo.	Nuntempa. Stepa. Mamuto, elefanto.	Nuntempa. Nordaj plantaĵoj; komenco de nuna floraro.
Terciara = la tria epoko.	Juna terciara. Antikva terciara.	Plioceno.	Rulŝtonoj, Dinotercaj sabloj, Glaciejaj rokoj, ardeza karbo.	Hipariono, konkvoj, Mastodono, Dinoterio, Mambestoj.	Palmoj, Foliarboj, poplo, betulo.
		Mioceno.	Formado de brunkarbo grejzo, lignito, kalkŝtonoj.	La sama.	La sama.
		Qligoceno.	Sabloj, kalkŝtono, marnoj Gipso, sukceso, saksabrunkarbo.	Mambestoj, Paleoterio, Koraloj, Helikoj, Numulitoj.	Tropika. Palmsimilaj arboj. Marĉa cipreso, Laŭro, Figo k. a.
		Eoceno.	Marnsimilaj argiloj, lignitoj, grejzoj, kalkoj. Brun-kreto, glaŭkonito. [karbo.	La sama.	La sama.
Sekundara = la dua epoko.	Kretacea (Supra kaj malsupra kreta formacioj).	Senona.	—	Amonitoj, Belemnitoj, Konkvoj, Spongoj, Foraminiferoj.	Unuaj foliaraj arboj (Credneria).
		Turona. Cenoman. Gaŭlta. Neokoma	Sabloj (Essen, verda grejzoj, Argiloj. Klorecaj marnoj. Wealda argilo, sabloj kaj konglomeratoj.	La sama.	La sama.
	Ĵurasa.	Malmo (Portlanda, Kimeriĝa, Korala, Oksforda).	Korala kalko, Solnhofena kalko, Oolitoj, Marnoj, grejzoj kalkecaj.	Prabirdo Archeopterix, Dinosaurioj, flugantaj saŭroj (Pterodactylus), Krokodiloj.	Koniferoj, ekvisetoj, filikoj Cikadeoj, Filikoj, Cikadeoj, Koniferoj.
		—	—	—	—

30

Primara = la unua epoko [Transira].	Liaso.	Liaso — Sine-mura.	Argilmarno, Kalkoj, argiloj, Oolitoj, grejzoj.	Saŭrioj, ŝaĵoj (Ĥtiosauŭro, Plesiosauŭro), Amonitoj, Belemnitoj, Konkvoj, Brakioopodoj.	La sama.
	Triaso.	Triaso (Salhava, muŝelkalka Koecilia).	(Keŭper) Grejzo, Argilardezo, Gipso, Marno, Salo, Karbo, Kalkoj, Muŝelkalko, Dolomito.	Mambestoj, Reptilioj, Labirintodontoj, Mastodoncj, Krustacoj, Konkvoj, Kefalopodoj, Krinoidoj, Fiŝoj.	Ekvisetoj, filikoj (Lepidoptero, Daneops).
	Diaso aŭ Permo.	(Zechstein).	Ruĝa grejzo (Zechstein), Kalkŝtonoj, Ŝtonsalo (Stassfurt), Konglomeratoj, Kuprardezo.	Saŭrioj, Fiŝoj, Brakioopodoj, Stegokefaloj (Bronkiosauŭro).	Kalamitoj, Algoj, Koniferoj, iafoje Sigilarioj.
	Karbono.	Supra kaj malsupra.	Grejzo, ardezo, ŝtonkarbo, Arkoj, Graŭvako, k. t. p.	Stegokefaloj, Fiŝoj, Krinoidoj, Trilobitoj, Koraloj.	Kriptogamoj, Kalamitoj, Sigilarioj, Lepidodendrono.
	Devono.	Supra kaj malsupra Devono.	Kvarcito, grejzo, Kalko, Konglomeratoj, Ruĝa Grejso.	Kirasfiŝoj, Trilobitoj, Brakioopodoj, Tentakulidoj	Unuaj maloftaj terplantaĵoj, Maralgoj-Fukoj.
	Siluro.	Supra kaj malsupra Siluro.	Graŭvako, Diabaso, Kalko. Ardeza skistoj.	Preskaŭ nur maraj. Ekinoideoj, Trilobitoj, k. t. p.	Maralgoj.
	Kambrio.	Supra, meza kaj malsupra Kambrio	Kvarcito, glimmarmoro, Gnejso, Grejso, Kalko.	La sama.	Fukoj.
	Laŭrentio.	Supra kaj malsupra Laŭrent.	Gnejso, Labradorito, Kvarcito, Kalkŝtonaĵoj.	Vermoj, Trilobitoj.	—
Primitiva Azoa = senviva.	—	—	Erupeciaĵoj. Kristalecaj Ardezoj, Glimardezo, Gnejso, Granito, Porfiro.	Sen organa vivo.	Sen organa vivo.

31

La Kemiaj Elementoj.

1924.28

Specifa pezo ĉe elementoj, dum la ordinara temperaturo gasaj, indikas ilian pezon dum fluida stato.

La nomoj de elementoj estas laŭ "Esperanta nomenklaturado de kemio" redaktita de "Scienca kaj teknika komisiono" de la "Internacia Scienca Asocio" jaro 1913. La atomezoj kaj preferataj nomoj estas laŭ oficiala tabelo por jaroj 1921 kaj 1922 (ĝis nun valida) de "Internacia Komisiono por la atomezoj" (Subskribita: Clarke, Thorpe, Urbain).

Nomo	Etimologio	Simbolo	Atom-pezo	Atoma nombro	Specifa pezo	Fanda temperaturo	Trovinto kaj dato de eltrovo
Aluminio	lat.: <i>alumen</i> , aluno	Al	27,0	13	2,58	627 ⁰	Woehler 1828
Antimono	lat.: <i>antimonium</i> , Stibi = antimonnigro	Sb	120,2	51	6,7	630 ⁰	Konata en la antikva epoko (?)
Argono	gr.: <i>an</i> , ne; <i>ergon</i> , fano	A	39,9	18	—	—188 ⁰	Rayleigh 1894
Arĝento	lat.: <i>argentum</i>	Ag	107,88	47	10,5	962 ⁰	Prahistorie konata
Arseno	gr.: <i>arsenikon</i>	As	74,96	33	5,73	—	Albertus Magnus 13. jc.
Bario	gr.: <i>barys</i> , peza	Ba	137,37	56	3,78	850 ⁰	Davy 1808
Bismuto	germ.: <i>nekonata deveno</i>	Bi	209,0	83	9,78	264 ⁰	"Basilius Valentinus", fino de 16. jc.
Boro	<i>Borax</i>	B	10,9	5	2,45	tre alta	Gay-Lussac kaj Thé- nard, kom. de 19. jc.
Bromo	gr.: <i>bromos</i> , aĉodoro	Br	79,92	35	3,19	7,2 ⁰	Balard 1826
Cerio	Diino Ceres	Ce	140,25	58	7,04	623 ⁰	Berzelius, Hisinger, Klaproth 1803
Cezio	lat.: <i>caesius</i> , grizblua	Cs	132,81	55	1,87	285 ⁰	Bunsen, Kirchhoff 1860
Disprozio	gr.: <i>dysprosodos</i> , mal- facile atingebla	Dy	162,5	66	?	?	Lecoq de Boisbodran 1886

32

Erbio	Ylterby, sveda urbo	Er	167,7	68	?	?	Mosander 1843
Eŭropio	Eŭropo (mondparto)	Eu	152,0	63	?	?	Demarcay 1900
Fero	lat.: <i>ferrum</i>	Fe	55,84	26	7,84	1529 ⁰	Prahistorie konata
Fluoro	lat.: <i>fluo</i> , mi fluas	F	19,0	9	1,108	—233 ⁰	Davy 1813, 1814
Fosforo	gr.: <i>lumportanto</i>	P	31,04	15	1,82	44,5 ⁰	Brandt 1669
Gadolinio	Gadolin, trovinto de Itrio	Gd	157,3	64	?	?	Marignac 1880
Galio	<i>Gallia</i> , malnova nomo de Francio	Ga	70,1	31	5,93	30,1 ⁰	Lecoq de Boisbodran 1875
Germanio	<i>Germania</i>	Ge	72,5	32	5,47	900 ⁰	Winkler 1886
Glucinio (Berilio)	gr.: <i>glykys</i> (dolĉa)	Gl	9,1	4	1,85	1000 ⁰	Wöhler kaj Bussy 1828
Heliumo	gr.: <i>helios</i> , suno	He	4,00	2	—	?	Ramsay 1895
Hidrargo	gr.: <i>hydor</i> , akvo, <i>argyros</i> , arĝento	Hg	200,6	80	13,596	—38,9 ⁰	En antikva epoko konata
Hidrogeno	gr.: kiu produktas akvon	H	1,008	1	0,076	—259,9 ⁰	Cavendish 1781
Holmio	Lasta silabo de Stock- holm	Ho	163,5	67	?	?	Cleve 1879
Indio	kun indigoblua spektro	In	114,8	49	7,4	176 ⁰	Reich kaj Richter 1863
Iridio	lat.: <i>iris</i> , ĉielarko	Ir	193,1	77	22,38	2360 ⁰	Tennant 1802
Iterbio	Ytterby, sveda urbo	Yb	173,5	70	?	?	Marignac 1880
Itrio	Ytterby, sveda urbo	Y	89,33	39	?	?	Gadolin 1794
Jodo	gr.: <i>ioeides</i> , violkolora	J	126,97	53	4,93	114 ⁰	Courtois 1811
Kadmio	gr.: <i>kadmeia</i> , kalamino	Cd	112,40	48	18,64	321,7 ⁰	Stromeyer 1817
Kalcio	lat.: <i>calx</i> , kalko	Ca	40,07	20	1,52	800 ⁰	Davy 1808
Kalio (Potasio)	arabe: <i>kali</i> , sodo	K	39,10	19	0,863	62,5 ⁰	Davy 1807
Karbo	lat.: <i>carbo</i> , karbo	C	12,005	6	3,52	3500 ⁰	Prahistorie konata
Kloro	gr.: <i>hloros</i> = duonverda	Cl	35,46	17	3,17	—102 ⁰	Scheele 1774
Kobalto	germ.: <i>Kobold</i> , koboldo	Co	58,97	27	8,9	1490 ⁰	Brandt 1735
Kolumbio (Niobio)	Mineralo: Kolumbito	Cb	93,11	41	12,7	1950 ⁰	Hatchett 1801
Kriptono	gr.: <i>kryptos</i> , kaŝita	Kr	82,92	36	?	?	Ramsay kaj Travers 1896

33

La Kemiaj Elementoj.

Nomo	Etimologio	Simbolo	Atoma-pezo	Atoma nombro	Specifa pezo	Fanda temperaturo	Trovinto kaj dato de trovo
Kromo	gr.: <i>chroma</i> , koloro	Cr	52,0	24	6,92	1600 ⁰	Vanquelin 1797
Ksenono	gr.: <i>xenos</i> , fremda	Xe	130,2	54	—	—	Ramsay kaj Travers 1897
Kupro	Insulo <i>Cyprus</i> (lat.)	Cu	63,57	29	8,95	1084 ⁰	Prahistorie konata
Lantano	gr.: <i>lanthanein</i> , kaŝi	La	139,0	57	6,16	810 ⁰	Mosander 1839
Litio	gr.: <i>lithos</i> , ŝtono	Li	6,94	3	0,53	186 ⁰	Arfvedson 1817
Lutecio	lat.: <i>Lutetia</i> , antikva Paris	Lu	175,0	71	?	?	Urbain 1907
Magnezio	<i>Magnesia</i> (Tessalio)	Mg	24,32	12	1,75	800 ⁰	Davy 1820
Mangano	lat.: <i>magnes</i> , magneto	Mn	54,93	25	7,4	1245 ⁰	Gahn 1774
Molibdo	gr.: <i>molybdos</i> , plumbo	Mo	96,0	42	9,0	2600 ⁰	Hjelm 1782
Natrio (Sodo)	hisp.: <i>natron</i> , sodo	Na	23,00	11	0,98	97 ⁰	Davy 1807
Neodimo	gr.: <i>didymos</i> , dunaskito, <i>neos</i> , nova	Nd	144,8	60	6,96	840 ⁰	Brauner 1882
Neono	gr.: <i>neos</i> , nova	Ne	20,2	10	?	?	Ramsay kaj Travers 1896
Nikelo	germ.: Nickel	Ni	58,68	28	9,0	1452 ⁰	Cronstedt 1751
Nitono (radiuma emanajo)	gr.: <i>nitein</i> , rezisti	Nt	222,4	86	?	?	E. Dorn 1900
Nitrogeno (Azoto)	lat.: <i>nitrum</i> , elflorajo	N	14,008	7	?	—213 ⁰	Rutherford 1772
Oksigeno	gr.: acidproduktanta	O	16,00	8	1,18	—227 ⁰	Prisley 1774
Oro	lat.: <i>aurum</i>	Au	197,2	79	19,3	1062,3 ⁰	Prahistorie konata
Osmio	gr.: <i>osmé</i> , odoro	Os	190,9	76	22,4	2508 ⁰	Tennant 1802
Paladio	Planedo Pallas	Pd	106,7	46	11,9	1549 ⁰	Wollaston 1803
Platino	hisp.: diminutivo de <i>Plata</i> , arĝento	Pt	195,2	78	21,45	1750 ⁰	Blondeau 1774
Plumbo	angl. saks.: <i>Plumbum</i>	Pb	207,2	82	11,37	327 ⁰	Prahistorie konata
Prazeodimo	gr.: verda didimo	Pr	140,9	59	6,48	940 ⁰	Brauner 1882

Radiumo	lat.: <i>radius</i> , radio	Ra	226,0	88	?	700 ⁰	Curie 1898
Rodio	gr.: <i>rodeos</i> , rozkolora	Rh	102,9	45	12,6	1970 ⁰	Wollaston 1803
Rubidio	lat.: <i>rubidius</i> , ruĝa	Rb	85,45	37	1,53	38 ⁰	Bunsen 1861
Rutenio	lat.: <i>Ruthenia</i> , Ruslando	Ru	101,7	44	12,26	1800 ⁰	Claus 1845
Samario	<i>Samarŝki</i> , rusa scienculo	Sa	150,4	62	?	?	Lecoq de Boisbodran 1879
Selenio	gr.: <i>selene</i> , luno	Se	79,2	34	4,3	219 ⁰	Berzelius 1817
Silicio	lat.: <i>silex</i> , kvarco	Si	28,1	14	2,5	1600 ⁰	Berzelius 1823
Skandio	Skandinavio	Sc	45,1	21	?	?	Nilson 1879
Stano	angl. saks.: <i>Stannium</i>	Sn	118,7	50	7,29	231,5 ⁰	Prahistorie konata
Stroncio	Strontian, Skota urbo	Sr	87,63	38	2,6	800 ⁰	Davy 1808
Sulfuro	lat.: <i>sulphur</i>	S	32,06	16	2,07	114 ⁰	Prahistorie konata
Taliumo	gr.: <i>thalos</i> , arbotranĉo (verda)	Tl	204,0	81	11,85	290 ⁰	Crookes 1861
Tantalo	Tantalo (greka mitologio)	Ta	181,5	73	16,6	2275 ⁰	Ekeberg 1802
Teluro	lat.: <i>tellus</i> , tero	Te	127,5	52	6,0	450 ⁰	Reichstein 1783
Terbio	El elemento Iterbio	Tb	159,2	65	?	?	Urbain 1905
Titano	lat.: <i>Titanes</i> , grandeguloj	Ti	48,1	22	4,50	1850 ⁰	Gregor 1782
Torio	Dio <i>Thor</i>	Th	232,15	90	11	1700 ⁰	Berzelius 1828
Tulio	<i>Thule</i> , negastema fremdlando	Tm	169,9	69	?	?	Cleve 1879
Uranio	Planedo Uranus	U	238,2	92	18,5	1850 ⁰	Klaproth 1879
Vanado	Diino <i>Vanadis</i> (Freya)	V	51,0	23	5,69	1715 ⁰	del Rio 1803
Volframo (Tungsteno)	<i>Wolfram</i>	W	184,0	74	19	3330 ⁰	Scheele 1781
Zinko	germ.: <i>Zink</i>	Zn	65,37	30	6,9	419 ⁰	Konata en Ĉinio en 6. jc. p. K.
Zirkonio	persa: <i>Zarkun</i> , orkolora	Zr	90,6	40	6,4	2350 ⁰	Berzelius 1824

Kelkaj progresoj de la civilizo.

Agrikulturo.

Draŝmaŝino estis konstruita en 1786 de skoto Andrew Meikle. De la 18^a jarcento oni uzis pli kaj pli agrikulturajn maŝinojn.

Amuzado.

Aŭtomatoj. Ĉ. 150 j. a. K. Heron, eminenta greka mekanikisto, konigas centojn da praktikaj provoj. Li eltrovis la Heron-fonton kaj Heron-bulon, la vaporturbon, konstruis aŭtomatojn inter kiuj unu kiu post enĵeto de 5 draĥman moneron spruĉis akvon.

Astronomio.

Astronomio. 130 j. a. K. greko Hipparchos fondis la sciencan astronomion kaj priskribis 1080 situaciojn de steloj.

Eklipsoj. En 585 a. K. Tales el Milet trovas la kaŭzon de la sun — kaj luneklipsoj kaj observas la altiran forton de la magneta fero.

Gravitacia leĝo estis eltrovita en 1682 de angla fizikisto kaj astronomo Newton.

Mondsistemo de la astronomo Koperniko laŭ kiu la suno estas la centra korpo ĉirkaŭ kiu la tero kaj la aliaj planedoj sin turnas (1543).

Movado de la tero ĉirkaŭ la suno estis pruvita de la greka astronomo Aristarchos el Samos, 260 j. a. K.

Observatorio. En 1471 Regiomontanus kaj Walther fondas la unuan stelobservejon en Nürnberg. (Regiomontanus nomiĝis fakte Johannes Müller; pro lia deveno el Königsberg li nomigis sin latine Regiomontanus).

Rondformo de la tero estas pruvita de Aristoteles, 334 j. a. K. Li klarigas la antaŭan fanditan staton de la tero, la kondukon de la sono tra la aero, kalkulas la plirapidigon de libere falantaj objektoj, la poŝtecon de la levilo kaj fondas zoologion.

Rondformeco de la tero estis eltrovita 535 j. a. K. de Pythagoras, grek filozofo. Li eltrovis ke la matena- kaj vespera steloj estas la sama stelo (Venus).

Rondlinio de la tero estis kalkulita de Archytas, greka matematikisto, 390 j. a. K. Li progresigis mekanikon per matematiko. Li eltrovis la ŝraŭbon.

Sunhorloĝo. Ĉ. 1100 j. a. K. La unua sunhorloĝo estis menciita de la ĉinoj. Ĉ. 600 j. a. K. la Asirianoj eltrovis la akvan horloĝon.

Tajdo. 334 j. a. K. Pytheas greka marvojaĝisto, astronomo kaj geografo, rekonas la dependon de la tajdo laŭ la troviĝo de la luno.

Turniĝo de la tero. 325 j. a. K. Heraklides klarigas la ŝajnan turniĝon de la ĉielsfero per la taga turniĝo de la tero sur sia propra akso.

Belartoj.

Bizantia kaj Romana arto. 1000—1200. Epoko de la bizantia kaj romana stiloj kiuj sekvis la malnovan kristanan stilon.

Gotika stilo. La floranta epoko de la gotika stilo estis 1250—1350.

Renesanca stilo. Ĉ. 1420. Komencis la renesanca stilo. Frua renesanco: 1420 ĝis 1500. Alta renesanco: 1500 ĝis 1580. Baroka stilo: 1580 ĝis 1800.

Skulptarto romana. 146 j. a. K. Komencis la floranta periodo de la romana skulptarto (post la konkero de Greklando).

Skulptarto. 580 j. a. K. Komenco de la flora periodo de greka skulptarto kiu ĉesis 146 j. a. K.

Botaniko.

Botaniko. 320 j. a. K. Theophrastos greka filozofo, komencis la studon de la kreskaĵoj kaj plantis la unuan botanikan ĝardenon.

Teo. La unua teo estis alportita al Eŭropo en 1610 de Holandanoj el Azio kie ĝi estis konata jam en la VI^a jarcento. Oni trovis ĝin en Paris en 1635, en Ruslando en 1638, en Anglando en 1650.

Terpomo. En 1584 la terpomoj estis alportitaj Eŭropon el Ameriko de Walter Raleigh kaj rekomenditaj por plantado. Franz Drake helpis multe por ilia konatigo. Parmentier konigis ilin en Francio, la fizikisto Volta en Supra Italio, Frederiko la Granda en Prusio.

Kafo. Veneziaj komercistoj alportis el Arabio la unuan kafon al Eŭropo en 1624.

Kotono. Ĉ. 200 j. La kotonarbo estis alportita de ĝia hejmlando Hindio al Greklando, de Aleksandro. La kotona industrio enkondukita de la araboj, aperis ĉ. 1300 en Hispanio.

Fabrikado.

Amalgamado. 1557. Oni ekstraktis oron kaj arĝenton per amalgamado. Disigo de la metalo el ĝia minaĵo pere de hidrargo kiu dissolvigas la metalon kaj poste estas redistilata.

Betsukero. En 1747 Marggraf germana kemiisto eltrovas ke la betoj enhavas sukeron. Achard konstruis en 1801 en Silezio la unuan fabrikon de betsukero.

Cemento. En 1759 anglo Smeaton eltrovis la fabrikadon de cemento, jam konita de la Romanoj. Li rimarkis, ke la mortero preparita el brulita, argilhavanta kalko, plimalmoliĝis ankaŭ subakve (uzita unue en 1774 por la konstruo de la lumturo Eddystone). Post tio Parker fabrikis la ŝatatan "Romanan Cementon" kies fabrikado rapide

enkondukiĝis en aliaj landoj. En 1824, anglo Aspdin sukcesis fabriki la bonegan "Portland-Cementon".

Fando de metaloj. La unua privilegio por fando estis donita en 1620. Perfektiĝoj: 1722, ŝtalpatento Réaumur; 1740. Fandita ŝtalo en fandvazoj, Huntsman; 1856 Bessemerŝtalo; 1865 Martinŝtalo.

Fando de speguloj kaj fenestraj vitroj estis eltrovita de Lukas el Nehon (1688).

Glazuro. 3500 j. a. K. La Egiptanoj fabrikis potojn glazuritajn. Tiu tekniko estis konita en okcidento nur dum la Mezepoko (1299).

Ligna papero. 1843. Post multaj antaŭaj provoj fari paperon el ligno, pajlo aŭ folioj, germana laboristo Keller sukcesis trovi taŭgan lignan kaĉon (celulozo) dum li akriĝis lignon sur akriĝŝtono. La eltrovo akiris nemezureblan signifon por la paperfabrikado.

Nikelo. Cronstedt kaj Bergmann eltrovis en 1751 nikelon kiu antaŭe ne povis esti disigita de la kruda minaĵo kaj estis konsiderita de la ministoj kiel malbona kupra minaĵo. Richter en Berlin produktis la unuan fojon en 1804 puran nikelon (mondprodukto 1840: 100 tunoj; 1904: 12 000 tunoj).

Papero. 751. La persoj kaj araboj lernis de ĉinaj kaptitoj la malnovan ĉinan arton fabriki paperon. En 794 estis ŝtata paperfabrikejo el ĉifonoj en Bagdad. Plej malnovaj konservitaj paperdokumentoj: itala 1267, angla 1272, germana, 1302.

Porcelano. En 1708 Boettger kaj Tschirnhaus sukcesis fari porcelanon identan je tio de la ĉinoj (eltrovita en 1617) en la kastelo Meissen (Sachsen).

Porcelano. 617 j. estis eltrovita en Ĉinlando. Porcelanaĵoj ĉinaj estis alportitaj Eŭropon unuan fojon fine de la XVI^a jarcento.

Poŝhorloĝo. 1510. La eltrovinto de la poŝhorloĝo estis Peter Henlein en Nürnberg. Ĝi funkciis 40 horojn.

Potturnilo. 5000 j. a. K. la Egiptoj jam uzis ĝin por la fabrikado de argilaj potoj.

Skribplumoj ŝtalaj. En 1828 Gillot komencis en Birmingham la mekanikan fabrikadon de ŝtalplumoj; tiu industrio grandege disvolviĝis per la eltrovo de Perry t. e. fari truon kaj fendon en la plumo. Metalaj plumoj estis jam antaŭe fabrikitaj mane sed ne sukcesis pro la kosto, anstataŭ la anserplumon.

Sulfurkaŭĉuko (vulkanizita). En 1839 amerikano Goodyear eltrovis la vulkanizitan kaŭĉukon.

Vitrofabrikado. C. 1800 j. a. K. eltrovita de la Egiptoj. 100 j. a. K. vitraj speguloj anstataŭ la pli malnovaj metalaj speguloj, estis uzitaj de la egiptoj.

Fiziko.

Barometro. Torricelli, itala matematikisto kaj fizikisto eltrovas la aerpezon kaj konstruas la barometron. En 1648 Pascal kaj Perrier eltrovas la mezuron de la alteco pere de la barometro.

Elektra kondukilo. En 1727 anglo Gray observas la kondukeblecon de elektro per 130 m. longa fadeno. En 1730 franco Du Fay distingas pozitivan kaj negativan elektron.

Frota elektra maŝino. La unua estis eltrovita en 1663 de Otto von Guericke en Magdeburg (frotita sulfurbulo). En 1755 la elektra maŝino kun vitra disko estis eltrovita de Martin Planta, pastro en Zizers (Svislando, Grizono).

Hidrga termometro. Fahrenheit el Danzig ĝin eltrovis en 1714. Samjare Réaumur ĝin dividis en 80 gradoj. En 1742 sveda sciencisto Celsius ĝin dividis en 100 gradoj laŭ indiko de botanisto Linné.

Lenso. La arabo Alhazen faris en 1050 gravajn optikajn serĉojn kaj eltrovis la lenton uzante sfertranĉaĵojn kiel plidikigitaj vitroj.

Leyden'a botelo por akumulo de elektro estas eltrovita en 1745 de Cunaeus en Leiden, sen ke li konis la eltrovon de la unua.

Lorno. 1608. La lorno estis eltrovita de la holandano Lippershey. Galilei kiu aŭdis pri tiu sensacia eltrovaĵo, konstruis en 1610 lornon kiu ebligis al li siajn plej gravajn eltrovojn. En 1611 Kepler eltrovis a astroman lornon.

Pezperdo de naĝantaj objektoj, pezcentro de objektoj, forto de la leviloj. 260—212 j. a. K. Archimedes el Siracusa, la plej genia matematikisto kaj fizikisto de la antikveco skribis eminentajn verkojn pri ĉi tiuj temoj. Li eltrovis la puliaron, la senfinan ŝraŭbon, la brulantan spegulon ktp.

Specifa pezo. 1120. La arabo Alkazin serĉas la specifan pezon de la materioj. Lia peziĵo devis esti mirinda mekanikaĵo ĉar liaj ciferoj ankoraŭ valoras nun ĝis la tria decimala cifero.

Spektra analizo estis eltrovita en 1859 de germanaj fizikistoj Bunsen kaj Kirchhoff. Konstato de la strukturo de brulanta materio komponante ĝiajn lumradiojn per prismo, per kio la strukturo de la astroj povas esti difinitaj.

Fotografarto.

Fotografarto. En 1838 Daguerre, franca dekoracia pentristo elpensas utiligante la studojn de Niepce la fotografarton (dagerotipio, bildoj sur vitro). Talbot en London sukcesis en 1839 kopii fotografajn sur papero. En 1908 gefratoj Lumière en Lyon eltrovis la kolorfotografajn sur vitro.

Geografio.

Ameriko. 1492—1506. Kvar esplorvojaĝoj de Genovano Kristoforo Kolombo, ekipita de Reĝo Ferdinand el Hispanio, Kolombo volis atingi Hindion, kaj Japanion, la fabelaj landoj pri kiuj Marco Polo parolis, per vojaĝo al Okcidento. Tiamaniere li eltrovis Amerikon.

Aŭstralio. 1605. La Holandanoj atingas Aŭstralion kiu en 1601 estis la unuan fojon viditan el ŝipo de Portugalio. Esplorado de Aŭstralio komencis de la fino de la 18^a jarcento.

Ĉirkaŭveturo de Afriko estis plenumita de feniciaj ŝipistoj laŭ ordono de Nechos, egipta reĝo. Nur 2000 jaroj pli malfrue (1486) Bartolomeo Diaz ĉirkaŭveturis ree la kabon de Bona Espero.

Esplorvojaĝoj al Centra-Azio, de Marco Polo el Venezia okazis en 1271—1295.

Gotthardfervojo estis uzita en 1882. Ekzistas 80 tuneloj kies ĉefa estas 14984 m. longa. Ĝi estis komencita en 1872. La konstruisto estis inĝeniero Louis Favre el Chêne-Bourg-Genève.

Oceano. 1768—79. James Cook faris rondvojaĝon ĉirkaŭ la mondo. Esploro de la aŭstraliaj insuloj.

Orientaj Indioj. 1498. La portugalo Vasco da Gama eltrovas la marvojon al Orientaj Indioj kie li fondas portugaliajn koloniojn.

Panamakanalo estis malfermita en 1914. Ĝi havas 80 km. longeco kaj unuigas Atlantikon kun la Pacifika Oceano. Oni komencis la laborojn en 1881 (franca inĝeniero de Lesseps). La laboroj estis finitaj de la usona komandanto Goethals.

Polusoj. En 1909 amerikano Peary atingas la 6^{an} de aprilo la nordan poluson. En 1911 norvego Roald Amundsen atingas la 14^{an} de decembro la sudan poluson.

Suezkanalo estis malfermita en 1869. La laboroj komencis en 1859. La konstruisto estis franca inĝeniero Ferdinand de Lesseps.

Grafikaj artoj.

Kraĵono. Conté el Paris eltrovis en 1790 la nunan kraĵonon kies kerno ne plu estas segita el natura grafito, sed konsistas el pulvorigita grafito miksitaj kun argilo. Per bruligo de la interno estis eble havi diversajn gradojn da malmoleco.

Kuprogravuro estis elpensita en 1440.

Litografio. Senefelder elpensis en München (1796) la litografion kies principo baziĝas sur la nemiksebleco de akvo kaj graso. La desegnaĵo estas farita per graso koloro sur la glata ŝtono. Tiu ĉi estas malsekigita tiel ke nur la grasaj lokoj alprenas aŭ eldonas koloron.

Pergameno. Ĉ. 1400 j. a. K. rolitaj pergamenoj estis uzitaj de la egiptanoj por skribo; ĉ. 500 j. p. K. la libroformo anstataŭis iom post iom ĉe la romanoj la ĝis tiaman rolformon.

Presado per lignaj tabuloj. En 593 la ĉinoj presis skribaĵojn kaj bildojn per lignaj tabuloj. En 1370 tiu procedo estis unuafoje uzita en Eŭropo.

Presmaŝino. En 1810 germana presisto König elpensas la fandpresmaŝinon kaj la rapidpresilon. Tiu lasta plenumas mem ĉiujn agojn necesajn por presi: kaj produktas laboron pli rapidan ol manpresilo.

Skrappumo. En 1770 angla kemiisto Priestley rekomendis la uzon de kaŭĉuko por forigo de kraĵonaj strekoj.

Ŝtalpreso. En 1820 Perkins kaj Fairman elpensis rimedon moligi ŝtalplataĵojn per varmuĝigo kaj post gravado ĝin remalmoligi. Charles Heath uzis tiun procedon la saman jaron por preso de desegnaĵoj kaj bildoj.

Zinkografio estis eltrovita en 1815 de Eberhard el Magdeburg. Pro ĝia malkareco tiu preso de ilustraĵoj tre progresigis la bildpreson. En 1881 Aŭtotipio estis eltrovita de Meisenbach en München.

Hejma ekonomio.

Aerhejtado. 89 j. a. K. Sergius Orata eltrovis la aerhejtadon per varma aero traŭranta kondukilojn sub la pavimo.

Alumedoj. En 1833 anglo, Jones, fabrikas la unuajn sulfuralumedojn. En 1848 Boettger en Germanio fabrikas alumedojn senfosforajn. Tamen lia entrepreno ne sukcesis ĉar la publiko trovis neoportune, ke la alumedoj devis esti frititaj sur speciala surfaco. Dek jarojn poste svedo Lundström sukcesis enkonduki la "svedajn alumedojn".

Ĉokolado. En 1520 la hispanoj lernas en Meksiko la preparadon de la ĉokolado kaj enkondukas ĝin en Eŭropo. Azteke: Ĉoko-Kakao; atl akvo. Linné en sia botanika klasigo nomis la kakaon „Cocoa theobroma” t. e. „Kakao diamangaĵo”.

Elektra lampo. Edison elpensis en 1879 la unuan taŭgan elektran lampon. Jam en Bruxelles estis faritaj eksperimentoj per senaeraj lampoj (1838) sed sen sukceso.

Gasbruligilo elpensita en 1850 de Bunsen per mikso de gaso kun aero donas bluan tre varman senfumana flamon.

Gaslumigo. En 1885 Auer el Welsbach eltrovis perfektigon en la gaslumigo per mikado de aero kun la gaso kaj almeto de mufo el “Ceroxyd” (t. e. “maiofta tero”) kiu donas sesoble pli helan lumon, ankaŭ pli higienan (malpli da varmo kaj karbonacido).

Gaslumigo. 1807—14. Dum tiu epoko oni instalas la gaslumigon en la Londonaj Stratoj, en 1815 en Paris, en 1825 en Berlin; en 1839 unuaj provoj de Bischof por utiligo de gaso por varmigaj kaj kuiraj celoj.

Glacimaŝino per etero estis konstruita en 1834 de Anglo Perkins. Glacimaŝino per vaporigo de amoniako estis eltrovita en 1860 de franca inĝeniero Carré. Ĝi estis eltrovo de nekalkulebla valoro por la industrio de manĝaĵoj.

Hejtigo per varma akvo kun malalta premo estis elpensita de Hoyle en 1800. En 1831 Perkins instalas hejtadon per akvo varma je 200 gradoj.

Kudromaŝino. Post 100 jara serĉado de multaj elpensintoj por konstrui kudromaŝinon, usonano Elias Howe konstruis en 1845 la unuan vere uzeblan kudromaŝinon.

Kulero. La uzo de la kulero por manĝi, malrapide disvastiĝis ĉirkaŭ 1500, unue en Svislando. En 1580 oni ne ankoraŭ konis ĝin en Paris.

Necesejo kun akva purigo. La unua estis enkondukita en Paris en 1660. Cuning prenis en 1775 la unuan patenton por angla necesejo.

Nesorbeblaj ŝtofoj. En 1801 Ackermann, germano instalas en London patentigas ŝtofon kiu pere de kaŭĉuko iĝis netrairebla de akvo. La unuaj kaŭĉukaj ŝuoj estis eltrovitaj de Fresneau en 1751.

Petrola lampo. En 1855 amerikano Silliman elpensis la petrol-lampoon. En 1882 Argand el Genève ĝin pliperfektigis per aertubo meze de la meĉo.

Pluv- kaj sunombrelo fariĝis oftaj en Eŭropo post la apero de la romano Robinson Crusoe (Daniel Defoe 1719). En Ĉinlando ombreloj estis uzitaj de longe. Ĝi estis malmulte uzita de la romanoj. En mez-epoko ĝi estis uzita nur kiel pompa ornamaĵo.

Sapo. Ĉirkaŭ 200 j. nur malmulte uzita en Romo, fariĝis uzata por tualeto en ĉ. 800 j. en Mezeŭropo. Ĉirkaŭ 900 fondiĝis sapindustrio en Marseille. Tuko daŭrigis esti lavitaj per lignocindro.

Ŝu-najloj. Usonano Barnet elpensas meti najlojn ĉe la ŝuplandoj en 1810. Samjare fariĝis modo en Paris protekti la kalkanumon per malgranda ĉeval-feraĵo. Oni multe mokis siatempe pri tiu eltrovo.

Steriligaparato. En 1804 pariza kuiristo Appert eltrovas la steriligon t. e. senmikroba konservado per varmigo kaj protekto kontraŭ la aero. Lia sistemo estis la bazo de la konservindustrio kaj ebligis valorajn progresojn en medicino.

Sukero. La unua palmsukero estis alportita en 996 al Venezia de Araboj kiuj konis ĝin en sia hejmlando Hindio.

Tondiloj. 300 j. a. K. La uzo de la unuaj tondiloj malrapide disvastiĝas en Romo. Plinius diris, ankoraŭ 65 j. p. K. ke oni eltiras la lanon de la ŝafoj, sed ne tondas ilin.

Inĝenierarto.

Aerpumpilo estis eltrovita de Otto von Guericke en Magdeburg (1650).

Akva premilo. 1649. La akva premilo estas proponita de la franca matematikisto Pascal. Ĝi estis konstruita unuan fojon en 1795 de Bramah.

Arklampoj. En 1844 mekanisto Joseph Deleuil lumigas la Place de la Concorde en Paris per elektraj arklampoj (en 1802 Gaspard Robertson jam rimarkis la fajrerojn inter du karboj).

Dentradoj. 150 j. a. K. Ktesibios, greka mekanikisto konstruante akvan horloĝon eltrovis la dentradojn por ĝia reguligo.

Dinamo. Germana inĝeniero kaj fizikisto Werner Siemens elpensis en 1870 la dinamon kaj per tiu elpenso fondas la elektran industrion de forta fluo.

Elektro. En 1628, Gilbert, angla kuracisto konstatas ke la altira forto de la frotita sukenco estas sendependa naturforto, kiun li nomis elektro laŭ la greka nomo por sukenco. La supra fenomeno estis jam observita de Tales el Milet 585 j. a. K.

Falsirmilo. La eminenta itala pentristo, skulptisto, poeto kaj inĝeniero Leonardo da Vinci eltrovas en 1480 la falsirmilon, studas la birdoflugon kaj skribas geniajn verkojn pri tekniko.

Galvanismo. En 1790 Galvani el Bologna observas la agon de elektro kontraŭ diversaj objektoj, kio iniciatis Volta trovi la forton elektromotoran.

Galvanoplastiko. Livlandano Jacobi eltrovis en 1836 la galvanoplastikon, elektrokemia elektrolizo kun precipito de metalo per kio metalaj reproduktaj kaj metaltavoloj (arĝentigo, kuprigo, nikeligo) povas esti farataj.

Gasmotoro. En 1869, eks-kelnero Lenoir, en Paris, konstruas la unuan taŭgan gasmotoron. En 1867 kaj 1878 germana inĝeniero Otto konstruas ŝparigan gasmotoron. En 1897 oni eltrovis la Diesel-Petrolmotoron.

Kalkulmaŝino. En 1652 Pascal konstruas la unuan kalkulmaŝinon por adicii kaj subtrahi nombrojn de 6 ciferoj.

Kaŭĉukaj aerplengitaj radoj por veturiloj estis patentitaj en 1845 de angla fabrikisto Thomson. Pneŭmatikoj plenblovigotaj estis elpensitaj en 1890 de skota kuracisto Dunlop.

Kinematografo. En 1895. A. kaj L. Lumière en Lyon elpensis la kinematografon. Tiu elpenso havas grandan sciencan kaj edukan valoron.

Globo-aksoj. Franca ferdandisto Philipp Vaughan elpensas la aksojn kun buletoj por malpliigi la frotadon.

Manometro. Ĉ. 1500 Leonardo da Vinci eltrovas la lampovitrion, la higrometron la manometron.

Mikroskopo. En 1590 holanda fabrikanto de okulvitroj Zacharias Jansen elpensis la mikroskopon kiu estis tiam tre primitiva sed kiu poste estis plibonigita de Galilei, Newton, Hertel, Euler kaj aliaj esplorantoj. La nunaj mikroskopoĵ videbligas al la homa okulo la miliononan parton de milimetro. Per tiuj aparatoĵ kelkaj el la plej gravaj eltrovoĵ en kemio kaj medicino estis ebligitaĵ.

Pendolhorloĝo. 1656. La unua horloĝo kun pendolo estis konstruita de la holanda instruitulo Huygens. La tempmezuro pere de lancado de pendolo estis menciita jam en 1638 de Galilei.

Pezilo decimala. Ĝi estis eltrovita de Strasburga mekanikisto Quitenz en 1821. Sekve de lerta levilsistemo la almeto de kontraŭpezo estas grave plisimpligita.

Segilo laŭ diska formo estis elpensita en 1799 de Albert en Paris. La bendforma segilo estis elpensita de angla inĝeniero Newbury en 1807.

Sendanĝera lampo por minejoĵ estis eltrovita de angla kemiisto Davy en 1816.

Ŝipkronometro. John Harrison, angla horloĝisto konstruis la unuan uzeblan ŝipkronometron en 1761. Tiu aparato permesis al la maristoj difini sufiĉe precize la geografian lokon.

Skribmaŝino. La unua uzebla skribmaŝino estis konstruita de Soles Soulé kaj Gliddon en 1867. (Provoĵ faritaj en 1714 de Mill.)

Tekniko. 24 j. a. K. la roma militinĝeniero Marcus Vitruvius skribas 10 verkojn pri tekniko, arkitekturo, pentrado, fontoj, horloĝoj, kranoj, pompiloĵ, mueliloĵ, orgenoĵ, vojmezuriloĵ, militmaŝinoĵ, ktp.

Turbino. La akvoturbino estis eltrovita de la universala geniulo Leonardo da Vinci en 1510.

Vapormaŝino. La unua vapormaŝino estis konstruita de franco Papin en Kassel (1688). Ĝi estis detruita de la glacifluro de la Fulda; li konstruis la unuan vaporŝipon, la ŝipistoj detruis lian maŝinon; tiam li iris al Anglio kie li trovis neniun aprobon kaj mortis pro ĉagreno.

Vapormaŝino. En 1769 la skota mekanikisto James Watt plibonigis la primitivan vapormaŝinon de Papin, Newcomen, kaj aliaj. En 1784 li konstruis la unuan vaporhejtigon por sia laborĉambro.

Kemia teknologio.

Anilinkoloroĵ. La 18 jara Henry Perkin el London ekstraktis en 1856 el gudro la "Perkin-violkoloron" la unua anilinkoloro kiu trovis praktikan uzon.

Dinamito. Svedo Nobel, fondinto de la Nobelpremio, elpensis la dinamiton en 1867. Dinamito estas tre valora por grandaj terlaboroj.

Kemiaj sterkoĵ. En 1840 Liebig elpensis la aplikadon de kemio en agrikulturo: artaj sterkoĵ (potaso fosfatoĵ).

Kemio.

Aluminio. Wöhler, germana kemiisto sukcesis disigi aluminon el argilo en 1827.

Kemio. En 1546, Agricola, fizikisto en Chemnitz, fondas la kemion de la metaloj, kaj la sciencan minekspluatadon. 1550 sistema priskribo de la mineraloj.

Radiumo. La francaj sciencistoj F. Muy kaj L. Curie eltrovis la radion en 1898. Ĝi estas kara elemento kiu troviĝas en etaj kvantoj en peŝblendo (fr. peĉurane) 1 gramo kostas 400.000 sv. fr. Radiumo elsendas fortajn nevideblajn radiojn kiuj produktas karakteran kuracadon kontraŭ haŭtmalsanoĵ kaj abcesoĵ.

Komunikado — Komercio.

Adresaro. La unua presita adresaro aperis en 1677 (adresoĵ de la Londonaj komercistoj). En 1691 aperis la unua adresaro pariza.

Aeroplano. En 1889 germana inĝeniero Lilienthal konstruis aparon senmaŝinan. Sekve de ventoskuo okaze de flugprovo li perdis la ekvilibron kaj mortis en 1896. Amerikanoĵ Wilbur kaj Orville Wright flugis en 1904 per memfarita aeroplano 19 km kaj fondis tiel la nunan aerveturadon per aparatoĵ pli pezaj ol aero.

Akcioĵ. En 1407 la Banko de S. Georg (?) en Genova eldonis akciojn kaj pagis en 1418 la unuajn dividendojn.

Aŭtomobilo. Majoro de Rivaz el Sion (Svislando) patentas la unuan gasmotoran veturilon en 1807. Petrolaj motorveturilo de Marcus en Wien 1875. Progresoĵ estis faritaj de Bollé, Serpollet, Dion kaj speciale de Daimler kaj Benz. Tiu lasta konstruis en 1886 la unuan benzinveturilon. La unua uzebla elektra aŭtomobilo estis konstruita en Angllando (1881).

Balono. En 1782 la unua aerbalono estis konstruita de fratoĵ Montgolfier en Annonay. La balono estis malfermita malsupre. paja fajro produktis la varman suprenigantan aeron. En 1783 okazis la unua vojaĝo kun pasaĝeroĵ. Samjare pariza fizikisto Charles konstruas balonon plenigitan per hidrogeno per kiu li supreniras 3467 m. alteco.

Banko. 808 j. Lombardaj Hebreoj fondis en Italio la unuan bankon. **Biciklo** estis elpensita de germana ĉef-arbaristo Drais (ankaŭ la "Drazino" por fervojoĵ). En 1854 Fischer elpensis la pedalon.

Direkteblaj balonoĵ. En 1884 franca komandanto Renard sukcesis fari difinitan vojon kaj reveni al la forira punkto per balono konstruita de li mem. Necesis tamen ankoraŭ multaj elpensoĵ por

perfektigi tiun balonon. Ili estis faritaj ĉefe de braziliano Santos Dumont kaj Jullot en Francio kaj de Grafo Zeppelin en Friedrichshafen. Tiu ĉi lasta faris en 1908 sian unuan provflugon super Svislando.

Elektra fervojo kaj tramveturilo estis elpensita en 1879 de Werner Siemens per apliko de la de li elpensita dinamo. La unua estis specimena fervojo en la berlina ekspozicio.

Gazeto. En 912 aperis la ankoraŭ nun ekzistanta ĉina gazeto "Ĉing-Pao". La presejo ankoraŭ posedas ekzemplerojn de ĉiuj aperintaj numeroj. En Eŭropo la unua gazeto aperis en 1505. La eldonisto estis Erhart Oeglin en Augsburg.

Kabla fervojo. La unua estis konstruita en 1861 de Dücker. La unua dentrada fervojo estis konstruita en 1862 de sviso Riggenbach sur monto Rigi.

Kopipremilo por kopiado de leteroj sur malseketa papero per uzo de speciala inko, estis eltrovita kaj patentita en 1780 de James Watt eltrovinto de la moderna vapormaŝino.

Kovertoj. En 1830 angla libristo Brewer fabrikas per tranĉo laŭ ladaĵ ŝablonoj la unuajn kovertojn. En 1845 Hill konstruas la unuan maŝinon por farado de kovertoj.

Lokomotivo. George Stephenson konstruis la unuan lokomotivon en 1825. Lia lokomotivo "Rocket" tiris kvinoble sian pezon kaj vojiris ĝis 32 km. po horo. La unua fervojo kun lokomotivo funkciis en 1830 (Liverpool-Manchester).

Mapo. Ĉ. 1370 j. a. K. La plej malnova egipta mapo sur papiruso, datumas de la regnado de Ramses II, kaj montras la regionon de la orminejoj de la monto Bechem.

Monda Poŝtunuĝo por reguligo de la internaciaj poŝtaj rilatoj estis fondita en Bern (1874), laŭ iniciato de Heinrich Stephan, germana Ĝenerala Poŝtestro.

Poŝtkartoj. La oficialaj poŝtkartoj estis uzitaj unue en Aŭstrio (1869). En 1777 jam ekzistis en Paris la kutimon sendi bondezirajn kartojn ornamitajn per kupra gravuraĵo.

Poŝtmarkoj. Velay, entreprenisto de la poŝto en Paris, elpensas la poŝtmarkon en 1653. Libristo Chalmers proponas en Angllando, en 1837 kovri surfacon per gluo. Archer eltrovis en 1848 la perforadon kaj gajnis premion de 30 000 fr. dediĉitan al la plej facila elŝiristemo.

Radveturiloj. Ĉ. 2000 j. a. K. Asirianoj kaj Egiptanoj utiligas radajn veturilojn. En Eŭropo post 1000 j. a. K.

Reloj. La unua ĉevaltramveturilo sur reloj funkciis en 1825 (Stockton-Darlington, Anglio).

Senfadena telegrafo. En 1897 Marconi el Bologna konstruas la unuan grandan senfadenan telegrafejon en la haveno Spezia. En 1899 estis senfadena telegrafo inter franca kaj angla stacioj en 1902 tra la Atlanta oceano.

Submara kablo. La unua estis instalita de Brett en 1850 inter Dover kaj Calais. En 1866 kablotelegrafo inter Eŭropo kaj Ameriko estis finita.

Siphelico. En 1812 ĉeĥo Josef Ressel eltrovis la helicon. En 1829 li konstruis la unuan heliĉipon.

Telegrafo per flagoj aŭ torĉoj. — 450 j. a. K. estis eltrovita de Greko Demokritos.

Telegrafilo. La unua taŭga magnetelektra telegrafilo estis konstruita en 1833 de Gauss kaj Weber en Göttingen. En 1840 Morse, usonano eltrovis la skribtelegrafilon en 1855. Hughes konstruis tippresaparaton.

Telefono. En 1860 instruisto Reis en Frankfurt elpensas sian telefonon kiu estis granda progreso rilate la antaŭajn provojn. La telefono fariĝis praktike uzebla nur post la plibonigoj de amerikano Bell (1876). La unua daŭra instalo de telefono (50 km.) estis instalita en Ameriko (1877). En 1878 Hughes la elpensinto de la tippresa telegrafo elpensas la mikrofonon kiu ebligas aŭdi la plej mallaŭtajn bruojn kaj ebligas la plej malproksimajn interparolojn.

Vaporŝipo. La unua vaporŝipo vojaĝis sur Hudson en 1807. La konstruisto estis usonano Robert Fulton. En 1819 okazis la unua tra-vojaĝo tra Atlantiko de New York al Liverpool.

Vaporveturilo. En 1769 la unua veturilo kun vapormotora, estis konstruita de franco Cugnot. Tiu veturilo havis mallongan daŭron ĉar je la unua veturprovo ĝi difektiĝis kontraŭ muro.

Konstruado.

Ferbetono. La konstruo per ferbetono estas eltrovita de Monier en Paris (1870) kaj plibonigita de belga ŝtonbakisto Hennebique. Per enmeto de maldikaj ferbastonoj la cementaj traboj kaj kolonoj fariĝas dekfoje pli fortikaj.

Metaltuboj. Ĉ. 2500 j. a. K. La plej malnovaj kondukiloj en kupro, 400 m. longeco estis tiuj kondukantaj la pluvakvon ĉe la temploj de Abusir, Egipto.

Najloj. La unua maŝino por fabrikado de feraj najloj estis konstruita en 1785 de anglo Thomas Clifford. En 1811 James White elpensis maŝinon par fabrikado de najloj el drato, kiuj male je la antaŭaj angulaj najloj havis rondan formon.

Pulvo. 1232. La pulvo estis uzita de la ĉinoj. En 1242 ĝi estis preparita la unuan fojon de Roger Bacon, angla monaĥo kaj instruitulo.

Skrapego (drago). 1591. Variantius konstruas la unuan skrapegon ĝi estis movigita de homoj. En 1796 la anglo Grimshaw konstruas la unuan vaporskrapegon kies plibonigoj estis speciale gravaj por el-kavigo de kanaloj kaj konstruo de fervojoj.

Stratpontoj el fandfero. La anua estis konstruita en Coalbrook-deale (Angl.) en 1779. Ĝi estas arkponto kaj ankoraŭ ekzistas hodiaŭ.

Tuneloj. Ĉ. 700 j. a. K. reĝo el Juda konstruigis apud Jerusalema tunelon 531 m. longa tra rokoj por akvokondukilo. Por akvokondukilo de la urbo Samos oni faris (532 j. a. K.) 1000 m. longan tunelon, samtempe komencitan ĉe ambaŭ finoj. 305 j. a. K. Appius Claudius konstruis la unuan grandan akvokondukilon en Roma, longa je 16.500 km. plej parte subtera 263 j. a. K. estis konstruita la dua akvokondukilo de Roma, 62,300 km. subtera.

Matematiko.

Arabaj ciferoj. 1202. Leonardo el Pisa konigis la arabajn cifersistemon en Eŭropo.

Decimalaj frakcioj. 1460. La matematikisto kaj astronomo Regiomontanus el Königsberg uzas la decimalajn frakciojn kiuj iom post iom estis uzitaj en matematiko anstataŭ la kalkulo kun ordinaj frakcioj.

Diferenciala Kalkulo estis eltrovita de Leibniz en Leipzig (1744).

Kompaso. 2634 j. a. K. Oni pretendas ke ĝi estis eltrovita de maristoj de ĉina imperiestro Hoang-ti. La kompasoj estis eltrovita en Eŭropo de Gioja en 1302.

Metra sistemo. Laŭ propono de komisiono de sciencistoj, la Franca Respubliko enkondukas la unuecan mezuron metro kaj kilogramo en 1800. Ekzistas ankoraŭ hodiaŭ gravaj ŝtatoj kiuj ne enkondukis tiun gravan progreson.

Medicino.

Antisepta vundkuracado estis elpensita en 1869 de angla kuracisto Lister. Karbolo aŭ aliaj produktoj senigas la vundon je mikroboj. La traktado de la vundoj laŭ Lister ebligis la sukceson de gravaj operacioj kaj savis la vivon de centmiloj da homoj. Tiu sistemo estas ankoraŭ uzata hodiaŭ kontraŭ malpuraj vundoj dum por operacioj oni uzas aseption, t. e. ke ĉio kio tuŝos la tranĉotan vundon estas senmikrobigitaj.

Baciloj. 1849. Pollender eltrovis la bacilon de la antrakso. En 1880 Hanssen kaj Neisser eltrovas la leprobacilon. En 1882 la tuber-

kuloza kaj en 1883 la ĥolera baciloj estas eltrovitaj de germana kuracisto Robert Koch. En 1884 la difteria bacilo estas eltrovita de germana higienisto Löffler kaj la pestobacilo de sviso yersin kaj japano Kitasato.

Kloroformo. Dentkuracisto Morton en Boston uzis la unuan eteron por narkotigo (1846). Kuracisto Warren uzis ĝin kun sukceso por senkonsciigo okaze de grava operacio. En 1874 Simpson rekomendis la uzon de kloroformo.

Okulista spegulo. Helmholtz, germana kuracisto elpensita en 1851 gravan instrumenton por okulistaj esploroj. Per la reflektita lumigo de la spegulo la interno de la okulo fariĝas ankaŭ videbla. En 1855 Garcia konstruis samspecan spegulon por la observo de la laringo.

Okulvitroj. La florenzano Salvino degli Armati eltrovis la okulvitrojn (1285). La romanoj uzis travideblajn ŝtonojn, poste vitropecojn por plibone vidi.

Pasteur-Instituto estis fondita en Paris en 1887. Pasteur klarigis la procedojn de fermentado kaj putriĝo kaj pruvis ke ili estas kaŭzigitaj de la plej malgrandaj vivantaj estaĵoj. Li montris kiel viando kaj trinkaĵoj povas esti konservitaj per "pasteurizo". Pasteur eltrovis kiel vakcino, kontraŭ diversaj malsanoj povas esti eltrovitaj, per havigo de la malsano al bestoj. Pasteur trovis kuracilojn kontraŭ antrakso kaj rabio. Liaj laboroj estis bazitaj sur la serĉo de kuracilo kontraŭ tetano kaj pesto. En 1890 Behring trovis la tre taŭgan serumon kontraŭ la iama tre mortiga infanmalsano: difterio.

Roentgenradioj aŭ "X radioj" estis eltrovitaj de germana fizikisto Roentgen en 1895. Tiu eltrovo ebligas la vidon tra diversaj materioj kaj tra la homa korpo.

Sangeirkulado. En 1628, Harvey, angla kuracisto, priskribas la duoblan homan sangeirkuladon kaj klarigas ĝin per la muskolaj movoj de la koro.

Vakcinado kontraŭ variolo estis enkondukita en Eŭropo en 1796 de angla kuracisto Jenner. Kamparanino rimarkigis al li, ke melkistoj kiuj havis la nedanĝeran variolon propran al la bovinoj, estis protektitaj kontraŭ la homa variolo. En Oriento vakcinado estis jam uzita de pluraj jarcentoj.

Mekanikaj metioj.

Presarto estis eltrovita de Gutenberg en Mainz en 1436. Jam en 1423 oni presis per lignaj detranĉitaj tabuloj. Gutenberg eltrovis la fandon de apartaj kunmeteblaj metalaj literoj kaj arte transformis la manliterojn en presliterojn.

Radŝpinilo. Ĉ. 1480 la radŝpinilo anstataŭas la de pratempe uzitan ŝpinbastonon. En 1530 Jürgen en Wolfenbüttel apud Braunschweig aldonas piedmovilon al la rado.

Rotacia preso. Rapida presmaŝino estis konstruita en 1863 de amerikano Bullock. Ĝi estis pliperfektigo de la cilindra presmaŝino de König. La kompostaĵo fandita sur cilindro presas sur la papero malvolviĝanta el rulpaketo. Tiu maŝino utilas ĉefe por preso de gazetoj (500 000 gazetpaĝoj en unu horon).

Ŝpinmaŝino 1767. James Hargreaves, malriĉa angla ŝpinisto konstruis post penigaj studoj la unuan uzeblan ŝpinmaŝinon (nomita kiel ŝia filino: "Jenny"). Tiu maŝino estis detruita de laboristoj kiuj timis fariĝi senlaboraj. Hargreaves mortis en mizero. En 1769 Richard Arkwright, angla razisto klopodis plibonigi la maŝinon de Hargreaves kaj malzorgis sian panakiron. Li fariĝis mizera, lia edzino pieddisrompis la maŝinon kaj kun sia infano forlasis li. Kiam Arkwright funkciigis la unuan ŝpinmaŝinon, la manŝpinistoj detruis ĝin. Li devis forkuri al Nottingham kie bankisto Strutt lin helpis. En la sama jaro Arkwright liveris maŝinojn tiom bonaj ke la ŝpinindustrio tuj pligrandiĝis kaj oni devas konsideri lian elpenson kiel unu el la plej gravaj por la homaro. Arkwright fariĝis tre riĉa kaj estis nobeligita de la reĝo.

Teksilo. 3500 j. a. K. La popoloj de Eŭropo lernas la uzon de la staranta teksa kadro.

Teksilo. La uzua uzebla mekanika teksilo estis eltrovita de angla mekanikisto Arkwright en 1785. Franca silkteksisto Jacquard eltrovis en 1801 la mekanikan teksilon por teksado de specimenigitaj ŝtofoj.

Muziko.

Fonografo estis elpensita de amerikano Edison en 1877.

Fortepiano. La "klavikordo" estis eltrovita en 1010 de la benedikta monaĥo Guido d'Arezzo. En 1711 Christofori en Firenze pliperfektigis la martelteknikon.

Muziknotoj. En 1025 la benedikta monaĥo Guido d'Arezzo trovis en la klostro de Ravenna la notskribon. Li nomis la notojn ut, re, mi, fa, ktp. laŭ la vortkomencoj de horoj pri Johano. En 1473 oni presis la unuajn muziknotojn.

Sociologio.

Braille-skribo. Franca instruisto Louis Braille (kiu fariĝis blinda estante 3-jara) elpensas laŭ iniciato de Kapitano Barbier, palpeblan punktitan skribon por blinduloj kiu en 1879 estis deklarita kiel internacia skribo por blinduloj.

Leĝoj. 594 j. a. K. Solon donis al la atenanoj progresajn leĝojn, forigis la punojn pro ŝuldoj, donis rajtojn al la popolo kaj permesis al ĝi nedependan partoprenon en la oficiala vivo.

En 509 a. K. komenco de la roma respublika leĝdono, laŭ kiu la nuna leĝdono ankoraŭ similas.

Paco. En 1899 internacia paco-konferenco okazis en Hago. La Ligo de Nacioj estis fondita en 1920.

Patento. La unua leĝo por protekto de la elpensintoj aperis en 1624. Ĉiuj konsentitaj patentoj estis priskribitaj kun desegnaĵoj kaj publikigitaj.

Popoleduko. Pestalozzi instruas ke popolaj mizero kaj malmoral-eco povas esti plej bone kontraŭigitaj per popoleduko. Pestalozzi estis unu el la ĉefaj fondintoj de la nunaj popollernejoj.

Ruĝa kruco. Geneva interkonsento de internaciaj unuiĝoj por protekto de la militvunditoj, estis fondita en 1864 de ĝenevano Henri Dunant.

Sklaveco (forigo de la). En 1792 Wilberforce akceptigas de la angla parlamento decidon laŭ kiu fine de 1795 la komerco de sklavoĵoj estos forigita en la anglaj kolonioj. Leĝo pri forigo de la sklavkomerco aldonita en 1864 al la konstitucio de Nordameriko. Post 1865 sekvis la sudaj ŝtatoj, en 1880: Kubo, en 1888 Brazilo.

Zoologio.

Anatomio. En 1543. Vesalius el Wesel fondas pli novan anatomion per eldono de la verko "Pri la konstruo de la homa korpo" aperinta en Basel kun ligno gravuraĵoj.

Silko. 351 j. a. K. Je tiu epoko la de la ĉinoj malnove konata kulturo de la silkraŭpo kaj silktekso, estas enkondukita en Eŭropon.

La lingvoj en la mondo.

La nombro de la lingvoj porolataj tre varias kaj fidinda cifero estas ne fiksebla por longa tempo. Malhelpas la kalkuladon la necertececo pri multaj idiomoj ĉu ili estu konsiderataj kiel dialektoj aŭ kiel memstara lingvo.

Unuan provon de nombrado de la lingvoj ni havas en la verko de Adelung (1732—1806 en Dresden), kiu en sia libro "Mithridates" kalkulis 3000 lingvojn. Adrian Balbi, statistikisto kaj geografo

(1782—1848), kalkulis nur 860. Laŭ Max Müller, la nombro de ekzistantaj lingvoj ne pasas 900.

Estas do granda diferenco en la taksado, kio klariĝas per tio, ke precizan statistikon malfaciligas la ofte neebila difino neta inter lingvo kaj dialekto.

La lingva diverseco estas plej granda en Ameriko, antaŭ la alveno de la blankuloj; pli malgranda en Eŭropo, kie per la skribo la parolita vorto kristaliĝis kaj konserviĝis, malebliganta disfalon de lingvo en sublingvojn, iom post iom deflankiĝantaj de l'patrina lingvo kaj poste fariĝantaj memstaraj (ekzemple: Nederlanda lingvo el pli frua germana).

Ideala tasko de la kompara lingvoscienco celas pruvi ke ĉiuj lingvoj estas pli malpli parencaj kaj iam devenis de unu, kvazaŭ la patrino de la idiomoj. La opinio pri la fariĝo de ĉiuj lingvoj estas diskutata; jen unu lingvo el kiu devenis ĉiuj aliaj, jen multaj lingvoj, kiuj malmultiĝas iom post iom.

Jam granda paŝo antaŭen estas la konstato de lingvobranĉoj, idiomoj parencaj apartenantaj al sama branĉo, aŭ devenantaj de sama fonto.

La plej gravaj — lingvobranĉoj — estas:

1. La unusilabaj lingvoj en Sudorienta Azio.
2. La malaja lingvobranĉo.
3. La Dravida lingvaro (Suda Hindio).
4. La ural-altaja aŭ finn-ugra lingvobranĉo.
5. La lingvaro de Bantunegroj, en Suda kaj Meza Afriko.
6. La hamido-semida lingvobranĉo.
7. La indogermana aŭ indoeŭropa (arja) lingvobranĉo.
8. La amerikana lingvobranĉo.
9. La sudaŭstraliaj lingvoj.

Plie ekzistas aro da izolaj lingvoj ne ankoraŭ esploritaj aŭ neklasigeblaj en la nun konatan lingvobranĉaron. (Baska lingvo, negraj idiomoj, diversaj lingvoj en Kaŭkazo.)

La plej grava lingvobranĉo estas la indogermana, nomata ankaŭ indoaria aŭ indoeŭropa. La signifon indogermana uzis unue Friedrich von Schlegel (1772—1829) en sia verko "Sprache und Weisheit der Inder" = Lingvo kaj saĝeco de l'hindoj.

Indoaria aŭ Indoeŭropa estas precizigoj de sama ideo. Tiu-ci lingvobranĉo do estas konsiderata kiel la plej grava, ĉar al ĝi apartenas la kulturaj lingvoj de la homaro; ili distingiĝas de aliaj per riĉeco de la vortaro kaj gramatika perfekteco. La nun ekzistantajn lingvojn de tiu branĉo montras la jena tabelo.

Grupo:	Lingvoj:	Parolata en:	
1. Ĝermana	Angla	Britaj Insuloj, Usono, Britaj Kolonioj.	
	Germana	Germanio, Svislando, Aŭstrio, lim-regionoj de Germana Respubliko, Rumanio, Ruslando.	
	Nederlanda	Nederlando kaj kolonioj.	
	Flandra	Belgio.	
	Frisa	En Frislando parto de Nederlando.	
	Dana	Danmarko kaj kolonioj.	
	Norvega	Norvegio.	
	Sveda	Svedio kaj Finnlando.	
	2. Romana	Franca	Franclando, Belgio, Svislando, Kanado, Francaj kolonioj.
		Itala	Italio, Svislando, Norda Afriko, Kolonioj, Oriento.
Hispana		Hispanio, Centro-amerikaj kaj Sud-amerikaj Respublikoj, Kubo, Filipinoj kaj hispanaj kolonioj.	
Kataluna		Katalunio.	
Portugala		Portugalo, Brazilo kaj kolonioj.	
Rumana		Rumanio.	
3. Slava	Romanĉa	Svislando.	
	Friula	Friulio.	
	Rusa	Ruslando, Siberio, Pollando.	
	(Blankrusa)		
	Bulgara	Bulgario kaj limregionoj.	
	Pola	Pollando, limregionoj al najbaraj ŝtatoj.	
	Ĉeĥa	Ĉeĥoslovakio.	
	Serbo-kroata (Sudslava)	Sudslavio, limregionoj al najbaraj ŝtatoj.	
	Venda	Luzacio, Spree-arbaro (Germanio).	
	Slovena	Parto de iama Stirio nuna Sudslavio.	
Ukraina (Rutena)		Ukraina Respubliko, Orienta Galicio, Subkarpata Ruslando = Podkarpatska Rus (Parto de Ĉeĥoslovakio).	
	Slovaka	Slovakio (parto de Ĉeĥoslovakio).	
	Kaŝuba	Orienta Prusio, Pollando.	

Malgrandaj apartaj branĉoj de la indoaria lingvo-familio en Eŭropo estas la *Novgreka*, parolata en nuna Greklando, en la greka insularo; la *Albana*, en Albanio. La litova, laŭ strukturo la plej antikva lingvo, parolata en Litovio, la latva en Latvio. Konservigis en la Bretagne (franca provinco ĉe Atlanta Oceano) en Irlando, Skotlando, Wales, restoj de la kelta lingvo, iam vaste disvastigita en Okcidenta Eŭropo kaj kies postesiginojn ni renkontas en multaj urbnoj. La nomoj de tiuj idiomoj estas malsamaj: Bretona, Gaela, Irlanda. La vorto **Kimra** indikas la keltan idiomon, parolatan kaj zorge flegatan en Wales (Okcidenta bordo de britlando) laŭ la kelta tribo de Kimroj.

La ĉefaj indoariaj lingvoj en Azio estas la hinda, la Irana (Persa) kaj la Armena.

Antikvaj lingvoj el la Indoaria grupo estas la Sanskrito, la Kelta, la Greka, la Latina, la Antikvo-Slava kaj la Germana (Telitona).

Interesa libreto pri la diverseco de lingvoj kaj skriboj estas "The Gospel en many tongues"¹⁾ el kiu ĉi-tie estas represata kelkaj lingvotipoj.

Albana (en latinaj literoj): "Sepse Perëndia kaqë e deshi botënë, sa dha Birin' e ti të- vetëmlindurinë, që të mos humbasë kushdo që t'i besonjë ati, po të ketë jetë te- përjetëshme."

Bretona: Rag Doue hen deuz karet kement ar bed, ma hen deuz roet he Vab unic, evit na vezo ket kollet pioubenag a gred enhan, mes ma hen devezo ar vuez eternal.

Gaela: Oir is ann mar sin a ghrádhach Dia an saoghal, gu'n d' thug e aon-ghin Mic féin, a chum cò air bith a chreideas ann, nach sgriosar e, ach gu'm bi a' bheatha shiorruidh aige.

Kimra. Cansys felly y carodd Duw y byd, fel y rhoddodd efe ei uniganedig Fab, fel na choller pwy bynnag a gredo ynddo ef, ond e affael o hono fywyd tragwyddol.

Litova: Jaipo Dievas mylėjo svieta, kad savo viengimusįjį sunu davė, jeib visi į jį tikintieji ne prapultų, bet amžinąją gyvata turetų.

Romanĉa (Oberland): Parchei Deus hateniu il mund aschi car, ca el ha dau siu parsulnaschiu figl, par ca scadin, na crei en el, voml buca á perder, mo hagi la vita perpetua.

Venda. Pscheto tak jo Bog swet lúbował, so won swojogo jaderno-porozonego syna dal jo, aby schykne do nogo wereze, sgu bjone nebyli, ale to nimerne żywene meli.

¹⁾ The Gospel in many tongues. British & Foreign Bible Society 146 Queen Victoria Street, London E. C. (1922).

(La Evangelio en multaj lingvoj. Enhavas 553 modelojn de lingvoj kaj skriboj, en kiuj la Biblio aŭ parto estis tradukitaj.)

La esperanta traduko estas: Ĉar Dio tiel amis la mondon, ke li donis sian solenaskitan Filon, por ke ĉiu, kiu kredas je li, ne pereu, sed havu la eternan vivon.

La Lingvo Internacia.

La alproksimiĝo de la popoloj dank' al evoluiĝinta rimedaro de l'trafiko sentigas ĉiam pli kaj pli la mankon de egale rapida peradilo spirita, nome . . . internacia lingvo. Male al teknika eltrovaĵo, donante konkretan profiton per la industria kaj komerca ekspluato, la pure spiritaĵo klopodoj aŭ movadoj renkontas sennombrajn malfacilaĵojn, opozicion aĉ malamikecon ĉe la publiko. La movado pri Internacia Lingvo, kiu estas karakterizo de nia moderna tempo, ja plene spertas tiun konstaton. La pioniroj de la ideo mem estas multnombraj kaj ne limigitaj al la 20^a jarcento; jam frue, kleruloj malproksimen pensintaj, okupis sin pri la problemoj kaj riĉa estas la materialo, konservita en bibliotekoj, traktanta la internacian lingvon.

En jaro 1906 aperis franclingva verko¹⁾ "Histoire de la Universala Lingvo" kaj²⁾ "La novaj internaciaj lingvoj" (1907) kompletigo. Tiuj du libroj prezentas la unuan fojon la tutan materialon ĝis 1906, laŭ scienc-esplora maniero; ili servis kiel bazo por la preparaj laboroj de la "Delegacio por adopto de internacia lingvo" kunveninta en Paris.

La diritaj verkoj ekzamenas entute 70 projektojn de L. I. de kiuj gramatikoj estis troveblaj. Laŭsistema klasigo de ĉiuj projektoj montris tri kategoriojn da lingvoj, nome:

1. Sistemoj originalaj, sen apogo al naturaj lingvoj;
2. Sistemoj naturaj, bazitaj sur ekzistantaj lingvoj, mortintaj aŭ nunaj;
3. Sistemoj miksitaj, parte arbitraj parte ekstraktaj el naturaj lingvoj.

La unuan provon de publika propagando por la ideo de L. I. ni havas en la kreaĵo de germana pastro, prelato Martin Schleyer kiu ⁵³ en 1880 eldonis sian verkon, la lingvon Volapük.

Menade bal püki bal = Al unu homaro unu lingvo, estis la devizo de Volapük, lingvo laŭ miksitaj sistemo, bazita ĉefe sur la angla, sed ŝanĝinte la vortojn ĝis nerekonsebleco. (Vola = World — pük = speak.) Tamen la entuziasmo estis grandega; centoj kaj miloj da kursoj, oficialaj kuraĝigoj, arego da societoj, nenio mankis. La subteno de famaj sciencaĵoj, interalie la **moral**a de grava lingvisto Schuchardt¹⁾ puŝis la aferon antaŭen. Tri kongresoj okazis, aperis gazetoj kaj libroj, sed la praktika uzado evidentigis la gravajn mankojn de l'konstruo. La

¹⁾ Histoire de la Langue Universelle, par L. Couturat et L. Leau. Deuxième tirage, Paris 1907, Librairie Hachette et Cie (XXX kaj 576 p.).

²⁾ Les nouvelles Langues internationales. Paris 1907.

lingvo malaperis kaj hodiaŭ ne plu ekzistas uzantoj. La provoj reformi Volapük'on, ĉefe defendataj de profesoro Kerckhoffs (Paris) naskigis diversajn imitaĵojn de tiu lingvo (Nal Bino, Bopal, Dil, Veltparl). Neniu el ili sukcesis starigi movadon. La ideo de la lingvo internacia ŝajnis mortfrapita sekve de la malsukceso de Volapük. Tamen aperis post ĝi ĝis 1908 ne malpli ol 45 projektoj kaj inter ili kelkaj atentindaj laŭ originaleco, kiel **Idiom Neutral**, **Universal** kaj **Latine sine flexione**. Tiu lasta, propagandata kaj gvidata de profesoro Peano en Torino, publikigas periodaĵon, science prilaboranta la problemon.

La apero de Esperanto en 1887 okazis senbrue. Ne rimarkite de l'publiko, kaj eĉ se provo estis farita interesigi la amason, ĝi renkontis netan rifuzon. Esperanto ne malsukcesigis Volapük'on. Dudek jaroj da pena varbado kondukis al Esperanto la nombron da adeptoj, kiujn Volapük havis en du jaroj. Evidente ŝanĝis la percepto. Anstataŭ la Universala Lingvo, "Mondlingvo" oni komencis paroli pri "Internacia" kaj "Helpa Lingvo". La dua, sed la sama por ĉiuj.

Okaze de la Monda ekspozicio en Paris 1907, kunvenis tie la "Delegacio por adopto de internacia helpa lingvo", ekzamenanta la diversajn projektojn kaj principe akceptinta Esperanton kun kelkaj ŝanĝoj. La esperantistaro ekkoninta la danĝeron de cedo al la plej grava principo, nome la regulan evoluon **per la uzado**, rifuzis akcepti la ŝanĝojn proponitajn sub pseŭdonimo "Ido". Estas preskaŭ 20 jaroj; la faktoj montris kiom prave estis la esperantistaro, restinte fidela al sia principo de unueco. La nova lingvo ne restis la sola; sekvis aro da novaj "idoj" kaj certe ankoraŭ aperos pliaj. Seriozaj studoj pri la problemoj aperis; citindaj estas interalie tiuj de René de Saussure, A. Seidel, H. Sentis, k. a.

Analizante ĉiujn provojn, proponojn kaj projektojn, oni konstatas ke la plimulto estas por la bazo roman-slav-germana, tiom bone atingita en Esperanto.

Dum la milito aperis ankoraŭ du novaj projektoj celantaj forigi tiun bazon. La unua estis "**Romanal**" proponanta al la Aliancanoj "purigitan Esperanton", kun nur romanaj elementoj. La kontraŭo estis "**WEDE**" t. e. "**Weltdeutsch**", internacia lingvo bazita sur la kripligita lingvo de Goethe kaj Kant.

La espero, ke post la mondmilito nova organizo de l'mondo anstataŭos la anarkian staton politikan de Eŭropo, donis novan impulson por ellaboro de mondlingvaj projektoj. Citindaj estas inter aliaj "**Nov Latin Logui**", **Parlamento**, **Occidental**. Sin limiganta al nura studado kaj analizado tiaj projektoj estas utilaj al la **teoria** flanko de l'problemo; la publika agado kaj propagando malutilas; ĝi erarigas la publikon pri la praktikaj eblecoj kaj spertoj jam faritaj, kaj anstataŭ intereson al la problemoj de L. I. ĝi kreas indiferentecon aŭ eĉ malamikecon.

Tabelo de la L. I.

(kompletigota).

Nomo de l'aŭtoro	Titolo de la projekto (Nomo de la lingvo)	Apero	Nacieco de l'aŭtoro
ARNIM, VON	Veltparl	Oppeln 1896	Germano
BACHMAIER	Pasigraphie	Augsburg 1868	Germano
BARANOVSKI, DE E.	L'Idéographie	Harkov 1884	Ruso
BARRAL, JEAN	Linguo Internacional	Berlin 1914	Franco
BAUER, GEORG	Spelin	Zagreb 1888	Kroato
BAUMANN, ADALBERT	Wede (Weltdeutsch)	München 1915	Germano
BEAUFONT, DE	Ido	Paris 1907	Franco
BEERMANN, ERNST	Novilatin	Leipzig 1895	Germano
BERNHARD, SERAFIN	Lingua franca nuova	Wien 1888	Aŭstrianio
BOHIN, B.	Patoiglob	Bohinville	Franco
BOLLACK, LÉON	La Langue bleue	Paris 1899	Franco
BOND, SEDNI	Domni	Wellington 1913	Anglo
BRAAKMAN, J.	Mundolinco	Noordwijk 1894	Nederl.
CARPOPHOROPHILUS	Novum inveniendie Scripturu Oecume- nicæ	Leipzig 1734	Germano
CHAPPAZ, J. M.	Langage Instantané		
COURTONNE	Langue internationale	Nice 1885	Franco
COLAS, CLAUDIUS	Adjuvilo	Paris 1910	Franco
DALGARNO, GEORGES	Ars Signorum, vulgo Character universalis et lingua philoso- phica	London 1661	Anglo
DAMM, JANNE	PraktischePasigraphie	Leipzig 1876	Germano
DELORMEL	Projet d'une langue universelle, présenté à la Convention Nationale	Paris, An 3 (1795)	Franco
DE MAIMIEUX, JOSEPH	Pasigraphie	Paris 1797	Franco
DE MAS, SINIBALDO	L'Idéographie	Paris 1863	Hispano
DIETRICH, KARL	Völkerverkehrsprache	Dresden 1902	Germano
DONOGHUE, THIM.	Geoglot	Boston 1916	Usonano
DORMOY	Balta	Tours 1893	Franco
DYER	The Lingualumina	London 1889	Anglo
EICHHORN	Die Weltsprache	Bamberg 1897	Germano
FAIGUET	Langue nouvelle	? 1765	Franco
FIEWEGER	Dil	Breslau 1894	Germano

Nomo de l'aŭtoro	Titolo de la projekto (Nomo de la lingvo)	Apero	Nacieco de l'aŭtoro
GROSSELIN, A.	Système de langue universelle	Paris 1836	Franco
GUARDIOLA HAG, KARL	Orba Versuch einer graphischen Sprache auf logischer Grundlage	Paris 1893 Stuttgart 1902	Franco Germano
HARTL, JOS.	Perfect	Linz 1910	Aŭstrianio
HEINZELER	Universala	Stuttgart 1893	Germano
HENDERSON, GEORGES	Lingua et Latinesce	London 1888	Anglo
HILBE, FERDINAND	Die Zahlensprache	Feldkirch 1901	Aŭstrianio
HOESSRICH	Tal	Sonneberg 1904	Germano
HUMMLER, JOHN	Mundelingva	London 1889	Anglo
KOVAĽOV, ALEX.	Adelfia	Rostov 1912	Ruso
KÜRSCHNER	Lingua Komun	Orselina	Germano
LAUDA, EUGEN	Kosmos	Berlin 1888	Germano
LETELLIER	Cours complet de langue universelle	Caen 1852—55	Franco
LIPTAY, DR.	Langue catholique	Paris 1892	Slovakio
LOTT, JULIUS	Mundolingue	Wien 1888	Aŭstrianio
MALDANT	La langue naturelle	Paris 1887	Franco
MARCHAND	Dilpok	Besançon 1898	Franco
MENET, CHARLES	Langue Universelle	Paris 1886	Franco
MERIGGI, CÉSARE	Blaia Zimondal	Pavia 1884	Italo
MICHAUX, A.	Romanal	Boulogne 1917	Franco
MILL	Anti-Volapük	Neuwied 1893	Germano
MOLEE, ELIAS	Tutonish	Chicago 1902	Usonano
MOLENAAR, H.	Universal (Panroman)	? 1903	Germano
NICOLAS, DR ^o	Spokil	Angers 1900	Franco
PAIČ, MOSES	Pasigraphie	Semlin 1859	Serbo
EANO, GUISEPPE	Latino sine flexione	Torino 1903	Italo
IRRO	Universal Sprache	Paris 1868	Franco
POMPIATI, KARL	Nov Latin Logui	Wien 1918	Aŭstrianio
PUCHNER	Nuove-Roman	Linz 1897	Aŭstrianio
REIMANN	Languae interntionale étymologique	Paris 1877	Franco
RIEGER, W.	Ziffern Gramatik	Graz 1903	Aŭstrianio
ROSA, DR ^o	Le Nov-Latin	Torino	Italo
ROSENBERGER, W.	Idiom Neutral	Leipzig 1902	Ruso
RUDELLE, DE	Pantos—Dimou—Glossa	Paris kaj Bordeaux 1858	Franco
SAINT DE MAX	Bopal	Paris 1887	Franco

Nomo de l'aŭtoro	Titolo de la projekto (Nomo de la lingvo)	Apero	Nacieco de l'aŭtoro
SAUSSURE, RENÉ DE	Antido, Lingvo Kosmopolita	Genève 1908	Sviso
SCHIPFER, J.	Esperantido, Esperantida	Bern 1920	
SCHLEYER, MARTIN	Communications-sprache	Wiesbaden 1839	Germano
SEIDEL, A.	Volapük	Konstanz 1885	Germano
SOTOS, OCHANDO	Ile (Elpilingue)	Berlin 1909	Germano
SPITZER, KARL	Projet d'une langue universelle	Paris	Hispano
STEINER, P.	Parla	Heidelberg 1907	Germano
STEMPEL	La Pasilingua	Neuwied 1885	Germano
SUDRE, FRANÇOIS	Myrana und die Welt-sprache	Kempten 1889	Germano
TALUNDBERG, MANNUS	Solrésol	Paris 1866	Franco
URQUART, THOMAS	Perio	Elberfeld 1904	Germano
VERHEGGEN, SEBASTIEN	Legopandecteisio	London 1653	Anglo
VIDAL	Nal Bino	Liège 1886	Belgo
VOLK kaj FUCHS	Langue universelle	Paris 1844	Franco
WALD, MAX	Die Weltsprache	Berlin 1883	Germano
WEISBART, JOSEF	Pankel	Großbeeren 1906	Germano
WILKINS, JOHN	Unial-Eŭropal	Mainz 1909, Nürnberg 1923	Germano
WOLKE	An Essay towards a Real Character and a Philosophical Language	London 1668	Anglo
ZAKRZEWSKI, ADAM	Die Pasiphrasie	Dessau 1797	Germano
	Lingua internacia	Warszawa 1905	Polo

LEBRON ROBOCZEWSKI

Pri Stenografio.

1924-38

Eble neniam oni scios kiam la homoj komencis uzi la rapidan skribon por kapti la paroladojn de aliaj personoj. Estas permesite kredi, ke tiu skribmaniero estis jam uzata de la malnovaj Grekoj, sed neniam dokumento ebligas tion certigi.

La plej malnova sistemo konata estas tiu de Tiro, sklavo liberigita de Cicero. Lia sistemo estas konata sub tiu nomo: Tironaj Notoj.

Ni scias ke la 5 decembro de l'jaro 63 antaŭ Jesuo-Kristo, dum la Catilina konspiro, Tiro, samtempe kelkaj senatanoj, enskribis la paroladon de Cato, kiu postulis morton por la konspiritoj. Kiajn mallongigojn ili tiam uzis? Ŝajnas ke la Tironaj notoj aperis nur 10 jarojn poste.

La tironaj notoj, uzitaj dum tiuj antikvaj tempoj, daŭris ĝis la fino de la mezepoko. Ili konsistis el mallongigoj de l'grafikaj signoj, kies ili montris la erojn nepre necesajn. Kutime ili enhavis 2 elementojn: unu radikon — kiu povis esti ĉu la unua litero, ĉu la unua silabo, ĉu kelkaj literoj aŭ signoj de la vorto riprezentita — kaj finaĵon, pli malgranda ol la radikoj.

Kvankam ĝis la XVII^a jarcento oni ne trovas postsignon de vera stenografio, kelkaj predikoj tamen estis kaptitaj en Francio same kiel en Italio. Tio certe okazis per originalaj rimedoj, ĉar la tironaj notoj ne postvivis la X^a jarcenton.

La unuaj provoj por verki stenografan sistemon estis faritaj en Britlando. Timothy Bright en 1588 eldonis ŝatindan lernolibron, sed *The art of Stenography*, el John Willis, publikigita en 1602, estas vere la unua interesa sistemo.

En Francio, post kelkaj aliaj provoj, la unua rimarkinda lernolibro estas tiu de pastro Jacques Cossard: *Méthode pour écrire aussi vite qu'on parle*, publikigita en 1651.

La sekvantaj landoj, kie sistemoj estis publikigitaj estas: Nederlando (1673) kaj Germanio (1678).

De tiu momento la stenografarto pli kaj pli disvastiĝis, sed ĝi restis ĉiam propraĵo de malmultnombraj praktikistoj. Malgraŭ la provoj faritaj en Francio de *Conen de Prépéan* (1813), *Aimé-Paris* (1822) kaj *Grosselin*, kiu aliparte publikigis sistemon de internacia lingvo, por instrui stenografion en la lernejoj, oni ĝenerale konsideris ĝin kvazaŭ kiel malfacilega scienco, akirebla nur de esceptaj kleruloj.

Iu nova aŭtoro *Duployé*, konsideris la aferon laŭ tute nova vidpunkto. Anstataŭ celi rapidan skribmanieron, kiu ebligus kapti la rapidan parolon, li nur intencis verki skribon tiel simplan, ke per ĝi oni facile povus instrui la skribadon kaj legadon al la malkleruloj, multnombraj je tiu tempo.

Duployé eldonis verketon en 1860, kaj oficiale publikigis sian sistemon

en 1867. Lia propagando por la disvastiĝo de la stenografio estis fervore helpita de siaj adeptoj . . . kaj baldaŭ de l'uzado de la skribmaŝino

La sistemoj nune plej uzataj estas, en la landoj de brita lingvo tiu de Pitman, kiu tie estas preskaŭ sole uzata, krom tiu de Gregg kiu pli kaj pli disvastiĝas en Usono.

En Francio, flanke de kelkaj adeptoj de Aimé-Paris, kies sistemo estas pli konata en Svislando, la preskaŭ tuta stenografistaro uzas ĉu la sistemon de Prévost-Delaunay (1866), ĉu tiun de Duployé, kies supera grado nomita *Métagraphie*, verkita en 1897 de l'Stenografa Instituto el Francio, ĉiutage trafas novajn sukcesojn.

En Germanio — lando kie plej bone stenografio disvolviĝis — la du ĉefaj sistemoj estas tiu de l'fame konata Gabelsberger, la sola aŭtoro kies statuo ornamas publikan placon, kaj tiu de Stolze-Schrey; la unua publikigita en 1834, la dua en 1897. Antaŭ nelonge oficiala komisiono estis elektita por unuigi la diversajn sistemojn kaj starigi unuecan skribmedon intertempe definitive publikigitan. (Reichskurzschrift.)

En Hispanio la sistemoj de Marti kaj de Garriga estas plej konataj.

En Italio la sistemo publikigita en 1906 de Meschini, sukcese kontraŭstaras la adaptaĵojn Gabelsberger-Noë kaj Pitman-Francini.

En Nederlando la adeptoj de Groote certigas, ke tiu sistemo realigis la unuecon en tiu lando. Ni ne povis kontroli tiun diron, kiu surprizas pri lando, kie naskiĝis multnombraj sistemoj.

Ĉiuj nunaj sistemoj estas divideblaj laŭ du ĉefaj principoj: ia grafikaj aŭ skribliterformaj kaj la geometriaj.


La unuaj, kiuj estas uzataj en la orienta parto de Eŭropo (Germanio, Nederlando, Italio, k. t. p.), konsistas el signoj klinigitaj kiel la kutima skribmaniero. Iliaj adeptoj pretendas ke oni skribas ilin pli facile ĉar la mano estas alkutimigita je tiu inklino.

La duaj, kiujn oni uzas en la okcidenta parto (Britlando, Francio, Hispanio, k. t. p.), kaj en la preskaŭ tuta Ameriko, konsistas el signoj, kiujn oni skribas laŭ ĉiuj direktoj. Ili estas bazitaj sur tiu fundamento, ke la sonoj plej ofte uzataj devas esti riprezentataj per la plej simplaj signoj.


Por Esperanto, same kiel por ĉiuj naciaj lingvoj, originalaj sistemoj estis verkitaj. Sed, se ni konsideras, ke Esperanto ne estas lingvo universala, sed nur helpa kaj internacia, ni tute ne povas esperi sukcesigi tiajn sistemojn kontraŭ la multnombraj kaj multvaloraj jam ekzistantaj, ĉar la esperantisto devas esti kapabla stenografi ne nur la internacian sed ankaŭ sian nacian lingvon. Por tion fari, uzado de bona alkonformigo de l'nacia sistemo jam lernita estas certe la plej ŝatinda rimedo.

Por ebligi ke oni komparu la diversajn skribmanierojn, ni publikigas modelojn de 8 diversaj stenografioj. Dezirante, ke tiu elmontraĵo estu plej interesa por ĉiuj, la teksto estas la sama por ĉiuj modeloj. Ĝi konsistas en la unua strofo de nia himno: La Espero.

Originalaj Sistemoj.




Aoro (Sprotte).




L'Espero (Barit).


Alfaroj.




Gabelsberger (Schramm).




Aimé-Paris (Lefèbvre).




Grootte (Cozen).



Duployé-Institut (Flageul).



Mesc'ini (Russo).



Pitman (Butler).

La muziknotado.

La universale uzata muziknotado disvolviĝis de el la Mezepokaj Neŭmoj (VIII^a jarcento) ĝis sia nuna formo, pasinte tra la kvadrataj notadoj nigra kaj blanka. Dum tiu pli ol miljara evoluado ĝi akiris aron da bonaj kvalitoj inter kiuj la ĉefaj estas la uzo de la liniaro, de la notoj, de la paŭzoj, de la notnomoj, k. c.; sed, precize pro tiu longa kaj ne ĉiam racia disvolviĝado, englitiĝis en ĝin kaj enrestis ankaŭ kelkaj bedaŭrindaj malregulaĵoj kaj nelogikaĵoj kiujn estus dezirinde origi el ĝi.

La ĉefaj el ĉi-tiuj difektoj estas la jenaj: 1^e la monstro de 12 efektive diversaj kaj sendependaj duonaj tonoj de temperata kromatika gamo per 31 signoj de diatona notado, pro la motivo ke ĉiu diatona noto estas montrebla du- eĉ trimaniere (ekz.: do = si diezo = re duobla bemolo); 2^e la uzo de diversaj kleoj, pro kio unu kaj sama sonsigno estas lokita alie laŭ la uzata kleo; 3^e la samnomoj notoj ne havas la saman staron en la diversaj oktavoĵoj eĉ ĉe la uzo de unu kaj sama kleo; 4^e la tri nun ankoraŭ uzataj kleoj ne sufiĉas por montri ĉiujn sonojn de la moderna muzikskalo; efektive, malsupre de FA sub la liniaro en fa-kleo, ekzistas 2¹/₂ oktavoĵoj, kaj supre de SOL supre de la liniaro en sol-kleo ekzistas ankoraŭ 2¹/₂ eĉ 3¹/₂ oktavoĵoj! — 5^e, la uzo de diezoj, bemoloj kaj bekaroj fariĝas ĉiam pli ĝenananta en la nuntempa muziko: tiuj signoj devus malaperi; 6^e la diverseco de notvaloro kiel tempunuoj; krom tio la monstro de la takto, de la notovaloroj kaj de la paŭzoj kaj la liniaro mem estas plireguligeblaj kaj plisimpligeblaj.

Jam de pli ol ducent jaroj, aro da muzikkleruloj provis plibonigi la muzikskribon, sed preskaŭ neniu el ili komprenis la veran esencen de la problemoj! Pli ol 300 sistemoj estas proponitaj. Ili estas dividiblaj en du grupojn laŭ tio ĉu ili forĵetis ĉu konservis la liniaron.

En la unua grupo estas citeblaj la aŭtoroj kiuj proponis la uzadon de literoj kiel notoj, ion cetere nenovan en la muziko! Inter ili estas Bernard Schmidt (1577), Joachim Burmeister (1601), Cruger (1546—1614). En 1639^a Patro Antoine Parran ankaŭ proponis montri la sep sonojn de la gamo per la literoj c, d, e, f, g, a, b aŭ per la ciferoj 1, 2, 3, 4, 5, 6, 7 (ambaŭfoje de "do" ĝis "si"). La cifera notado estas reprenita kaj perfektigita en 1677 de Patro Jean-Jacques Souhaitty (nur por la Plankanto), poste de Jean-Jacques Rousseau (en 1742) kaj fine tute perfektigita kaj sukcese disvastigita en Franclando kaj en la franclingvaj landoj, de Pierre Gálin (1808), Aimé Paris kaj Armand Chev . En 1812 estis eldonita en Angllando perfektigita litera sistemo, sub la titolo "Tonic sol fa", elpensita de Miss Glover kaj ĝuanta grandan disvastiĝon en Britujo.

Aliaj aŭtoroj uzas notojn sen liniaro kies formo (Sauveur) aŭ vostondirekto (De Motz de la Salle) montras la diversajn diatonajn sonojn. Kelkaj elpensintoj proponis signojn tute fantaziajn kaj strangajn, formantajn projektojn plene nepraktikeblajn (Riebesthal, 1810; Bertini, 1814; k. c.).

En la dua grupo estas citindaj la sistemoj stransignaj de Edmond Jue (1824), Maurice Delcamps (1860), Danel, k. c.; ankaŭ tiu de William Striby kiu skribas la notojn sur du sesliniaj liniaroj kies kvaraj linioj estas plidikigitaj kaj kies samnomaj notoj estas interspacitaj je du oktavo. En aliaj sistemoj, la aŭtoroj uzas blankajn (aŭ malplenajn) notojn por montri la "diatonajn" sonojn, kaj nigrajn notojn, por montri la "kromatikajn" intersonojn, io kio aspektigas tre strange ĉiun muzikaĵon skribitan per tia procedo.

Ĝis nun ni citis nur metodojn kies aŭtoroj tute erare komprenis la problemon kaj elpensis skribojn tute ne uzeblajn praktike, ĉefe por noti multvoĉan aŭ multinstrumentan muzikon. La sekvantaj elpensintoj realigis en siaj verkoj almenaŭ parte ĝustajn ideojn: Boigelou (samtempano de J. J. Rousseau) proponis, je la unua fojo, sendependigi la 12 duonajn tonojn de la kromatika temperata gamo, skribotajn sur seplinia liniaro. Li nomis ilin: ut, de, re, ma, mi, fa, fi, sol, be, la, sa, si. En la komenco de la XX^a jarcento, la Argentino Menchaca faris la samon en sistemo multe tro sinteza. Kolonelo Treuille de Beaulieu (1809—86), aŭ, laŭ iaj scienculoj, Charles Fourier (1772—1837) skribis la sep diatonajn notojn sur trilinea liniaro, similigante tiel la staron de ĉiuj samnomaj notoj en ĉiuj oktavo; fine Kolonelo Treuille kaj, inter aliaj, la belgo Charles Meerens (1881—?) havis la ideon numeri la oktavojn.


Sed ĉu do ne ekzistas sistemo kiu estus la plena, definitiva solvo de la problemo? Certe! Ununura solvodona sistemo ekzistas de 1907^a, jaro dum kiu la belgo S^{ro} Jean Hautstont, publikigis la "Aŭtonoman Muziknotadon", kiu estas nenio alia ol sukcesinta kunfando en unu sistemo de la suprecititaj bonaj ecoj de la ordinara muzikskribo kun la parte bonaj ideoj de l'jus nomitaj aŭtoroj. Kunigante la simplecon al la perfekteco, la A. M. N., vera ovo de Kolombo, taŭgas samtempe kiel skribo popola kaj arta, kapabla noti la muzikon modernan kaj eĉ estontan tiel bone kiel la klasikan kaj pro tio ĝi formas logikan pluan evoluon de la ordinara muzikskribo. Ricevinte la aprobon de multaj muzik-verkistoj — kaj — scienculoj, inter kiuj Claude Debussy, ĝi posedas jam en diversaj landoj kernon de entuziasmaj adeptoj. Por daŭrigi la tutmondan disvastiĝon de tiu sistemo — kiu povas funkcii flanke de la ordinara muzikskribo kiel "helpa" notado — fondiĝis la "Internacia Asocio por la propagando de la Aŭtonoma Muziknotado (I. A. P. A. M. N.)".

AŬTONOMA MUZIKNOTADO.

A. Liniaro, notoj, notnomoj:

Diagram of a musical staff with notes and names: DO de RE me MI FA fo SOL sa LA li SI DO. Arrows indicate intervals between notes.

B. Seriomontriloj (serio = oktavo):



La serio V enhavas la diapazonan noton "la"

C. Valoroj (nur unu tempunuoca valoro):

Nomoj: Kyazobla, duobla, unua, duona, kvazona, okona, deksexona


Notoj:

Paŭzoj:

Valoroj: 4, 2, 1, 1/2, 1/4, 1/8, 1/16

Punkto aldonas duonan valoron -

D. Taktomontado:



E. Intenseco: p = mallaŭte, l = laŭte

f. { neutrala, intenseco } β = tre mallaŭte, α = tre laŭte

β = trege mallaŭte, α = trege laŭte

F. Krume, ĉiuj ceteraj signoj de l'ordinara muziknotado.

FUNDAMENTAJ SIGNOJ DE KELKAJ SISTEMOJ.

Sauveur: p p q b b d d
 ut re mi fa sol la si
 nomitaj: pa za ga so bo lo do

De Motz de la Salle:

ut re mi fa sol la si

Riebesthal: X ◊ ◐ S O ◻ ☾
 ut re mi fa sol la si


Bertini: S ◊ ◐ S O ◻ ☾
 (Kromatike) do zo ne tãt xãt mo bo lo be jãt bãt vãt

Ed. Jue: 
 do re mi fa sol la si do

Maurice Delcamps (sur trilinia linjaro):

do re mi ka bol la si

William Striby


 do re mi fa sol la si do re mi fa sol la si

Fouquier:

do re mi fa sol la si

Famaj komponistoj kaj muzikverkistoj.

- d'Albert, E., *1864: Eminentia fortepianisto kaj sukcesa komponisto de operoj (*La forveturo, Fluto solo, Tieland, Die toten Augen*).
 Alfarabi, ĉ. 900—950: Eminentia araba muzikteoriulo.
 Allegrì, Gr., 1584—1652: 9-voĉa *Miserere* por la Kapelo Sikstina.
 Ambrosius, 333—97: Aŭtoro de religiaj himnoj.
 Andras de Kreta, 650—720: La plej malnova komponisto de kanonoj.
 Arcadelt, Jakobo, ĉ. 1514—57: Eminentia madrigalisto.
 Bach, J. Seb., 1685—1750: La majstro de la polifona kaj homofona stiloj, instruisto de ĉiuj postaj muzikistoj. Komponis por ĉiuj instrumentoj, prefere por orgeno kaj kantvoĉoj (verkoj: 59 volumoj).
 Bantock, G., *1868: Sukcesa moderna angla komponisto kaj orkestrdirektanto (averturoj, simfoniaj poeziaĵoj, verkoj por kantvoĉoj).
 Beethoven, L. v., 1770—1827: La ĉefo de la klasikaj komponistoj. 9 simfonioj, 38 sonatoj por fortepiano, 16 kordkvartetoj; opero: *Fidelio*.
 Benoit, Peter, 1834—1901; kreinto de la Flandra muzikskolo; genia komponisto ĉefe oratoria (*Lucifer, Rubens-kantato, De Oorlog [La Milito], De Schelde*); kantoj.
 Berlioz, H., 1803—69: Kreinto de la programmuziko; eminenta orkestrteknikisto; simfonioj (*La Fantastique*), operoj, rekviemo.
 Bizet, G., 1838—75: Mondfama pro sia opero *Carmen*; krome la operoj *La perlkastistoj, Djamileh*; 3 simfonioj.
 Boieldieu, F. A., 1775—1834: Sukcesaj, melodioriĉaj operoj (*Jean de Paris, La dame blanche*).
 Bossi, E., *1861: Eminentia moderna itala orgenisto kaj komponisto; ĉambra kaj eklezia muziko, orkestraj verkoj, 3 operoj.
 Brahms, Joh., 1833—97: Profundpensa komponisto de (4) simfonioj, ĉambra muziko, ĉarmaj kantoj.
 Bruckner, A., 1824—96: 9 belegaj, ofte pompaj, treege impresaj simfonioj (la lasta dediĉita "Al la bona Dio"). [muziko].
 Caldara, A., 1670—1736: 74 operoj kaj serenadoj, 32 oratorioj; eklezia Cherubini, L., 1760—1842: 29 operoj (*La akvoportisto*), multege da eklezia muziko laŭ la stilo de Palestrina.
 Chopin, Fr., 1810—49: Eminentia virtuozo kaj poezia komponisto por la fortepiano; fondinto de tute nova stilo sur tiu kampo.
 Clementi, M., 1746—1832: Fama virtuozo kaj komponisto por la fortepiano (106 sonatoj). [grossi].
 Corelli, A., 1653—1713: Klasika violonisto; kreinto de la Concerti
 Cornelius, Peter, 1824—74: Poeto-komponisto (operoj *La barbiro de Bagdad, Gunlöd, Cid*), aŭtoro de delikataj kaj belegaj kantoj.

- Cowen, Fr., *1852: Eminent aŝla komponisto; 6 simfonioj, pli ol 300 kantoj, 4 operoj, oratorioj.
- Debussy, Claude, *1862: Muzika impresionisto; verkoj por orkestro, fortepiano; kantoj; opero: *Melisande*.
- Dittersdorf, K., 1739—99: 28 operoj (*Kuracisto kaj apotekisto*), ĉ. 100 simfonioj ktp.
- Donizetti, G., 1797—1848: 70 operoj (*La filino de l'regimento, Lucia di Lammermoor, Don Pasquale*).
- Dvořák, A., 1841—1904: Karakterize ĉeĥa muziko; 2 simfonioj, 9 operoj, uverturoj, ĉambra muziko.
- Eccard, Joh., 1553—1611: Unu el la plej eminentaj luteranaj ekleziaj komponistoj.
- Elgar, E., *1857: Oratorioj, uverturoj, kantoj, 2 simfonioj.
- Flotow, Fr., 1812—83: Francstilaj operoj kun, graciaj ritmoj (*Martha, Alessandro Stradella*).
- Franck, César, 1822—90: Ĉefo de la moderna franca muziko; oratorioj, simfoniaj poeziaĵoj, ĉambra kaj organa muziko.
- Gabrieli, G., 1557—1612: Verkoj por 2 kaj 3 horoj; skribis la unuajn sonatojn por instrumentoj kaj la unuan fugon.
- Gade, N. W., 1817—90: Karakterize nordlanda muziko (8 simfonioj, ĉambra muziko, kantoj, horoj).
- Glasunov, A., *1865: Genia rusa komponisto; simfonioj, uverturoj, ĉambra muziko. [Zarja].
- Glinka, M. J., 1804—57: Talenta rusa komponisto (opero *Shisnj sa* Gluck, Chr. W., 1714—87: La reformanto de la malnova itala opero; serio al natureco de l'esprimo; 107 operoj.
- Gounod, Ch., 1818—93: Eminent a franca komponisto, precipe de operoj (*Faust, Romeo kaj Julia*) kaj ekleziaj verkoj.
- Gregor I., †604: Reguligis la katolikan liturgion.
- Grétry, A. E. M., 1748—1813: Majstro de la franca komika opero.
- Grieg, E., 1843—1907: Karakterize norvega muziko por fortepiano, orkestro, kantvoĉoj.
- Guido de Arezzo, ĉ. 1026: La eltrovinto de la modernaj muziknotoj.
- Händel, G. F., 1685—1759: Operoj, oratorioj (verkoj: 105 volumoj).
- Hasler, H. L., 1564—1612: Transmetis unuafoje la italan stilon (de madrigaloj ktp.) al Germanujo.
- Hasse, J. A., 1699—1783: Pli ol 80 operoj en itala stilo, 14 oratorioj.
- Haydn, Jos., 1732—1809: 104 simfonioj, kies stilon li evoluis al klasika alto, 77 kordo kvartetoj, multege da alia ĉambra muziko; oratorioj: *La mondkreado, La sezonoj*.
- Hugbaldus, ĉ. 840—932: Eltrovinto de la plurvoĉa muziko.

- Humperdinck, E., 1854—1921: Poeziaj operoj (*Hänsel und Gretel, La gereĝidoj*).
- d'Indy, V., *1851: Eminent a moderna simfoniisto, ĉambra muziko, kantoj; sprita teatriulo.
- Lanner, J., 1801—43: La kreinto de la moderna valso.
- Lasso, Orlando, 1522—94: Pli ol 2000 komponaĵoj en klasika stilo por la preĝejo, revolucie nova por madrigaloj kaj kantoj.
- Leoncavallo, R., 1858—1919: Operoj en verisma stilo (*Pagliacci, La Bohème, Zaza, Maja, I Zingari*).
- Liszt, Fr., 1811—86: Eminent a virtuozo kaj komponisto por fortepiano; batalanto por la programmuziko (*Les préludes, Tasso, Dante, Faustsimfonio*).
- Loewe, Carl, 1796—1869: Plej eminent a komponisto de baladoj, kies stilon li kreis; oratorioj, 5 operoj.
- Lortzing, A., 1801—51: Majstro de la komika opero (*La du pastistoj, Caro kaj ĉarpentisto, La ŝtelĉasisto, Undine*).
- Lully, J. B., 1632—87: La opero- kaj baletkomponisto de Louis XIV.
- Mahler, G., 1860—1911: Eminent a operodirektanto; 9 simfonioj, kantoj.
- Marenzio, L., 1550—99: "Il più dolce cigno", la plej genia madrigalisto.
- Marschner, H., 1795—1861: Romantikaj operoj (*Hans Heiling, La vampiro, Templano kaj Judino*).
- Martini, G., 1706—84: Eminent a teoriluo kaj muzikhistoriisto; multe ŝatita instruisto.
- Mascagni, Pietro, *1863: Komponis la mondfaman *Cavalleria rusticana* kaj 10 pliajn operojn.
- Méhul, E. N., 1763—1817: Operoj (*Josef en Egipto*).
- Mendelssohn, F., 1809—47: Melodioriča, kelkfoje iom sentimentala; 121 verkoj; oratorioj (*Paulus, Elias*), simfonioj, uverturoj, kantoj, komponaĵoj por fortepiano (*Kantoj sen vortoj*).
- Meyerbeer, G., 1791—1864: Dramaj, patosaj operoj kun germana harmonieco, itala melodieco, franca ritmiko (*Robert la Diabolo, La hugenotoj, La profeto, Dinorah, La afrikanino*).
- Monteverdi, Cl., 1567—1643: La unua majstro de l'opero (*Orfeo* 1607, *Arianna, Proserpina, Ulisse, Poppea*).
- Morley, Th., 1557—1603: Madrigaloj ankoraŭ nun aŭdataj kun ĝuo.
- Mozart, W. A., 1756—91: Muzika genio jam frumatura (6-jara jam koncertpianisto, 8-jara komponisto), kun universala graveco. Treege produktema (626 verkoj) sur ĉiuj muzikaj kampoj; mondkonataj operoj (*Belmonte kaj Konstance, Geedziĝo de Figaro, Don Giovanni, La sorĉfluto*). [now; kantoj].
- Mussorgski, M., 1835—81: Muzika naturalisto; opero *Boris Godu-*

- Offenbach, J.**, 1819—80: 102 teatraj verkoj, prefere burleskaj operetoj (*La bela Helena, Orfeo en la infero*); opero *La rakontoj de Hoffmann*.
- Paestrina, G. P.**, 1526—94: La plej eminenta komponisto de la katolika eklezio (33 volumoj); *Missa papae Marcelli, Improperioj*.
- Parker, H.**, *1863: Eminentaj moderna amerikaj komponistoj; ĥoroj kun orkestro; multaj verkoj por instrumentoj ankoraŭ nepresitaj.
- Pergolesi, G. B.**, 1710—36: Genia komponisto de operoj (*La serva padrona*) kaj ekleziaj verkoj (*Stabat mater*).
- Peri, J.**, 1561—1633: La eltrovinto de la recitativa stilo; skribis la unuan operon *Dafne* (1597).
- Pfitzner, Hans**, *1869: Muzikdramoj (*Der arme Heinrich, Die Rose vom Liebesgarten*); kantato *Pri la germana animo*; ĥoroj, kantoj, ĉambra muziko.
- Prätorius, M.**, 1571—1621: Multege da komponaĵoj ekleziaj kun instrumentoj; eminenta teoriulo.
- Puccini, G.**, *1858—1924: Verismaj operoj (*Manon Lescaut, La Bohème, Tosca, Madama Butterfly*); ĉambra muziko.
- Purcell, H.**, 1658—95: Plej eminenta angla komponisto, precipe de operoj (*Dido and Aeneas* 1688); multaj ekleziaj komponaĵoj.
- Rameau, J. Ph.**, 1683—1764: Kreinto de la harmoniteorio (*Traité d'harmonie reduite à ses principes naturels* 1722) kaj plej eminenta franca komponisto de l'18^a jarcento; operoj, kantatoj, motetoj, verkoj por fortepiano.
- Reger, Max**, 1873—1916: Ĉiuspecaj komponaĵoj de tre komplika strukturo; ĉambra muziko kaj verkoj por organo, fortepiano kaj kantado.
- Rimsky-Korsakov, N.**, 1844—1908: Genia, melodiorica rusa komponisto; operoj (*Pskovitjanka, Neĝereto, Sadko, La fianĉino de l'caro, Mozart kaj Salieri*), 3 simfonioj, ĉambra muziko, kantoj.
- Rossini, G.**, 1792—1868: La ĉefmajstro de la itala nacia opero (38 verkoj, inter ili *La barbiro de Sevilla, La ŝtelema pigo, Tell, Stabat mater*).
- Saint-Saëns, C.**, 1835—1921: Komponaĵoj ĉiuspecaj en parte klasika, parte moderna stilo (operoj *Samson et Dalilah*, 3 simfonioj, multaj ekleziaj verkoj, ĉambra muziko ktp.) [tatoj, oratorioj ktp.]
- Scarlatti, A.**, 1659—1725: 115 operoj, 200 mesoj, nenombrelblaj kantschein, J. H., 1586—1630: Ĉarmaj dancoj kaj kantoj; ekleziaj koncertoj.
- Schillings, Max**, *1868: Operoj (*Ingwelde, Moloch, Mona Lisa*), simfoniaj fantazioj, kantoj.

- Schönberg, A.**, *1874: Serĉanto de novaj vojoj en la muzika teorio kaj praktiko (*Gurrelieder*, ĉambra muziko).
- Schubert, Franz**, 1797—1828: La majstro de l'klasika germana kanto; simfonioj, operoj, ĉambra muziko, sonatoj, impromptus.
- Schumann, Rob.**, 1810—56: Poezia, romantika komponisto; kantoj, verkoj por fortepiano, 4 simfonioj, ĉambra muziko.
- Schütz, H.**, 1585—1672: La muzika patro de Bach; komponis la unuan germanan operon (*Daphne* 1627).
- Sibelius, J.**, *1865: Kunkreanto (kun Merikanto, Krohn, Järnefelt) de la nacia finlanda muziko; 4 simfonioj, simfoniaj poeziaĵoj, verkoj por fortepiano.
- Sinding, Chr.**, *1856: 2 simfonioj, ĉambra muziko, verkoj por fortepiano.
- Smetana, Fr.**, 1824—84: Eminentaj ĉeĥaj komponistoj; 8 operoj (*La vendita fianĉino, Libussa*), simfoniaj poeziaĵoj.
- Spontini, G.**, 1774—1851: Operkomponisto siatempe tre ŝatata (*Vestalin, Ferdinand Cortez, Olympie*).
- Stamitz, Joh.**, 1717—57: La genia kreinto de la moderna stilo en la instrumenta muziko. Lia orkestro en Mannheim estis siatempe la plej bona en la mondo. 50 simfonioj, ĉambra muziko.
- Strauß, Johann** (patro: 1804—49, filo: 1825—99): Plej sukcesaj danckomponistoj, la „valsoreĝoj“. Operetoj: *La vesperto, La ciganbarono*.
- Strauß, Richard**, *1864: Genia moderna komponisto, brila arto de instrumentacio; operoj (*Guntram, Salome, Elektra, Rosenkavalier, Ariadne en Naxos*), programsimfonioj (*Don Juan, Till Eulenspiegel, Zarathustra, El Italio*), ĉambra muziko, kantoj.
- Sullivan, A. S.**, 1842—1900: Muziko al Shakespeare-aj dramoj, oratorioj, kantatoj, operetoj (*Mikado*).
- Sweelinck, J.**, 1562—1621: Genia organisto.
- Tschaikovsky, P.**, 1840—93: 7 simfonioj, 10 operoj, ĉambra muziko.
- Verdi, G.**, 1813—1901: Ĉ. 30 efikaj, patosaj operoj (*Rigoletto, La traviata, Il trovatore, Aida, Othello, Fallstaff*); rekviemo.
- Wagner, R.**, 1813—83: La kreinto de la moderna muzikdramo, kune poeto kaj komponisto (Fantoma ŝipo *Tannhäuser, Lohengrin, Tristan kaj Isolde, Majstrokantistoj*, Tetralogio *Parsifal*).
- Weber, K. M. v.**, 1786—1826: La kreinto de la muzika romantiko; operoj (*Freischütz, Preciosa, Euryanthe, Oberon*), verkoj por fortepiano. [El *corregidor*.]
- Wolf, Hugo**, 1860—1903: Belegej, psikologie profundaj kantoj; opero

Nacia himnaro.

Saluton al la popolo / Kie viroj kantoriĉaj / Formas en versoj /
Patran saĝecon. / Laŭde gloranta / Heroajn agojn / Ĉe korda
sono. / Saluton al tiu popolo / Ĝia gloro neniam pereos.

Laŭ ĉerkesa melodio

Ofte oni renkontas en gazetartikoloj aludon pri la himno de ia popolo; la melodioj, pro la trouzo fariĝas banalaj, la paroloj forgesataj — kiel la poeto kaj komponisto. Diversaj naciaj himnoj — florintaj el la popola poezio — meritas esti konataj ankaŭ de nesamnacionoj — dume kelkaj pro la supre dirita kaŭzo senvalorigis ĝis la grado de ordinara strata kanto. (Mallongigoj: *P.*: = Poeto; *M.*: = Verkinto de l'meniko; *K.*: = Komencaj vortoj.)

Argentina: "Himno Nacional". *P.*: Vicente Lopez y Planes. *M.*: José Blas Parera. Apero 1813. Oficialigita. *K.*: *Oid mortales grito sagrado libertad* = Aŭdu mortontoj la voĉo sankta, Libereco.

Aŭstria: "Deutsch-Oesterreich, du herrlich Land". *P.*: Dr^o Renner. *M.*: Wilhelm Kienzl. Apero 1919. Oficialigita. *K.*: *Deutsch-Oesterreich, du herrlich Land, wir lieben dich* = German-Aŭstri' bel-ega land' ni amas vin!

Belga: "La Brabançonne". *P.*: Charles Rogier. *M.*: Van Campen-




hout. Apero 1830. Oficialigita. *K.*: *Après des siècles d'esclavage* = Post jarcentoj de sklavstato.

Boliviana: "Bolivianos, el hado propicio coronó nuestros votos". *P.*: Ignacio de Sanjuines. *M.*: B. Consta.

Brazila: "Himno Nacional". *P.*: Francisco Man. da Silva. Apero 1831. Oficiala. *K.*: *Ouviram do Ypiranga as margens placidas dum povo heroico brado retumbante* = La trankvilaj bordoj de (rivero) Ypiranga aŭdis resonantan krimon de heroa popolo.


Brita: "God save the king". *P.*: Henry Carey aŭ John Bell. Apero 1688. Oficialigita. *K.*: *God save our gracious king* = Gardu la reĝon Di'.

Bulgara: "Ŝumi Marica". *P.*: J. Vazov. *M.*: N. Jivkov. Apero



1870 — 1875. Oficialigita. *K.*: *Ŝumi Marica okarvavena* = Bruas Marica ensangigita.

Ĉeĥoslovaka: "Kde domov můj (1). Nad Tatrou sa blýska (2). *P.*: K. Tyl (1); Kar. Kuzmany (2). *M.*: Fr. Škroup (1). Apero 1834



ĝis 1848. Oficialigitaj. *K.*: *Kde domov můj* = Kie mia hejmn' *Nad Tatrou sa blýska* = Super Tatroj fulmas.


Ĉila: "Hymno". *P.*: Eusebio Lillo. *M.*: José Zapiola. Oficialigita. *K.*: *Ha cesado la lucha sangrienta*.

Dana: "Der er et yndigt Land". *P.*: Adam Oehlenschläger. *M.*: H. E. Krøyer. Apero 1823. Ne oficialigita. *K.*: *Der er et yndigt Land* = Troviĝas ĉarma land'.

Danciga: "Kennt ihr die Stadt am Bernsteinstrand"? *P.*: Paul Enderling. Apero 1923. Neoficiala. *K.*: *Kennt ihr die Stadt am Bernsteinstrand* = Ĉu konas vi la urbon ĉe sukkena bord'?

Estona: "Mu isamaa, mu õnu ja rõõm". *P.*: J. Voldemar Jansen. *M.*: Fred. Pacius. Apero 1869. Neoficiala. *K.*: *Mu isamaa mu õnn ja rõõm ku i kaunis oled sa* = Mia patrolando, mia feliĉo kaj ĝojo, kiel bela vi estas.

Finnlanda: "Maamme" (finne) "Vårt land" (svede). *P.*: J. L. Rune-



berg. Apero 1848. Neoficiala. *K.*: *Oi maamme Suomi synnyinmaa* = Ho patra land', Suomi, nia land'.

Franca: "La Marseillaise". *P.*: Rouget de l'Isle. *M.*: Malnova. Apero 1792. Oficialigita. *K.*: *Allons, enfants de la patrie, ...* = Nu, infanoj de l'patrio, ...

Germana: "Deutschlandlied". *P.*: Hoffmann von Fallersleben. *M.*: Joseph Haydn. Apero 1797. Oficialigita. *K.*: *Deutschland, Deutschland über alles ...* = Germanio super ĉio ...

Greka: "Ethnikos himnos tis Elados". *P.*: Dionysios Solomos. *M.*: N. Manzaros. Oficialigita. *K.*: *Segnōri z'apo tin kopsi tu spathiu tin tromeri* = Mi cin konas de la teruriga tranĉeco de la glavo.

Hispana: "Marcha Real" = Reĝa Marŝo. (Sen paroloj.) Oficialigita.

Hungara: "Himnusz". *P.*: Kölcsey Ferenc. Apero 1823. Oficiala. *K.*: *Isten áldd meg a magyart* = Dio benu l'hungaron.

Islanda: "Ó, gud vors lands". *P.*: Matthias Jochumsson. Apero



1874. Neoficiala. *K.*: *Ó gud vors lands* = Ho, dio de nia lando. (Verkita okaze de la miljara festo de Islando 1874.)

Itala: "Marcia reale". *P.*: G. Gabetti. Oficialigita. *K.*: *Viva il re! Viva il re, le trombe squillano* = Vivu la reĝ'! la trumpetoj sonoras!

Japana: "Kimigayo". *P.*: Nekonata. Apero: Antaŭ 1000 jaroj. Oficialigita. *K.*: *Kimiga yo wa* = Glora regad' de Mikad'.

Jugoslava: (Serba) "Bože pravde" = Dio de l'justeco. (Kroata) "Lijepa naša domovina" = Bela nia patroland. (Slovena) "Naprej zastava slave" = Antaŭen standardo de l'gloro.

Kanadana: "Vive la canadienne, vole mon coeur vole" = Vivu kanadanino, flugu mia koro, flugu. Neoficiala. (Laŭ malnova franca kanto de la unuaj kolonistoj.)

Kolumbana: "Himno Nacional". *P.*: R. Nunez. *M.*: Sindici. *K.*: *O gloria inmarcesible* = O neforiganta gloro.


Kubana: "Bayamés". *P.*: P. Fiqueredo. *K.*: "Al combate corred Bayameses" = Al batalo venu Bayamano!

Latva: "Dews svehti Latviju" = *Benu patrolandon Latvio.*

Litova: "Lietuva, tėvynė mūsų". *P.*: Vincas Kudirka (1858 ĝis 1899). Oficialigita. *K.*: *Lietuva, tėvynė mūsų, Tu didvyrių žeme!* = Litovio, patrolando, tero de l'herooj.

Meksikana: "Himno Nacional Mexicano". *P.*: G. Bocanegra. *M.*: Jaime Nunó. Apero 1850. Oficialigita. *K.*: Mexicanos al grito de guerra = Meksikanoj je l'krio milita.

Nederlanda: "Wien Neêrlandsch bloed". *P.*: H. J. Tollens Czn.



Apero 1816. Oficialigita. *K.*: *Wien Neêrlandsch bloed door d'ad'ren vloeit* = En kies vejnoj fluas nederlanda sang'.

Norvega: "Ja, vi elsker". *P.*: Bjørnstjerne Bjørnson. *M.*: Richard



Nordraak. Apero 1859. Oficialigita en 1864. *K.*: "Ja, vi elsker dette landet" = Jes, ni amas nian landon.

Paragvaja: Himno. *P.*: A. Fiqueroa. *K.*: *A los pueblos de America* = Al la popoloj d'Ameriko.

Persa: "Marš Melli". *P.*: Golam Reza Ĥan. Apero 1327. Oficialigita. *K.*: *Molk Iran ra tebah gardid nam* = Ĝis kiam ne restis el ni krom sklava popolo, malhonoriĝis la nomo Iran.

Pola: Mazurek Dabrowskiego. *P.*: Józef Wybicki. Apero 1797. Oficialigita. *K.*: *Jeszcze Polska nie zginela* = Ankoraŭ Pollando ne



perdiĝis, kiel longe ni estas vivantaj. Rimarko: Kanto de polaj legioj sub Napoleono, en kiu oni revas pri la patrolando sendependa.

Portugala: "A Portuguesa". *P.*: Alfredo Keil. Apero 1890. Oficialigita. *K.*: *Heroes do mar, nobre povo* = Maraj herooj, nobla popolo.

Rumana: "Himnul Regal". *P.*: V. Alexandri. *M.*: E. Hübsch. Apero 1885. Oficialigita. *K.*: *Traiasca Regele* = Vivu la reĝo.

Rusa: "Laborista Marseliezo". *K.*: "Vstavaj praktajem zaklejm-jónnyj" = "Leviĝu la ŝarĝita per la malbeno".

Sudafrika Unio: 1. Oranje Liberŝtato. *K.*: *Heft Burgers' t lied de vrijheid an* = "Komencu civitanoj la kanton de liberec". 2. Transvalo. *P.* kaj *M.*: C. F. van Rees. *K.*: *Kent gij dat volk vol heldemoed* = Ĉu konas vi popolon heroecan. (1 kaj 2 estas la kantoj de la iamaj bur-respublikoj.)

Sveda: "Du gamla du fria". *P.*: Richard Dybeck. Apero 1865. Neoficiala. *K.*: *Du gamla, du fria, du fjällhöga nord* = Mal-



nova, libera, plej alta la nord'. (Oficiala nacia himno estas la Kungs-sången = Reĝa kanto, kantata ĉe oficialaj okazoj.)

Svisa: "Rufst du mein Vaterland". *P.*: Germane: J. R. Wyss, france: H. Röhrisch. *M.*: Carey. Oficialigita. *K.*: *Rufst du mein*



Vaterland = Se vokas patrolando. France: O monts indépendants. (La melodio estas tiu de la angla "God save the king". Ĉe serenaj

okazoj oni preferas la "Svisan Kantonon", france "Le Cantique Suisse", germane "Der Schweizerpsalm". *K.*: Vidas mi en radiar' de l'matena lumomar'. *P.*: L. Widmerk aj Chatelanat. *M.*: Alberich Zwyszig.)

Urugvaja: "Himno Oriental". *P.*: Francisco Acuna de Figueroa. Apero 1830. Oficialigita. *K.*: *Orientales, la patria o la tumba* = Orientuloj, patrujon aŭ tombon. (Rimarko: Urugvajo, oriente de rivero Uruguay nomiĝis dum hispana epoko: Banda Oriental, la loĝantoj de "Orientales" nomo kiu restis).

Usona: "Star Spangled Banner". *P.*: Francis Scott Key. Apero 1812. Oficiala ĉe l'armeo. *K.*: *O'say can you see by the dawning light* = Ho, diru ĉu vi povas vidi per la frua lumo de l'tagiĝo!

Venezuela: "Gloria al bravo pueblo". *P.*: Nekonata. Oficialigita 1881. *K.*: *Gloria al bravo pueblo que el yugo lanzó* = Gloro al la brava popolo, kiu sin liberigis de la jugo.

Internacia vivo.

Organizaĵoj Oficialaj (Ŝtatoj).

Ligo de Nacioj. La L. d. N. estas asociiĝo de ŝtatoj subskribante la Kontrakton (Angle Covenant, France Pact), kiu estas la konstitucio de l'organizaĵo¹⁾.

La subskribo devigas je rezigno al solvo permlita kaj submetiĝo al arbitracio okaze de konflikto inter la ŝtatoj.

Ĉiu ŝtato, malrespektanta tiun solenan promeson estas aŭtomate en stato de neleĝeco kun la aliaj ŝtatoj. Ili estas devigataj ĉesi ĉiujn politikajn kaj ekonomiajn rilatojn kun la devomanka membro. La ŝtatmembroj solene promesis kunlabori larĝmezure en ekonomiaj, socialaj, humanaj kaj laboraj problemoj.

Formale la L. d. N. formiĝis la 10. Januaro 1920 per la validigo de l'kontrakto de Versailles. La du oficialaj lingvoj estas la Angla kaj Franca.

Membroj. Ĝis fino 1924 la jenaj ŝtatoj estas membroj de la L. d. N.: Abisenio, Albanio, Argentino, Aŭstralio, Aŭstrio, Belgio, Bolivio, Brazilo, Brita Reĝlando, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Ĉilo, Ĉinio, Danio, Estonio, Finnlando, Francio, Greklando, Gvatemalo, Haitio, Hindio, Hispanio, Honduraso, Hungario, Irlando, Italio, Japanio, Kanado, Kolombio, Kostariko, Kubo, Latvio, Liberio, Litovio, Luksemburgo, Nederlando, Nikaragvo, Norvegio, Novzelando, Panamo, Persio, Peruo, Pollando, Portugalio, Rumanio, Salvadoro, Siamo, Sudafriko, Sudslavio (Serbo-Kroata-Slovena-Reĝlando), Svedio, Svislando, Urugvajo, Venezuelo = 54 ŝtatoj.

(Ne ankoraŭ estas anoj la jenaj ŝtatoj: U S A, Germanio, Ruslando, Turkio, Egipto, Ekvadoro, Meksiko.)

Organoj de la L. d. N. 1. Supera konsilantaro, ĵara kunveno; Sekretariejo.

2. Suborganoj: 4 teknikaj organizaĵoj (Ekonomio-Financa, Saneca, Trafika, Labora); 5 Informaj komisionoj (Milita, Mara, Aera; komisiono pri redukto de armado; Mandatoj; Opiumo; Sociala). Internaciaj Oficejoj: Hidrografa Oficejo; Helpo; Instituto komerca; Intelekta komisiono. Admin. Organizaĵoj: Komitato de Saar-regado. Liberŝtato Danzig.

Publikaĵoj: Oficiala gazeto; Serio de kontraktoj registritaj ĉe la sekretariejo; Protokoloj pri la kunvenoj; Raportoj de la Ĝenerala Sekretario; Monata Statistika Bulteno; Manlibro pri Internaciaj organizaĵoj k. a.

Sekretariejo kaj Adreso: Société des Nations, Genève (Svislando).

¹⁾ Kontrakto de la Ligo de Nacioj (Oficiala teksto en angla kaj franca lingvoj kun esp. traduko. C. O. 377, Paris 1920. Prezo 3 Fr. fr. Librairie Centrale Espérantiste, 51 Rue de Clichy, Paris IX.

Internacia Labora Organizo. Kreita per la Parto XIII de la Kontrakto de Versailles kaj la respondaj partoj de la ceteraj Packontraktoj.

Celoj. La internacia reguligo de la kondiĉoj de laboro laŭ la principoj de socia justeco, kiu estas la necesa bazo de universala paco.

Organizo. La daŭra organizaĵo, kies membroj estas la Ŝtatemembroj de la Ligo de Nacioj kaj Germanio, konsistas el:

1. Ĝenerala Konferenco de la reprezentantoj de la Membroj;
2. Internacia Labora Oficejo.

La ĝenerala Konferenco kunvenas almenaŭ unufoje ĉiujare. Ĝi konsistas el kvar delegitoj de ĉiu Ŝtatemembro, du reprezentantaj la Registaron, unu la mastrojn, kaj unu la laboristojn.

La Konferenco balotas:

1. Projektojn de konvencioj;
2. Rekomendojn.

Ĉiu Ŝtatemembro devas, en la tempolimo de unu jaro, aŭ en esceptaj cirkonstancoj 18 monatoj, proponi ĉiujn projektojn de konvencioj aŭ rekomendojn al la nacia aŭtoritato kompetenta en la afero, por ke ĝi leĝfaru aŭ alprenu alian rimedon. Ĉe rekomendo, la Membroj sciigas la Ĝeneralan Sekretarion de la Ligo de Nacioj pri la rimedoj alprenitaj. Ĉe projekto de konvencio, la Membro kiu havigis la konsenton de la kompetenta aŭtoritato komunikas al la Sekretario Ĝenerala sian formalan konfirmon de la konvencio.


Ses kunsidoj de la Konferenco jam kunvenis: la unua en Washington en 1919, la dua en Genova en 1920, kaj la ceteraj en Genève en 1921, 1922, 1923 kaj 1924. La sepa kunsido kunvenos en Genève en Majo 1925.

Multaj el la projektoj de konvencioj ĝis nun balotitaj estas jam konfirmitaj de diversaj Ŝtatoj, kaj la decidoj de la Konferenco influis aliamaniere la leĝfaron de pluraj landoj.

La *Internacia Labora Oficejo* konsistigas parton de la institucioj de la Ligo de Nacioj. Ĝiaj funkcioj ampleksas la kolekton kaj disdonon de ĉiuj informoj pri la internacia reguligo de la kondiĉoj de la laboristoj, kaj speciale la ekzamenon de la demandoj proponitaj por esti prezentataj al la Konferenco, kaj la kondukon de ĉiuj enketoj ordonitaj de la Konferenco. Ĝi preparas la tagordon de la Konferenco.

La Administra Konsilantaro de la Internacia Labora Oficejo konsistas el 24 personoj, 12 reprezentantaj la Registarojn, 6 nomitaj de la patronaj kaj 6 de la laboristaj delegitoj al la Konferenco¹⁾.

¹⁾ La Konferenco en ĝia Kvara kunsido (1922) decidis pligrandigi la nombron de konsilantoj ĝis 32, 16 reprezentantaj registarojn, kaj po 8 mastrojn kaj laboristojn. Tiu ĉi decido atendas la konfirmon de la Membroj.



Internacia Labora Oficejo, Genève.

La Internacia Labora Oficejo eldonis diversajn presaĵojn en Esperanto kaj nun regule eldonas dumonatan Bultenon en tiu ĉi lingvo, kiu aperas kiel aldonaĵo al *Esperanto*, oficiala gazeto de UEA.

Budĝeto 1925. 7 420 595 Fr. sv. (minus taksita enspezo el la vendo de eldonaĵoj: 80 000 Fr. sv.).

Publikaĵoj. Internacia Labora Jarlibro, Internacia Labora Revuo, Oficiala Bulteno, Socialaj Informoj, Leĝdona Serio, Studoj kaj Dokumentoj, angla- kaj franca lingve kelkaj germanlingve; Bulteno en Esperanto, k. t. p.

Estraro. Administra Konsilantaro: Prezidanto: S^{ro} ARTHUR FONTAINE; Direktoro: S^{ro} ALBERT THOMAS; Direktoro - Adjunkto: S^{ro} H. B. BUTLER.

Adreso: Bureau international du Travail, Genève (Svislando).

Universala Poŝta Unuiĝo. — Kreita en 1874. Kunigas, publikigas kaj liveras ĉiajn informojn pri la internacia poŝta servo; eldonas gazeton, leksikonon de ĉiuj poŝtoŝtatoj k. t. p. — **Adreso:** Bureau International de l'Union Postale Universelle, Schwanengasse 2, Bern.

Universala Telegrafa Unuiĝo. — Kreita en 1868. Servas kiel oficiala ligilo inter la diverslandaj telegrafadministracioj. **Adreso:** Bureau International de l'Union Télégraphique, Monbijoustrasse 10, Bern.

Internacia Unuiĝo por protektado de industria propraĵo. — Kreita en 1883. Celas protekti la inventojn, industriajn desegnaĵojn kaj modelojn, fabrikmarkojn, firmnomojn, k. t. p. **Adreso:** Helvetiastrasse 7, Bern.

Internacia Unuiĝo por protektado de literatura kaj arta propraĵo. — Kreita en 1886, 26 aliĝintaj ŝtatoj. Celas protekti literaturajn kaj artajn verkojn kontraŭ senpermesa reproduktado; eldonas gazeton. Ambaŭ organizaĵoj havas komunan oficejon. — **Adreso:** Helvetiastrasse 7, Bern.

Centra oficejo de internaciaj transportoj per fervojo. — Kreita en 1893. Celas fiksi la juron pri internaciaj transportoj; eldonas gazeton. **Adreso:** Office Central des Transports internationaux par Chemins de fer, Monbijoustrasse 36, Bern.

Internacia Unuiĝo por la publikigo de la dogantarifoj. — Kreita en 1890. Celas publikigi la ĉiulandajn dogantarifojn en kvin lingvoj. **Adreso:** Bureau international pour la publication des tarifs douaniers, 38 Rue de l'Association, Bruxelles.

Internacia Agrikultura Instituto. — Kreita en 1905. Celas kunigi, studi kaj publikigi ĉiujn informojn, statistikojn pri terproduktoj, mal-

sanoj de vegetaĵoj, ekspluatkondiĉoj, salajroj, agrikultura kredo kaj kooperado; eldonas bultenojn kaj jarlibrojn. **Adreso:** Via Umberto I, Roma.

Internacia Komerca Instituto. — Fondita en 1919. Celas centriĝi, kunordigi, publikigi kaj konigi informojn pri statistiko, komerca leĝaro, komercaj traktatoj. **Adreso:** Palais d'Egmont, Bruxelles.

Internacia Oficejo de la Pezoj kaj Mezuroj. — Kreita en 1875. Celas konservi la internaciajn pez- kaj mezurnormojn kaj periode kompari ilin kun la naciaj. **Adreso:** Bureau international des poids et mesures, Pavillon de Breteuil, Sèvres (Francio).

Internacia Oficejo de Publika Higieno. — Kreita en 1907. Celas publikigi ĉiujn informojn pri sanitaraj leĝoj, statistikojn kaj bibliografiojn pri publika sano kaj higieno, k. t. p. **Adreso:** Office International d'hygiène publique, 195 Bd. Saint Germain, Paris.

Neoficialaj internaciaj institucioj.

INTERNACIA VIVO. PACO:

Unuiĝo de la Internaciaj Asocioj. — Kreita en 1906. Celas studi la faktojn de internacia vivo, prepari la efektivigon de tutmonda organizaĵo, faciligi la rilatojn inter la internaciaj asocioj; eldonas revuon kaj jarlibron. **Adreso:** Union des Associations Internationales, Palais Mondial, Bruxelles.

Internacia Instituto de Bibliografio. — Kreita en 1895. Celas studi la demandojn pri dokumentado kaj sisteme ĝin organizi; starigis universalan bibliografian repertorion, dokumentan kaj ikonografian repertoriojn (dek milionoj da slipoj). **Adreso:** Institut International de Bibliographie, Palais Mondial, Bruxelles.

Interparlamentara Unuiĝo. — Fondita en 1889. Konsistas el membroj de la diverslandaj parlamentoj, celas favori la ideon pri internacia arbitracio. **Adreso:** Union Interparlementaire, 2 Chemin de la Tour de Champel, Genève.

Unuiĝo de la Asocioj por Ligo de Nacioj. — Fondita en 1919. Federiĝo de la diverslandaj asocioj por Ligo de Nacioj. **Adreso:** Union des Associations pour la Société des Nations, Palais Mondial, Bruxelles.

Konstanta Pacoficejo. — Sekretariejo de la diverslandaj pacifistaj societoj; eldonas gazeton kaj jarlibron. **Adreso:** Bureau International de la Paix, rue Charles Bonnet 6, Genève.

Internacia Ligo de la Virinoj por Paco kaj Libereco. — Fondita en 1915. Celas efektigi la rezoluciojn voĉdonitajn ĉe la internaciaj kongresoj de la Virinoj kaj apogi ĉiun proponon favoran al paco kaj liberiĝo de la virinoj; eldonas gazeton. *Adreso:* Ligue Internationale de Femmes pour la Paix et la Liberté, Maison internationale, 12 Rue du Vieux Collège, Genève.

Ligo por la defendo de l'homaro. — Fondita en 1911. Defendas la komunan interesojn de l'homaro, celas, organizi ĝian progreson. Eldonas gazetojn "La Voix de l'Humanité", "The Call of Humanity" kaj "Die Menschheit". *Adreso:* Ligue pour la défense de l'humanité, 35 Lerchenweg, Bern.

Universala Ligo de l'Kruco Blanka por la paco. — Fondita 1917. Celas la kunlaboron de ĉiulandaj katolikoj por la paco. *Adreso:* "Weisses Kreuz", Karmeliterplatz 5, Graz (Aŭstrio).

Monda Unuiĝo de l'Virino por Internacia konkordo. — Fondita 1915. Celas kunhelpi al daŭra paco, per reciproka eduko; evolui la humanan internaciismon ĉe la virinoj per kreo de rilatoj inter ĉiulandaj virinoj. *Adreso:* Union Mondiale de la femme pour la concorde internationale, 17 Boulevard Helvétique, Genève.

Unuiĝo de Naciecoj. — Fondita en 1912. Celas kunigi ĉiujn dokumentojn sciencajn, ekonomiajn, historiajn k. t. p. por konigi la animon, estinton, estonton de ĉiu nacieco. *Adreso:* Union des Nationalités, Boulevard des Batignolles 41, Paris: Librairie des Nationalités, Rue Caroline, Lausanne (Svis.).

Internacia Kontraŭmilita Oficejo. — Kreita en 1921. *Adreso:* Parklaan 23, Bilthoven apud Utrecht (Nederlando).

Internacia Oficejo por la defendo de popolarĵoj. — Kreita en 1920. Celas: 1. Certigi la rajton pri memdestino; 2. akcepto de ĉiuj popoloj en la Ligo de Nacioj; 3. protekto de minoritatoj; 4. protekto de indigenoj k. t. p. *Estraro:* Ĝen. Sekr.: Sino D^{ro} MARIE DE RUSIECKA; Sroj BALMAS kaj RENE CLAPARÈDE. *Gazeto:* Les Droits des Peuples. — *Adreso:* Bureau International pour la défense du droit des peuples, 17 rue de la Prairie, Genève.

Universala Izraelida Ligo. — Kreita en 1860. Celas helpi al la emancipo de la Izraelidoj; fondis lernejojn, precipe en Oriento. *Adreso:* Alliance Israélite Universelle, 45 rue La Bruyère, Paris.

Internacia Zionista organizaĵo. — Celas restarigi en Palestino hejmlandon por Izraelidoj; starigis koloniojn en Palestino. 77 Great Russel Street, London.

SCIENCO:

Internacia Perada Instituto. — Fondita en 1919. *Adreso:* Institut Internedaire International, Oranjestraat 6, 's Gravenhage.

Instituto de Internacia Juro. — Fondita en 1873. Celas studi ĉiujn demandojn pri intern. juro, civila, komerca, diplomata aŭ milita; eldonas jarlibrojn. *Adreso:* Institut de Droit International, 236 Avenue Molière, Bruxelles.

Internacia Instituto Kolonia. — Kreita en 1894. *Adreso:* Institut Colonial International, 36 rue Veydt, Bruxelles.

Internacia Instituto Statistika. — Kreita en 1885. Ostduinlaan 2, 's Gravenhage.

Internacia Instituto Sociologia. — Kreita en 1893. *Adreso:* Institut International de Sociologie, 115 Boulevard St. Germain, Paris.

Internacia Hidrografa Oficejo. — Kreita en 1919. *Adreso:* Bureau hydrographique international, Monaco.

Unuiĝo Geodezia kaj Geofizika Internacia. — Fondita en 1919. *Adreso:* Science Museum, South Kensington, London SW 7.

Internacia Instituto por la Disvastigo de socialaj spertoj. — Kreita 1919. — Celas studi kaj disvastigi socialajn spertojn. Eldonas librojn kaj gazetojn. *Adreso:* 35 Lerchenweg, Bern.

Centra Oficejo de Astronomiaj Telegramoj. — Fondita 1882. *Adreso:* Astronomische Zentralstelle, Kiel (Germanio).

Internacia Asocio de botanistoj. — *Adreso:* Association Internationale de botanistes, 14 Arnheimscheweg, Velp (Nederlando).

Internacia Fonetika Asocio. — Fondita 1886. *Adreso:* Association phonétique internationale, 20 rue de la Madeleine, Bourg-la-Reine (Seine).

Internacio Asocio de Librotenado. — Fondita 1911. *Adreso:* Association Internationale de comptabilité, Palais Mondial, Bruxelles.

Internacia Entomologia Asocio. — Fondita 1886. *Adreso:* Töngesgasse 22, Frankfurt a. M.

Internacia Asocio por kontraŭbatali la senlaborecon. — Fondita 1910. *Adreso:* Association Internationale pour la lutte contre le chômage, 1 Chemin de l'Escalade, Genève.

Internacia Spiritisma Oficejo. — Kreita 1910. *Adreso:* Bureau international du spiritisme, Waltwilder par Bilsen (Belgio).

La Nobelpremio.

Alfred Nobel, sveda kemiisto kaj elektrovinto de l'dinamito, naskita en Stockholm la 21 Oktobro 1833 kaj mortinta la 10 Decembro 1896 en San Remo, destinis per testamento, 27 Nov. 1895, la sumon de 44 milionoj da frankoj (ora valoro) por fondaĵo el kies jaraj interezoj estu premiotaj la personoj kiuj dum la pasinta jaro pleje servis al la homaro ĉu en fiziko, kemio, medicino, literaturo kaj paco. Senrigarde la naciecon la fondaĵo Nobel sub ŝtata observo en Stockholm disdonis de 1901—1922 premiojn al 4 amerikanoj, 13 angloj, 4 aŭstrianoj, 4 belgoj, 6 danoj, 16 francoj, 25 germanoj, 1 hindo, 3 hispanoj, 1 irlandano, 4 italoj, 2 kanadanoj, 1 luksemburgano, 6 nederlandanoj, 4 norvegoj, 2 poloj, 2 rusoj, 7 svedoj, 7 svisoj. La sumo de premio atingas inter 140 000—180 000 orfrankoj.

Jaro	Fiziko	Kemio	Medicino	Literaturo	Paco
1901	Röntgen G.	Van 't Hoff G.	von Behring G.	Sully-Prudhomme F.	Dunant, H. S. Passy, F. F.
1902	Lorentz N. Zeeman N.	Fischer G.	Ross A.	Mommsen G.	Ducommun S. Gobat S.
1903	Becquerel F. Curie F.	Arrhenius Sv.	Finsen D.	Björnson No.	Cremer A.
1904	Raleigh A.	Ramsey A.	Pawlow R.	Mistral F. Echegaray H.	Instituto por intern. Juro.
1905	Lenard G.	Baeyer G.	Koch G.	Sienkiewicz P.	Sino v. Suttner Aŭ.
1906	Thomson A.	Moissan F.	Golgi I. Ramon y Cayal H.	Carducci I.	Roosevelt Am.
1907	Michelson Am.	Buchner G.	Laveran F.	Kipling A.	Moneta I. Renault F.
1908	Lippmann L.	Rutherford A.	Ehrlich G. Meĉnikov R.	Eucken G.	Arnoldson Sv. Bajer D.

1909	Braun G. Marconi I.	Ostwald G.	Kocher S.	Lagerlöf Sv.	Estournelles de Constant F. Bernaert B.
1910	v. d. Waals N.	Wallach G.	Kossel G.	Heyse G.	Internacia Oficejo por la Paco.
1911	Wien G.	Sino Curie F.	Gullstrand Sv.	Maeterlinck B.	Asser N. Fried Aŭ.
1912	Dalen Sv.	Grignard F. Sabatier F. Werner S.	Carrel Am.	Hauptmann G.	Root Am.
1913	Kamerlingh Onnes N.	Richards A.	Bárány Aŭ.	—	—
1914	von Laue G.	Willstätter G.	—	Romain Rolland F.	—
1915	Bragg, W. H. A. Bragg, W. L. A.	—	—	—	—
1916	—	—	—	Heidenstam Sv.	—
1917	Barkla A.	—	—	Gjellerup D. Pontopiddan D.	Intern. Komitato de la Ruĝa Kruco S.
1918	Planck G.	Haber G.	—	—	—
1919	Stark G.	—	Bordet B.	Spitteler S.	Wilson, W. Am.
1920	Guillaume F.	Nernst G.	Krogh D.	Hamsun No.	Bourgeois F.
1921	Einstein G.	Soddy A.	—	France, A. F.	Branting Sv. Lange No.
1922	Bohr D.	Aston A.	—	Benavente H.	Nansen No.
1923	Rob. Andrews Am.	Pregel Aŭ.	Banting Kan. Macleod Kan.	Yeats, W. B. Ir.	Rezervita
1924	Rezervita.	Rezervita.	Einckhoven N.	Reymont P.	Decidota

(Literoj apud la nomo montras la naciecon: A. = Angla, Am. = Amerikana [Usona], Aŭ. = Aŭstria, B. = Belga, D. = Dana, F. = Franca, G. = Germana, H. = Hispana, I. = Itala, Ir. = Irlanda, Kan. = Kanadano, L. = Luksemburga, P. = Pola, N. = Nederlanda, No = Norvega, S. = Svisa, Sv. = Sveda.)

RELIGIAJ KAJ FILOZOFIAJ MOVADOJ:

Eklezia Presbitera Ligo. — Fondita 1877. *Adreso:* Alliance of reformed churches holding the presbyterian system, 44 Queen Street, Edinburgh (Skotlando).

Mondunuiĝo de societoj de kristana agado. — Fondita 1881. *Adreso:* World Wide Union of christian Endeavour societies, 41 Mount Vernon Street, Boston, U. S. A., Mass.

Internacio Katolika. — Fondita 1920. Celas la kunlaboron spiritan, religian kaj socialan de ĉiuj katolikoj kaj kat. organizaĵoj. *Adreso:* Karmeliterplatz 5, Graz (Aŭstrio).

Societo de Frateco universala kaj teozofia. — Fondita 1875. *Adreso:* International Theosophical Headquarters, Point Loma (Kalifornio).

Internacia Unio de Etikaj Societoj. — Fondita 1895. *Adreso:* 19 Buckingham Street, London, Strand.

Internacia Federacio de Societoj Liberpensulaj. — Fondita 1880. *Adreso:* Fédération internationale de Société de Libre Pensée, Bruxelles.

KONTRAŬ-ALKOHOLA MOVADO:

Internacia Oficejo kontraŭ alkoholismo. — Kreita 1907. Celas kunigi, klasigi kaj disponigi al aŭtoritatoj, naciaj kontraŭ-alkoholaj societoj kaj privatuloj la prialkoholismajn dokumentojn. Gen.-Sekretario: ROBERT HERCOD. *Adreso:* Bureau International contre l'alcoolisme, 1 Avenue de Grammont, Lausanne (Svis).

Internacia federacio de temperenc-societoj "Blua Kruco". — Fondita 1877. *Adreso:* Fédération Internationale des Sociétés de Tempérance de la Croix Bleue, 5 Taconnerie, Genève.

